Sur du planedoj
Romano en du libroj

Kurd Laßwitz

Unue eldoniĝis en 1897
Elgermanigis Thomas Würfel en 2014
laŭ licenco CC BY-NC-SA 4.0

Enhavo

I. Unua libro **5**

1. 1a ĉapitro – Ĉe la norda poluso **7**

2. 2a ĉapitro – La enigmo de la poluso **15**

3. 3a ĉapitro – La loĝantoj de la marso **23**

4. 4a ĉapitro – La falego de la aerostato **29**

5. 5a ĉapitro – Sur la artefarita insulo **33**

6. 6a ĉapitro – En la flegado de la feino **39**

7. 7a ĉapitro – Novaj enigmoj **45**

8. 8a ĉapitro – La sinjoroj de la kosmo **51**

9. 9a Ĉapitro – La gastoj de la marsloĝantoj **57**

10. 10a ĉapitro – La kaj Saltner **65**

II. Dua libro **73**

Danko **I**

Licenco **III**

Parto I.

Unua libro

1a ĉapitro – Ĉe la norda poluso

Serpento ĉasas super la glacion. En giganta longeco etendiĝinte ĝi trenas sian maldikan korpon kiel furioze antaŭen. Per rapidtrajnrapideco ĝi saltas de glaciero al glaciero, la oscedanta fendo ne haltigas ĝin, nun ĝi naĝas trans la malferman akvon de marbranĉo kaj facilmove glitas trans la tie kaj ĉi tie balanciĝantajn glaciinsulojn. Ĝi glitas sur la bordon, nehaltigeble en rektan direkton, rekte norden, renkonte al la montaro, kiu leviĝas ĉe la horizonto. Iras trans la glaĉerojn al la malhela rokaĵo, kiu baŭmas supren de meze inter la glaciamasoj, kovrita de vastaj makuloj de brunetaj likenoj. Denove la serpento rapidegas malsupren en valon. Inter du ŝtonegoj kreskas verde kaj flavete; okzaloj kaj saksifragoj ornamas la grundon, la malabundaj folioj de salikarbusto disiĝas sub la bato de la per rapidegeco trairanta serpentokorpo. Hastante soleca neĝemberizo fuĝas; ektiminte kaj grumblante leviĝas el sia dormeto polusa urso, al kiu la serpento ĵus tuŝetis la vilan felon.

La serpento ne zorgas pri tio; dum ĝia vosto ĉasas super la nordan somerpejzaĝon, ĝi levas sian kapon alte supren en la aeron, renkonte al la suno. Estas mallonge post noktomezo, ĵus komenciĝis la deknaŭa de aŭgusto.

Oblikve falas la radioj de la sunglobo sur la deklivojn de la montaro, kiu per la influo de la jam monatojn daŭrinta tago kovriĝis de abunda plantokreskaĵo. Malantaŭ tiuj altaĵoj kuŝas la norda poluso de la terglobo. Renkonte al ĝi rapidegas la serpento. Sed kie estas la kapo de la hastanta monstro? Oni ne vidas ĝin. Ĝia maldika korpo svenas en la aero, kiu kuŝas klare kaj travideble super la polusa pejzaĝo. Ja kia stranga aperaĵo? Ĉiam antaŭe de la serpento ŝvebas rondeta korpo origita de la suno. Estas granda aerostato. La fajna silko rigide ŝvelas per la premo de la hidrogena gaso, kiu plenigas ĝin. Je la alteco de tricent metroj super la grundo forta, konstante blovanta suda vento pelas la aerostaton al la nordo. La serpento ja estas la trenkablo de tiu aerostato, kiu alproksimiĝas per favora veturado al la delonge sopirita celo de homa scivolemo, la norda poluso de la tero. Posttirate sur la grundo, ĝi regulas la flugon de la aerostato. Se tiu plialtiĝas, ĝi malhelpas tiun per sia pezo, kiun tiu devas kunlevi; se tiu malplialtiĝas, ĝi malplipezigas tiun, etendante sur la tero per pli granda longeco. Ĝia froto sur la grundo kaŭzas reziston kaj ebligas per tio al la aerostatistoj devii de la ventodirekto ĝis certa grado per rigi velon.

Sed nun la velo estas brajlita. La vento blovas tiel favore rekte de la sudo, kiel la aŭdacaj nordpolusveturantoj nur povas deziri. Longe ili estis atendintaj la ekblovon de la suda vento ĉe la norda bordo de Svalbardo. La polusa somero jam kliniĝas al sia fino, kaj ili timis devi turniĝi sensukcese kiel la aŭdaca svedo Andrée ĉe lia unua provo. Tiam finfine, la 17an de aŭgusto ekblovis la suda vento. La plenigita

aerostato leviĝis en la aerojn; dum du tagoj ili estis trapasintaj mil kilometrojn en rekte nordan direkton. La de Nansen malkovrita norda oceano estis transflugita kaj nova lando atingita, kiu troviĝis ĉi tie tute kontraŭ atendo de la geografoj. Jam la Supan-kabo sur Andrée-lando malaperis de iliaj rigardoj. Baldaŭ devis decidiĝi, ĉu la du ekspedicioj, unu farita en aerostato, la alia per glitveturiloj, vere atingis la poluson mem, kiel iliaj gvidantoj opiniis. Pro la necerteco difini pozicion en tiuj latitudoj estiĝis duboj pri tio, la elrigardo de la aerostato estis malklarigita pro nebulo, al la glitveturila ekspedicio mankis pli vasta superrigardo. Nun ekipiĝas per la rimedoj de riĉa privatulo, la astronomo Friedrich Ell, germana ekspedicio, kiu ankoraŭfoje esploru la poluson pere de aerostato.

Kompreneble, oni estis utiligintaj la spertojn de la pasintaj ekspedicioj. De la internacia asocio por polusa esplorado propra sekcio por scienca aerostatirado estis fondita. Nome oni estis perfektiginta la uzadon de trenkablo kaj trovinta almenaŭ preskaŭ rimedon por stiri, kiel la velŝipo havas ĝin per la rezisto de la akvo. Oni estis konstruinta metalcilindron, en kiu oni kunportis ĝis 250 atmosferoj kunpremitan hidrogenon, por anstataŭi okazintan gasperdon ĉe daŭraj veturadoj. Oni estis doninta formon al la korbo, kiu permesis fermi ĝin laŭ bezono kontraŭ la ekstera aero. La nova aerostato 'Poluso' estis ekipita kun ĉiuj tiuj progresintaj instalaĵoj. Krome, granda paraŝuto pendis sub la korbo por savo en ekstremkazo. Sub speco de selo, kiu garantiis sekuran sidon, korbo de provianto estis fiksita.

La direktoro de la sekcio por scienca aerostatirado, Hugo Torm, mem estis entrepreninta la gvidon de la ekspedicio. La astronomo Grunthe kaj la naturesploristo Josef Saltner akompanis lin. Saltner rigardis la horloĝon kaj barometron, premis la momentobturatoron de la fotografa aparato kaj notis la horon kaj la aeropremon.

"Tiun ĉi regionon ni feliĉe havas en la poŝo", li murmuris. Tiam li vaste disetendis la en altajn feltobotojn metitajn piedojn, kiel la limigita spaco de la korbo permesis, bonhumore palpebrumis kaj diris: "Sinjoroj, mi estas terure laca. Ĉu oni ne povus dormeti nun? Kion vi pensas, kapitano?"

"Faru tion", Torm respondis, "estas via vico. Sed rapidu. Se ni tenos tiun venton ankoraŭ dum tri horoj –"

Li interrompis sin por fari la necesajn registrojn.

"Veku min nepre, tuj kiam ni – estos ĉe la poluso –"

Saltner parolis kun fermitaj okuloj, kaj je la lasta vorto li jam milde estis ekdormetinta.

"Estas enorma bonŝanco, kiun ni havas", komencis Torm. "Ni alflugas laŭ la vera senco de la vorto al la celo. Mi notis por la lastaj kvin minutoj denove 3,9 kilometrojn. Ĉu vi povus provi pli ekzaktan difinon, kie ni estas?"

"Eblos", Grunthe respondis, ekprenante la sekstanton. "La aerostato veturas tre trankvile, kaj ni havas la lokan horon sufiĉe certe. Ni havis la plej malaltan pozicion de la suno antaŭ unu horo kaj 26 minutoj." Li mezuris la altecon de la suno kun plej granda akurateco. Poste li kalkulis iom da tempo.

En perfekta silento kuŝis la pejzaĝo, super kiun la aereostatistoj rapidegis. Vasta altebenaĵo, kovrita de musko kaj likenoj, tie kaj ĉi tie intermiksita kun akvoflakoj, formis la bazon de la montaro, al kiu la aerostato rapide alproksimiĝis. Oni aŭdis nenion krom la tiktako de la horloĝomekanismo, de tempo al tempo la konstantan ronronon de la aspiracia termometro, inter tio la komfortan spiradon de la dorme-

tanta Saltner. Estis ja pli agrabla polusveturado ol tiri la malrapidajn glitveturilojn kun duone malsatmortintaj hundoj trans la glaciruinaĵojn. Grunthe suprenrigardis de sia kalkulado.

"Kiun latitudon vi havas el la kalkulado de la trapasita vojo?" li demandis al Torm.

"Okdek ok gradoj kvindek – kvindek unu minutoj", tiu respondis.

"Ni veturis eĉ pluen."

Grunthe paŭzis, reviziante ankoraŭfoje mallonge la kalkuladon. Tiam li diris konsiderante, sed per la sama konstanteco de la voĉo:

"Okdek naŭ gradoj 12 minutoj."

"Ne eblas!"

"Tute certe", Grunthe respondis kaj entiris la lipojn tiel, kiel lia buŝo aspektas sub la maldikaj lipharoj kiel pensostreketo. Tio estis la signo, ke neniu perforto kapablus ŝanĝi iom de la neskuebla eldiro de Grunthe.

"Tiam ni havas ne pli ol 90 kilometrojn ĝis la poluso", Torm vokis vigle.

"Okdek naŭ kaj duonon", Grunthe diris.

"Do ni estos tie post du horoj."

"Post unu horo kaj 52 minutoj", Grunthe korektis neskueble, "nome se la vento daŭros kun la sama rapideco."

"Jes – se", tiel Torm vokis vigle. "Ankoraŭ nur du horojn, Dio donu!"

"Tuj kiam ni preterpasos tiun montokreston, ni vidos la poluson."

"Vi pravas, doktoro! Ni vidos la poluson – ĉu ni ankaŭ atingos ĝin?"

"Kial ne?" Grunthe demandis.

"Malantaŭ la montoj, la ĉielo ne plaĉas al mi – sur la norda flanko la suno nun kuŝas dum horoj, tie ekzistas leviĝanta aerfluo –"

"Ni devas atendi."

"Tie – tie – rigardu – la belegan randon de la glaĉero", Torm vokis.

"Ni flugas rekte renkonte al ĝi; ĉu ni ne devas plialtiĝi?" Grunthe demandis.

"Certe, ni devas superflugi tie. Atentu! Fortranĉu!"

Du sakoj da balasto falis malsupren. La aerostato ekrapidegis supren.

"Kiel la distanco trompas", Torm diris, "mi taksintus la muron pli malproksima – ankoraŭ ne sufiĉas. Ni devas oferi pli."

Li fortranĉis plian sakon.

"Ni ne rajtas veni en la gorĝon", li klarigis, "neniu homo scias, en kiajn kirlojn ni venos tie. Sed kio estas tio? Ĉu la aerostato ne plialtiĝas? Helpas nenio – eĉ pli devas eksteriĝi!"

Nigra muro, kiu dividas la glaĉeron en du partoj, leviĝas ĵus antaŭ ili. La aerostato ŝvebis en timiga proksimeco. Kun tima atendo la du viroj observis la flugon de sia aerostato. La suda vento nun estis, je ilia bonŝanco, ĉi tie en la rekta proksimeco de la montoj pli malforta, alie ili jam estus ĵetegitaj kontraŭ la rokoj. La balono nun troviĝis en la ombro de la montoj; la gaso malvarmiĝis. La temperaturo rapide malgrandiĝis sub la frostpunkton. Torm pripensis, ĉu li rajtus elĵeti pli da balasto. Kiom li perdis nun da balasto, tiom li tiam devos foroferi da gaso por malplialtigi la aerostaton denove, kaj la gaso estis lia plej granda trezoro, la rimedo, kiu portu lin for de la regiono de la terura nordo. Li ja ne sciis tion, kio atendis lin malantaŭ la montoj. Sed la aerostato plialtiĝis tro malrapide. Tiam – flanka fluo movas ĝin – la

radioj de la suno, kiu rigardas trans la selon de la glaĉero, trafas ĝin denove – la gaso plivastiĝas, la aerostato plialtiĝas – pli kaj pli malsupren malleviĝas la glaciamasoj sub ĝi. –

"Hura!" krias la du aerostatistoj kiel el unu buŝo.

"Kio okazas?" Saltner eldormetiĝas.

"Ĉu ni ĉeestas?"

"Ĉu vi volas vidi la nordan poluson?"

"Kie? Kie?" Tuj Saltner ekstaris.

"Ve, estas malvarme", li vokis.

"Ni plialtiĝis pli ol 500 metrojn", Torm respondis.

Saltner kovris sin per sia pelto, kion la aliaj estis farintaj jam antaŭe.

"Ni estas preskaŭ je la sama alteco kiel la kresto de la montaro. Tuj kiam ni povas rigardi trans ĝin, devas kuŝi antaŭ ni, ĉirkaŭ 50 kilometrojn norden, la loko –"

"Kie la terakso ŝmiriĝas!" Saltner vokis. "Mi estas diable scivolema. Nu, la ĉampanon ni ne devas unue malvarmigi."

La tri viroj staris, sin firmtenante ĉe la kablaro, en la nacelo. Senpacience ili rigardis ĉiun momenton, kiun la manipulado de la aerostato kaj la registrado de la instrumentoj lasis al ili, tra siaj binokloj norden, renkonte al la suno, kiu nur iomete estis flankenpaŝinta orienten. Iom post iom la montosuproj malleviĝis sub ili – plia larĝa montokresto malhelpis ilian elrigardon – la aerostato glitis nun denove je la alteco de la kresto, la trenkablo frotumis – plia larĝa baseno estis superflugenda, tiam la sopirita celo devis kuŝi antaŭ ili. La aerostato nun troviĝis proksimume en la mezo de la baseno, ne pli ol 100 metrojn super ĝia grundo, kaj la kontraŭa valmuro ankoraŭ blokis la elrigardon. La vento estis iomete malpli vigla, sed ankoraŭ suda, kaj la aerostato plialtiĝis laŭ la ebena altaĵo de la glacikampo.

Nun unuopaj blankaj montopintoj en granda malproksimeco malantaŭ la proksima horizonto de la kontraŭa glacimuro estiĝis videblaj, la aerostaristoj troviĝis je sama alteco kun la lasta barilo, kiu limigas ilian rigardon. La montosuproj pliiĝis, ili formis montoĉenon.

"Tiuj montoj jam kuŝas malantaŭ la poluso", Grunthe diris, sed ĉi-foje lia voĉo ja tremis pro ekscito. Forte li kunpremis siajn lipojn al rekta linio.

Plue la aerostato plialtiĝis – malhele koloritaj montaroj aperis sub la neĝosuproj, ruĝete kaj brunete briletantaj, – nun la aerostato atingis la altaĵon kaj ŝvebis super profunda abismo – la trenkablo rapidiĝis malsupren, kaj la aerostato tuj malplialtiĝis kelkajn cent metrojn – tiam ĝi svingiĝis ankoraŭfoje supren kaj malsupren – tiu subita svingo de la aerostato plene okupis la atenton de la aerostatistoj – ili vidis sub si, profunde malsupre sovaĝan ĥaoson de klifoj, rokruinaĵoj kaj glaciblokoj, post si la krute rompitan muron, sur kiu la distordita ombro de la aerostato svingiĝis supren kaj malsupren – la instrumentoj estis registrendaj, kaj nur nun ili povis rigardi antaŭen, antaŭen kaj norden – aŭ ĉu eble jam estis suden?

Saltner estis la unua, kiu rigardis antaŭen. Sed li diris nenion, kun longe eletendita fajfo li blovis sian spiron el siaj akrigitaj lipoj.

"La maro!" Torm vokis.

"Saluton!" nun Saltner diris. "La maljuna Petermann ja pravis finfine, sed nur iom. Malferma polusa maro ĝi ja estas, sed nur ne oni devas vanti pri tio."

“Enlanda maro, baseno, almenaŭ, ĉirkaŭ mil kvadratajn kilometrojn mi taksas”, Grunthe diris. “Proksimume same granda kiel la Konstanca Lago. Sed kiu povas scii tion, kio forkiĝas tie fore kiel fjordoj kaj kanaloj. Kaj ankaŭ la baseno mem estas dividita de diversaj insulo je branĉoj.”

“Kiu alvenas tie malsupre piede aŭ ŝipe, tiu devas peni decidi, ĉu la maro kuŝas en la lando aŭ la lando en la maro”, Saltner diris. “Bone, ke estas pli komforte por ni.”

“Certe”, Torm opiniis, “eblas, ke ni havas parton de la malferma maro antaŭ ni, kvankam de ĉi tie ŝajnas, ke la montoj ĉirkaŭus la akvon de ĉiuj flankoj. Ni ja vidos. Sed antaŭ ĉiuj aferoj, kion ni faru? Ni devis plialtiĝi kontraŭ atendo tiom alten, ke ni nun perdus tre multe da gaso, se ni volus malsupreniri, sed aliflanke ni devos denove plialtiĝi trans la montojn tie. Estas malfacila demando. Sed ni havas ankoraŭ tempon pripensi tion, ĉar la aerostato moviĝas nun nur malrapide.”

“Kaj tiun okazon ni volas utiligi por laŭmerite saluti la nordan poluson”, Saltner vokis. Kun tiuj vortoj li eltiris botelujon, el kiu la arĝentaj koloj de tri boteloj da ĉampano elstaris invitante.

“Pri tio mi ja scias nenion”, Torm diris demandante.

“Tio estas donaco de sinjorino Isma. Vidu, estas skribita sur ĝi: ‘Malfermendas ĉe la poluso. Pezas kvar kilogramojn.’”

Torm ridis. “Mi ja pensis tion”, li diris, “ke mia edzino enkontrabandus ion, kio rompas la ekspediciajn regulojn.”

“Sed estas ja belega penso de via edzino, festi sin ĉe la norda poluso per ĉampano”, Saltner respondis. “Unue por ŝi mem, ĉar tio estas io, kio ĝis nun neniam okazis; vi devas konfesi tion, oni ĉi tie ĝis nun neniam lasis damojn vivi. Kaj due por ni, tion vi devas ankaŭ konfesi; estas tre rave trinki la ŝaŭmvinon en tiu malvarmeco je la bonfarto de nia komandantino. Kaj trie, ĉu ne estas simple prijubileble vidi la tragikan vizaĝon de nia astronomo? Ĉar ĉampanon li principe ne trinkas, kaj li principe ne trinkas je la sano de inaj estaĵoj; sed ĉar li sur la norda poluso principe devas kaj volas aliĝi al tosto, li troviĝas en konflikto de la principoj, el kiu elveni estos diable malfacile por li.”

“Al tio mi povus respondi tre multe”, diris Grunthe. “Ekzemple, ke ni ankoraŭ tute ne scias, kie la norda poluso fakte kuŝas.”

“Ja prave”, Torm interrompis lin, “sed pro tio ni devas festi la momenton, en kiu ni estas certaj havi ĝin la unuan fojon en nia vidkampo. Ĉu vi konfesos tion?”

“Nu, jes”, Grunthe diris, kaj eta subrideto glitis trans liajn trajtojn. “Mi supozas, ke ni estus ĉe la poluso. Tiel mi povas tosti kun vi, aŭ ankaŭ ne, tute tiel, kiel mi volas, sen veni en konflikton kun iuj principoj.”

“Kial?” Saltner demandis,

“La poluso estas punkto de malkonstanteco. Principoj estas maksimoj, kiuj validas laŭ la premiso, ke la kondiĉoj ekzistas, por kiuj ili estas postulitaj, antaŭ ĉio la konstanteco de la loko- kaj tempodifinoj. Ĉe la poluso ĉiuj kondiĉoj estas neniigitaj. Ĉie tie ne ekzistas ĉielaj direktoj, ĉiuj direktoj povas esti nomitaj kiel nordo, sudo, oriento aŭ okcidento. Ĉi tie ankaŭ ne ekzistas horo; ĉiuj horoj, nokto, mateno, tagmezo kaj verspero ekzistas samtempe. Ĉi tie do validas ĉiuj principoj kune aŭ tute neniuj. La kompleta indiferenteca punkto de ĉiuj difinoj estas atingita, la idealo de la senpartieco.”

"Brave", Saltner vokis, intertempe la trinkujojn el aluminio per la bobelanta vino pleniginte. "Vivu sinjorino Isma Torm, nia favorkora donacintino!"

Saltner kaj Torm levis siajn trinkujojn. Grunthe premfermis la lipojn kaj tenis, fiksrigardante rekte antaŭen, sian trinkujon senmove antaŭ si, pasive lasante okazi, ke la aliaj tuŝis ĝin per siaj trinkujoj. Nun vokis Torm: "Vivu la norda poluso!"

Tiam ankaŭ Grunthe vigle kunpuŝis sian trinkujon kun tiuj de la aliaj kaj aldonis: "Vivu la homaro!"

Ili trinkis kaj Saltner vokis:

"La tosto de Grunthe estas tiom ĝenerala, ke unu trinkujo ne povas sufiĉi." Kaj li enverŝis ankoraŭfoje.

Intertempe la aerostato drivis renkonte al la enlanda maro, kiu malkovriĝis nun ĉiam pli klare al la mirantaj rigardoj de la vojaĝantoj. De la bazo de la krute falanta rokmuro de la montaro la tereno iom post iom malleviĝis, certe ankoraŭ distancon de kelkaj dudek kilometroj, renkonte al la bordo. Sed la pejzaĝo nun montris tute alian fizionomion. La sovaĝa glaĉera naturo estis malaperinta, verdaj montherbejoj tiriĝis, nur kovritaj de unuopaj ŝtonruinaĵoj tie kaj ĉi tie, per lanta kliniĝo renkonte al la akvo. Oni kredis rigardi en belegan alpan valon, en kies mezo blua montolago disvastiĝis. Ĉe la transa, fora bordo, kiu ja svenis en malklara krepusko, kontraŭe ŝajnis denove regi kruta falo de roko kaj glacio, nuba muro ja tiriĝis supren tie super la montoj. La plej okulfrapanta en la tuta scenaranĝo estis la rigardo de unu el la insuloj, kiuj multnombre kaj en malegalaj formoj kuŝis en la baseno, ĝis kies bordo la aerostato nun estis alŝvebinta. Ĝi estis pli malgranda ol la plimulto de la ceteraj insuloj. Sed iliaj formoj estis tiom perfekte regulaj, ke ŝajnis dubinde, ĉu oni havis formadon de la naturo antaŭ si. La per likenoj vestitaj rokruinaĵoj, kiuj kovris la aliajn insulojn, mankis ĉi tie komplete.

La esploristoj eble estis ankoraŭ ĉirkaŭ dek du kilometrojn for de la enigma insulo, kiun ili esplore rigardis per siaj binokloj, kiam Torm turnis sin al Grunthe.

"Bonvolu diri al ni vian opinion. Ĉu ni povas efektive difini, kie ni troviĝas? Mi devas konfesi, ke mi ĉe la transiro de la montaro kaj la rapida altoŝanĝo ne estis kapabla sekvi la unuopajn landmarkojn."

"Mi faris", Grunthe respondis, "kelkajn biradojn, sed por certa difino ili ne plu sufiĉas. Ankaŭ la metodo el la registrado de la sunalteco nun ne estas utiligebla, ĉar ni ne plu estas kapablaj, difini la horon eĉ nur kun iom da certeco. Ni tute perdis la ĉielajn direktojn. La kompaso ja estas tre malfidinda ĉi tie en la nordo. Ĉiukaze ni estas tute proksimaj de la poluso, kie ĉiuj meridianoj kuŝas tiom malproksime, ke devio de unu kilometro dekstren aŭ maldekstren signifas tempodiferencon de unu horo aŭ pli. Se nia aerostato deviis de la nord-sud-direkto eble de la transiro de la montaro kvin aŭ ses kilometrojn, kio facile povas esti, estas nun ne, kiel ni supozas, la tria horo matene la 19an de aŭgusto, sed eble jam tagmezo, aŭ, se ni deviis okcidenten, ni do revenis en la hieraŭan tagon kaj estas eble nur la 18a de aŭgusto vespere."

"Tio estus la diablo", Saltner vokis. "Tion kaŭzas la daŭra sunbrilo ĉe la poluso! Nun mi povas denove alglui la folion de hieraŭ al mia deŝirkalendaro."

"Ja eblas!" Grunthe ridetis. "Supozu, ke vi promenas ĉirkaŭ la nordan poluson en distanco de cent metroj de la poluso, tiel vi komforte ĉirkaŭiris la poluson dum kvin minutoj kaj transpasis ĉiujn 360 meridianojn; do vi trairis dum kvin minutoj ĉiujn

horojn de la tago. Se vi ĉirkaŭiras okcidenten kaj vi volas koni la ĝustan horon de ĉiu meridiano, vi devus malfruigi vian horloĝon sur ĉiu meridiano je 4 minutoj, ke vi reiras post la menciitaj kvin minutoj plenan tagon, kaj se vi tiamaniere ĉirkaŭadas la poluson dum unu horo, via horloĝo devas montri la 7an de aŭgusto, se ĝi havas datomontrilon."

"Do mi devas ekhavi alglukalendaron", Saltner opiniis.

"Jes, sed se vin ĉirkaŭiras orienten, vi antaŭiras same en la tempo, tiam vi atingus post dekduobla promenado ĉirkaŭ la poluson la 31an de aŭgusto, se vi deŝirus folion de via kalendaro ĉe ĉiu ĉirkaŭiro de la poluso. Tamen vi fakte ambaŭkaze ankoraŭ troviĝas la 19an de aŭgusto. Vi do devus kiel la maristoj ĉe la transiro de la 180a meridiano konforme ĝustigi vian datomontrilon."

"Kaj se ni ĝuste nun transflugas la poluson?"

"Tiam ni saltas dum unu momento dek du horojn en la tempo. La poluso ja estas punkto de malkonstanteco."

"Ve, tie oni ja ne scias, kie oni estas."

"Jes", Torm diris, "tio ja estas la fatala. De la komenco ni devis fidi, ke ni povas difini nian pozicion el la trapasita vojo. Ĉu vere eblas fari tute nenion?"

"Nur se ni alteriĝos kaj metos niajn instrumentojn tiel, ke ni povos albiri kelkajn stelojn."

"Pri tio oni neniukaze povos pensi, antaŭ ol ni estos trafluginta la lagon kaj transrigardos la transan montaron. Ĉi tie inter la insuloj ni ne rajtas aŭdaci malsupreniri. Do por ni ne estas vere pli bone ol por niaj antaŭuloj, kaj la vera poluso denove restas nedifinita."

"Tro malbenite", Saltner grumblis, "tiel ni eble ĝuste estas ĉe la norda poluso kaj ne scias tion."

2a ĉapitro – La enigmo de la poluso

Malrapide la aerostato migris antaŭen, tamen li moviĝis ne rekte renkonte al la okulfrapanta malgranda insulo, sed ĝi restas kuŝanta dekstre de ĝia veturdirekto.

Dum Grunthe notis la landmarkojn kaj Torm registris la instrumentojn, Saltner, kies tasko estis fotografe registri la terenon, traserĉis la regionon per sia altkvalita abbéa reliefbinoklo. Tiu donis deksesoblan pligrandigon kaj lasis, ĉar ĝi dekobligis la distancon de la okuloj, la objektojn vidiĝi per tridimensia korpeco. Ili alproksimiĝis al la insulo tiom, ke eblus rimarki homojn helpe de la binoklo, se iuj povintus troviĝi tie.

Saltner skuis la kapon, denove rigardis tra la binoklo, forprenis ĝin kaj denove skuis la kapon.

"Sinjoroj", li diris nun, "aŭ la ĉampano plialtiĝis al mi en la kapon –"

"Ĉu la du glaso, al vi?" Torm demandis ridetante.

"Ankaŭ mi ne kredas tion, do – aŭ –"

"Aŭ? Kion vi ja vidas?"

"Aliaj estis ĉi tie antaŭ ni."

"Neeble!" vokis Torm kaj Grunthe kiel el unu buŝo.

"La ĝisnunaj raportoj scias nenion pri tia insulo – evidente niaj antaŭuloj tute ne venis trans la montaron", Torm aldonis.

"Rigardu mem", Saltner diris kaj donis la lornon al Torm. Li mem kaj Grunthe uzis siajn pli malgrandajn binoklojn. Torm senpacience rigardis al la insulo, tiam li volis diri ion, sed nur liaj lipoj ektremis kaj li restis tute muta.

Saltner denove komencis: "La insulo estas ekzakte cirkloforma – tion ni jam konstatis. Sed nun vi vidas, ke ĝuste en la centro denove troviĝas cirklo kun diametro de – ni taksas – eble cent metroj."

"Vere", Grunthe diris, "sed ne estas nur cirklo, sed cilindra malfermo, kiel oni povas nun vidi klare. Kaj ĉirkaŭ la randon de tiu gvidas speco de balustrado."

"Kaj nun vi traserĉu la randon de la insulo. Kion vi vidas?"

"Mia binoklo estas tro malforta por rimarki detalojn."

"Mi vidis tion, kion vi verŝajne celas", Torm diris.

"Sed kio estas tio", li interrompis sin, "ĉu la aerostato ŝanĝas sian direkton?"

Li donis sian binoklon al Grunthe kaj ekzorgis pri la aerostato. Tiu deviis dekstren de sia ĝisnuna kurso. Ĝi moviĝis paralele de la bordo de la insulo, ĉirkaŭante tiun en konstanta distanco.

"Ni volas konvinkiĝi, ke ni konsentas", Grunthe diris. "Ĉirkaŭ la insulo tiriĝas cirklo de pilastro- aŭ kolonospecaj altaĵoj en egalaj distancoj."

“Prave”, la aliaj diris.

“Mi nombris ilin”, Torm rimarkis, “estas dek du grandaj, inter ili po dek unu pli malgrandaj, entute cent kvardek kvar.”

“Kaj la stranga brilo super la tuta insulo?”

“Vi scias, aspektas tiel, kiel la tuta insulo estus kovrita per reto de reflektantaj metalaj dratoj aŭ reloj, kiuj iras kiel la spokoj de rado de la centro al la rando.”

“Jes”, Torm diris, elĉerpite eksidante momenton, “kaj vi baldaŭ vidos eĉ pli, se vi rigardos pli longe. Mi volas informi vin.” Lia voĉo sonis malklare kaj raŭke. “Kion vi vidas tie, tio estas la norda poluso de la tero – sed ne ni malkovris ĝin.”

“Tio ĝuste mankis”, Saltner ekscitiĝis. “Por tio ni eksidus en tiu pendolanta frostujo? Ne, kapitano, ni malkovris ĝin, kaj kion ni vidas tie, tio ne estas homfaraĵo. Neniu homo estus tiel freneza streĉi dratojn ĉi tie! Mi pli volonte kredus, ke la terakso finiĝas en granda rado de velocipedo kaj ke ni vere ŝmiru ĝin! Nur ne perdu la kuraĝon!”

“Se ne estas homoj”, Torm diris malsonore, “kaj mi ankaŭ ne scias, kiel homoj faru tian kaj kial, kaj de kie ili venus – oni eksciintus tion – do – trompo ja ne estas – do mia racio stagnas.”

“Nu”, Saltner diris, “polusaj ursoj ne estas farintaj tion, kvankam mi mirus pri nenio plu, kaj se tuj flugilhava foko venus kaj elvokis ‘stacio Norda Poluso’. Sed ĝi ja povas esti eble natura fenomeno, stranga kristaliĝa procedo! – – Ve! Nun mi komprenas. Tio estas gejsero! Giganta gejsero!”

“Ne, Saltner”, Torm respondis, “ankaŭ mi pensis tion – ŝlimvulkano povus montri ekzemple similan formadon. Sed – via jam ne vidis la esencan, la ĉefaĵon, la – neklarigeblan –”

“Kion vi volas diri?”

“Mi nun vidis ĝin”, nun Grunthe diris. Li forprenis la lornon de la okuloj. Tiam li apogis sin malantaŭen kaj sulkigis la frunton. Ankaŭ ĉirkaŭ la forte kunpremitaj lipoj sulkoj ekformiĝis tiel, ke lia buŝo aspektis kiel enkrampita minussigno. Li profunde kaj zorgoplene enpensiĝis.

Saltner ekprenis la lornon.

“Atentu la kolorigojn sur la grundo de la tuta insulo!” Torm diris al li.

“Estas figuroj!” Saltner vokis.

“Jes”, Torm diris. “Kaj tiuj figuroj reprezentas nenion alian ol ekzaktan mapobildon de granda parto de la norda hemisfero de la tero per perspektiva polusa projekcio. Vi vidas klare la formon de la gronlanda bordo, Amerikon, la Beringan Markolon, Siberion, tutan Eŭropon – kun ĝiaj tuj ekkoneblaj insuloj kaj duoninsuloj, la Mediteraneon ĝis la norda rando de Afriko, kvankam forte mallongigita.”

“Ne estas dubo”, Saltner diris. “La tuta ĉirkaŭaĵo de la poluso estas mapita ĉi tie en klara mapobildo per kolosa skalo, kaj nome ĝis ĉirkaŭ la 30a latitudo.”

“Kaj kiel tio eblas?” La demando ne trovis respondon. Ĉiuj silentis.

Intertempe la aerostato preskaŭ tute ĉirkaŭiris la insulon. Sed ĝi ankaŭ alproksimiĝis al tiu iomete. Estis klare, ke ĝi per nekonata forto, verŝajne per kirloforma movado de la aero, estis gvidata ĉirkaŭ la insulon kaj samtempe estis tirata al ĝi renkonte al la akso de la kirlo, kiu eble venas de la mezo de la insulo.

Torm interrompis la silenton. “Ni devas decidi”, li diris. “La sinjoroj volu eldiri ion.”

“Mi volas unue”, Saltner komencis, “fotografi tiun strangan mondomapon. Ĝi ŝajnas esti sufiĉe ĝusta eĉ en detaloj. Ke ĝi ne povas deveni de homa mano, ni vidas de tio, ke ankaŭ la ankoraŭ nekonataj pejzaĝoj de la polusa regiono estas mapitaj. La interna malfermo, ĉe kiu la mapo finiĝas, egalas laŭ sia ĉirkaŭo proksimume la 86an latitudon; do mankas – bedaŭrinde por ni – la sekvaj kvar gradoj ĉirkaŭ la poluso.”

“Memkompreneble”, Torm, diris “vi devas fotografi la mapon. Ni ne plu rajtas dubi havi verkon de inteligentaj estaĵoj antaŭ ni, eĉ se mi ne scipovas klarigi, kiuj estus tiuj. Sed se tio estas ĝusta, kion ni povas kontroli, do ni devas konkludi, ke ankaŭ la partoj de la polusa regiono laŭ la nordaj bordoj de Ameriko kaj Siberio estas fidinde mapitaj. Kaj tiam ni tute subite havus kompletan mapon de tiu ĝis nun neesplorita polusa regiono.”

“Nu, mi pensas, ke ni jam povas esti kontentaj pri tiu sukceso. Kaj pripensu, kiom utila la mapo povos iĝi por nia reveno. Jen –”, kun tio Saltner reportis la fotografan kameron al ĝia loko, “mi havas tri certajn fotojn. Sed ĉu la aerostato ja moviĝas pli rapide?”

“Mi ankaŭ kredas tion”, Torm diris. “Mi petas nun la opinion de la sinjoroj, ĉu ni aŭdacu alteriĝon sur la insulo por esplori tiun enigmon?”

“Mi opinias”, Saltner eldiris, “ni devas provi tion. Ni devas vidi tiujn, kun kiuj ni devas agi.”

“Certe”, Torm diris, “la tasko estas alloga. Sed estas timende, ke ni perdos tro da gaso, ke ni eble perdos la eblecon plu uzi la aerostaton. Kion vi opinias, d-ro Grunthe?”

Grunthe leviĝis el sia medito. Li parolis tre serioze: “Laŭ neniuj kondiĉoj ni rajtas alteriĝi. Mi eĉ opinias, ke ni devas nepre peni por eble plej rapide forlasi tiun danĝeran punkton.”

“En kiu vi vidas la danĝeron?”

“Post kiam ni vidis la strangan ekipaĵon de la poluso kaj la mapon de la tersupraĵo, ja na estas dubo, ke ni staras vidalvide de tute nekonata povo. Ni devas supozi, ke ni agos kun estaĵoj, kies kapablojn kaj fortojn ni ne kapablas kontraŭstari. Kiu kapablis starigi la gigantan aparaton ĉie tie en la nealirebla glacia dezerto, tiu sendube povus disponi pri ni laŭ bontrovo.”

“Nu, nu”, Torm diris, “ni ne timu pri tio.”

“Ne tio”, Grunthe respondis, “sed ni ne rajtas endanĝerigi la sukceson de nia ekspedicio. Eble estas la intereso de tiuj polusaj loĝantoj ne sciigi al la kulturlandoj pri ilia ekzisto. Tiam ni sendube perdus nian liberon. Mi opinias, ke ni devas fari ĉion eblan transdoni tion, kion ni observis, al la scienco kaj tiam lasi al sekvaj konsideroj, ĉu estas konsilinde kaj per kiuj rimedoj estas eble solvi la neatenditan enigmon de la poluso. Ni ne rajtas konsideri nin konkerantoj, sed nur skoltoj.”

La aliaj silentis penseme. Tiam Torm diris:

“Mi devas konstati vian pravecon. Nia instrukcioj vere estas laŭeble eviti alteriĝon. Ni provu urĝeme atingi loĝatajn regionojn, alproksimiĝinte al la poluso laŭeble proksime kaj difininte ĝian pozicion, kaj ni provu ekhavi superrigardon super la dispartigo de lando kaj akvo el la aerostato. Tiu aspekto devas esti decidiga. Do ni volas provi foriri de ĉi tie.”

“Sed en kiun direkton ?” Saltner demandis. “Pri tio la polusa mapo de la insulo

povus informi nin."

"Mi timas", Torm respondis, "ke de nia bona volo nur malmulte dependos. Ni devas atendi, kion la vento decidos pri ni. Unue lasu nin provi fuĝi tiun kirlon."

Intertempe la aerostato estis alproksimiĝinta pli al la insulo, kaj ĝi ekplirapidiĝis. Samtempe gi leviĝis pli super la tergrundon.

La aerostatistoj nun rigis la velon kaj donis al ĝi tian pozicion, ke la rezisto de la aero devis peli ilin al la rando de la kirlo. Sed ĉar la aerostato ŝvebis tro alte, ke la trenkablo povus kaŭzi sian malhelpan efikon, tiel la manovro devis unue malsukcesi. En pli kaj pli malvastaj spiralaj linioj leviĝante la aerostato alproksimiĝis al la centro de la kirlo kaj plirapidiĝis. Maltrankvilege la aerostatistoj observis la fariĝon. Ili hastis plilongigi la trenkablon. Ilia bonega ekipo permesis al ili uzi trenkablon de mil metroj, al kiu aldoniĝas cent kvindek metrojn longa trenzono kun flosiloj. Sed ankaŭ tiu impona etendo de la droso atingis ne ĝis la supraĵo de la akvo. "Helpas nenio", Torm vokis finfine, "ni devas pli malsupreniri."

Li malfermis la manovran valvon. La gaso emanis. La aerostato ekmalleviĝis.

"Sed ni volas", Torm diris, "ĉar ni ne scias, kiel ni savos nin ĉi tie, ja provi sendi mesaĝon hejmen. Lasu nin sendi kelkajn de niaj leterkolomboj. Nun estas la taŭga momento. Kion ni vidis, tion oni devas ekscii en Eŭropo."

Haste li skribis la necesajn notojn sur la mallarĝan strion de papero, kiun li rulvolvis kaj sigelfermis en la plumtubo, kiu kroĉiĝis al la leterkolomboj.

Saltner donis la liberon al la bestetoj. Ili plurfoje rondflugis ĉirkaŭ la aerostaton kaj tiam malproksimiĝis en direkton, kiu gvidis for de la insulo.

Torm refermis la valvon. Nun ili devis atendi ĉiun momenton, ke la fino de la trenkablo tuŝu la supraĵon de la akvo. La aerostato alproksimiĝis al sia ekvilibra stato.

Grunthe rigardis tra la relieflorno rekte malsupren, ĉar eblis per tiu instrumento vidi la larĝan sakankron ĉe la fino de la trenzono kaj taksi ĝian distancon de la grundo. Subite li hastege etendis la manon flanken, ekprenis la plej proksiman aferon, kiun li havis ĉemane – estis la botelujo kun la du ankoraŭ plenigitaj boteloj da ĉampano – kaj ĵetegis ĝin laŭ granda arko el la korbo.

"Ve, kion vi ekpensas", Saltner vokis indigne, "vi ĵetas nian bonan vinon en la akvon."

"Pardonu", Grunthe diris, ekstarante el sia klinita pozo, ĉar li rimarkis de la movo de la flagetoj, ke la aerostato denove leviĝis. "Mi pardonpetas, sed la lornon mi ja ne povis elĵeti, kaj eĉ ne duona sekundo estis perdenda – ni verŝajne estus perditaj."

"Kio ja okazis?" Torm demandis plenzorge.

"Ni ne plu estas super la akvo, sed jam rande de la insulo. La fino de la droso estis apenaŭ pli ol dek metrojn for de la supraĵo de la insulo. Ni tuŝintus ĝin, se la malleviĝo de la aerostato ne tuj ĉesintus. Bonŝance la boteloj sufiĉis por haltigi nian falon."

"Kaj ĉu vi kredas, ke ni ne rajtus tuŝi la insulon?"

"Mi ne kredas tion, mi scias tion."

"Kial?"

"Ni estus tiritaj malsupren."

"Mi ankoraŭ ne povas vidi, el kio vi konkludas tion."

“Vi ja konsentis kun mi”, Grunthe diris, “ke ni ne rajtas riski veni en la povon de la nekonataj estaĵoj – ili estu tiuj, kiuj ili volas esti –, kiuj konstruis tiun neklarigeblan aparaton kaj tiun kolosan mapon ĉe la norda poluso. Ja ne estas demando, ke tiu aparato, al kiu ni pli kaj pli estas tirata, ne staras ĉi tie lasite tute al si mem. Certe la insulo estas surloĝata, la misteraj konstruintoj verŝajne troviĝas en aŭ sub tiuj tegmentoj kaj pilastroj, kiujn ni ne povas trapenetri per niaj lornoj. Estas supozende, ke ili delonge rimarkis nian aerostaton, kaj tiel mi do konkludas, ke ili malsuprentirus tiun tuj, kiam nia trenkablo venas en la areon de iliaj brakoj.”

“Dank’ al Dio”, Saltner vokis, “ke vi koncedas almenaŭ brakojn al niaj obskuraj polusaj gastoj; estas ja homa penso, ke oni povas fali en iliajn brakojn en ekstremkazo.”

Torm interrompis lin. “Mi ankoraŭ ne povas ekkredi”, li diris, “je tia supera povo. Tio ja kontraŭdirus ĉion, kio okazis ĝis nun dum la historio de polusa esplorado, ja de la malkovraj vojaĝoj entute. Certe la mapo –, sed kion vi pensis pri tiu insulo entute? Vi parolis pri aparato, tia aparato devus havi celon –”

“Ĝi sendube havas tiun, sed ni nur ne kapablas ekkoni aŭ kompreni ĝin. Pensu, ke vi starigas eskimon antaŭ la dinamomaŝinon de elektrejo; ke la aferon havas celon, li diras al si, sed kian, tion li neniam divenos. Kiel li komprenu, ke la dratoj, kiu eliras de ĉi tie, distribuas enormajn energiamasojn trans longajn vojojn, ke ili tie produktas tagan helon, tie lasas pezajn veturilojn gliti kun centoj da homoj per facileco? Se la eskimo parolas pri la dinamomaŝino, tiel estas ĉiukaze tiom infana opinio, ke ni priridetas ĝin. Kaj por ne ludi la rolon de la eskimo rilate al tiu nekonata aparato, mi pli volonte tute ne volas paroli.”

Torm silentis penseme. Tiam li diris:

“Kio maltrankviligas min plej, estas tiu neklarigebla altira forto, kiun la akso de la insulo kaŭzas al nia aerostato. Kaj vidu, de kiam ni ne plu lasas gason emani, la aerostato denove rapide ekleviĝas. Ĉe tio ĝi estas pelita ĉirkaŭ la centron de la insulo.”

“Kaj kiu diras al vi tion, kio okazos, kiam ni venos en la akson mem? Mi opinias nian situacion vere malespera, ĉar ni nur povas veni el la kirlo, se ni lasas nin malleviĝi. Sed tiam ni venos en la povon de la nekonataj insulanoj.”

“Kaj tamen”, Torm diris, “ni devos decidi.”

Ĉiuj tri silentis. Per mallumaj rigardoj Torm kaj Grunthe observis la movojn de la aerostato, dum Saltner esploris la insulon per la lorno. Pli kaj pli svenis la detaloj, kiuj estis videblaj antaŭe, signo, ke la aerostato leviĝis per granda rapideco, eĉ se la instrumentoj, ja la pligrandiĝanta malvarmo mem, ne montrintus tion.

Jen – kio estis tio? – sur la insulo montriĝis movado, stranga lumado. Saltner vokis al la kunuloj. Ili rigardis malsupren, sed kapablis per siaj malfortaj instrumentoj rimarki nur, ke helaj punktoj moviĝis de la centro al la rando. Ŝajnis al Saltner tra lia forta lorno, kvazaŭ vico da figuroj kun blankaj tukoj faris mansvingantajn movojn, kiuj ĉiuj montris de la eno de la insulo eksteren.

“Oni donas signojn al ni”, li diris. “Rigardu ĉi tie tra la forta lorno!”

“Tio povas signifi nenion alian”, Torm vokis, “ol ke ni foriru de la akso. Sed ni mem estas tiom prudenta – ni nur ne scias kiel.”

“Ni devas malfermi la malplenigan valvon” Saltner diris.

“Tiam ni donos nin je kompato kaj malkompato”, Grunthe vokis.

“Kaj ja restos nenio alia al ni”, Torm rimarkis.

“Kaj kion damaĝos tio?” Saltner demandis. “Eble tiuj estaĵoj volas nur nian plej bonan. Ĉu ili avertus nin alikaze?”

“Estu kiel ajn – ni ne rajtas plialtiĝi”, Torm diris. “Ni ja vere estas tiregitaj alten.”

Ili jam dense estis ĉirkaŭvolvintaj siajn peltojn.

“Ni ankoraŭ atendas”, Grunthe diris, “ni ankoraŭ estas ĉirkaŭ cent metrojn for de la akso de la insulo. La malsenereco ŝanĝiĝis, ni venas en nubotavolon. Eble la aerostato finfine atingis sian ekvilibran staton.”

“Neeble”, Torm respondis. “Ni jam atingis ĉirkaŭ 4.000 metrojn. La aerostato estis en sia ekvilibra stato, kiam la pezo de la botelujo kun la ĉampanoboteloj kapablis ŝanĝi ĝian movadon. Se ĝi plialtiĝas per tia rapideco, do estas signo, ke ekstera forto gvidas nin alten, kiu estas des pli forte, ju pli ni alproksimiĝas al la centro.”

“Mi devas konfesi tion”, Grunthe diris. “Estas ĝuste, se ni troviĝus en fortokampo, kiu puŝas nin for de la tero. Ĉu ni ellasi pruvbalonon?”

“Povas diri nenion novan al ni – estas tro malfrue. Jen – ni estas en la nuboj.”

“Do malsupren!” Saltner vokis.

Torm tiregis la alteriĝan valvon malfermante ĝin.

La aerostato moderigis sian leviĝantan movon, sed ĝi ne ekmalleviĝis.

La rigardoj de la aerostatistoj estis fiksitaj al la instrumentoj. Malmultaj minutoj devis decidi ilian sorton. La gaso emanis per granda perforto en la maldensiĝintan aeron. Se tio ne baldaŭ mallevis la aerostaton, tiel estis klare, ke ili perdis la regadon de la aeromaro. Ili tiam kontraŭstaris povon, kiu pelis ilin for de la tero sendepende de la ekvilibra stato de ilia aerostato en la atmosfero.

Kaj la aerostato ne malleviĝis. Dum kelka tempo ŝajnis, ke ĝi volas resti je la sama alteco, sed la kirlanta movado ne ĉesis, kiu pelis ĝin renkonte al la akso de la insulo. Tiu akso, pri tio ja ne estas neniu dubo, ne estis nenio alia ol la terakso mem, tiu matematika linio, ĉirkaŭ kiun la rotacio de la tero okazas. Ĉiam pli forte ili estis altirataj al ĝi. Sed ju pli ili alproksimiĝis al ĝi, des pli forte la aerostato estis puŝata supren. La korpaj suferoj jam komenciĝis, kiuj akompanas la levon en la maldensiĝintajn aerotavolojn. Ĉiuj plendas pri korfrapado. Saltner devis flankenmeti la lornon, la objektoj malklariĝis antaŭ liaj okuloj. Spirmanko ekestis.

“Restas nenio alia”, Torm vokis. “La ŝirŝnuro!”

Grunthe ekprenis la ŝirŝnuron. La ŝirmekanismo servis al ŝiri strion de la balonokovro laŭlonge de la sesono de la balonoĉirkaŭo por malplenigi la balonon dum kelkaj minutoj ekstremkaze. Sed – la mekanismo ne funkciis! Li tiregis la ŝnuron – ĝi ne cedis. Ĝi devis kaptiĝi ĉe la retaĵo de la balono. Nun estis neeble ripari la difekton. La balono plialtiĝis plue. Oni povis vidi nenion de la tero, oni rigardis sur nubojn.

“La oksigenaparatojn!” Torm komandis.

Kvankam oni havis la intencon resti ĉiam je malgranda alteco, oni ja ne povis scii, ĉu la cirkonstancoj ne necesigus leviĝon al la plej altaj regionoj. Por tiu kazo oni kunportis kunpremitan oksigenon por spiri. Estis nun necese, apliki la artefaritan spiradon.

La esploristoj sentis sin nove plifortigitaj; sed la malvarmego pli kaj pli teruriĝis. Ili rimarkis, kiel iliaj membroj minacis rigidiĝi. La nazo, la fingroj iĝis sensentaj, ili provis redoni al ili la sangalfluon frotante. La aerostato sensave plialtiĝis plue, nome des pli rapide, ju pli ĝi alproksimiĝis al la centro. Sep mil - ok mil – naŭ mil metrojn la barometro montris dum kvaronhoro. La plej granda alteco, kiun iam homoj atingis, estis superita nun.

Senfare la viroj sidis dense – ili estis fermintaj la artefaritan fermon de la nacelo, ĉar ili povis ŝanĝi nenion plu ĉe la balono. Ili kapablis fari nenion, ol protekti sin kontraŭ la malvarmego. Neniu rimedo de savo montriĝis – ilia aktiveco ekmalfortiĝis influe de la detruanta malvarmego. La flugo alten ne estis haltigebla – nenio povis savi ilin de frostmorto - aŭ de sufoko. – Kio okazus? Estis ja egale.

Kaj tamen, ĉiam denove unu aŭ la alia penis rigardi la instrumentojn – la termometroj delonge glaciiĝis – kaj – apenaŭ kredeble – la barometro montris premon de ankoraŭ nur 50 milimetroj, tio signifas, ke ili troviĝis dudek kilometrojn super la tersupraĵo. Kaj nun – ĉu ne ŝajnis, kiel la balono venus malsupren al ili? La malplenigita silka kovro malleviĝis super la nacelon – la nacelo flugis pli rapide ol la balono – kiel pafite el kanono ĝi eniris en la silkon de la balono, la pasaĝeroj estis implikitaj en la ĥaoson de teksaĵo kaj ŝnuroj - jam duone senkonscie ili apenaŭ rimarkis la puŝon, kiu trafis ilin, ili venis en la akson de la kirlo venanta de la insulo. – –

Ili troviĝis vertikale super la poluso de la tero – la celo estis atingita, al kiu ili alstrebis tiom esperplene. Malproksime sub ili kuŝis la brilantaj nubostrioj en la hela sunbrilo kaj fore en la sudo la verdete briletanta lando etendita, sed la aŭdacaj esploristoj vidis neniom plu de tio. Sveninte, sufokite – premite de la pezaĵo de la balono, ili flugis, forminte senforman substancon, laŭ la direkto de la terakso renkonte al la limoj de la atmosfero.

3a ĉapitro – La loĝantoj de la marso

Enflue de la enigma forto, kiu forpelis la ruinaĵojn de la malsukcesinta ekspedicio en la direkton de la terakso for de la norda poluso, ili ricevis grandegan akcelon. La al la faldojn de la balono enpelita korbo nun moviĝis rapidege supren. Malmultaj minutoj devis sufiĉi por kaŭzi la morton de la pasaĝeroj, ĉar la fermo de la nacelo ne povis protekti ilin sufiĉe.

Ne plu videble de la tero, la stranga pafaĵo ŝajnis unuece kaj abandonite rapidegi tra la kosmo, forigite de ĉiu homa povo, ludilo de kosmaj fortoj – –

Kaj tamen la aerostato estis la objekto de plej scivola intereso.

La observantoj troviĝis ĉe loko, kie neniu homo konjektas vivantajn estaĵojn, eĉ nur kapablus kompreni tian eblecon. Ke la norda poluso estis okupita de nekonataj loĝantoj, estis ja treege strange kaj surprizante; sed ĝi ja estis punkto sur la tero, sur kiu vivantaj estaĵoj kapablis resti kaj spiri. La loko, de kiu oni nun ekatentis la akcidentan aerostaton, troviĝis jam ekster la teratmosfero. Ekzakte en la direkto de la terakso kaj sur tiu, same for de la superaĵo de la tero kiel la centro de la tero, do en alteco de 6.356 kilometroj, troviĝis libere en la spaco ŝvebante stranga artaĵo, ringoforma korpo, proksimume de la formo de giganta rado, kies ebeno kuŝis paralele kun la horizonto de la poluso.

Tiu ringo havis larĝecon de proksimume kvindek metroj kaj internan diametron de dudek, do entute diametron de 120 metroj. Ĉirkaŭ tiun, simile al la ringoj ĉirkaŭ la saturno, etendiĝis maldikaj, sed tre larĝaj diskoj, kies diametro pligrandiĝis ĝis pluaj ducent metroj. Ili formis sistemon de inerciradoj, kiu sen frotado ĉirkaŭiris per granda rapideco la internan ringon kaj ĉiam fiksis tiun en ĝia ebeno orta al la terakso. La interna ringo similis al granda cirkloforma halo, kiu formiĝis en tri etaĝoj de alteco de kune ĉirkaŭ dek kvin metroj. La tuta materialo de tiu konstruaĵo same kiel tiu de la inerciradoj konsistas el tute travidebla materialo. Tiu ja estis de eksterordinara solideco kaj komplete fermis la internon de la halo aer- kaj varmodense kontraŭ la malplena kosmo. Kvankam la temperaturo en la kosmo ĉirkaŭ la ringo estis preskaŭ ducent gradoj sub la frostpunkto de la akvo, ene de la ringoforma halo estis agrabla varmeco kaj ja iom forte maldensiĝinta, sed spirebla aero. En la meza etaĝo, tra kiu ĥaoso de dratoj, kradoj kaj vibrantaj speguloj tiriĝas, troviĝas du personoj, kiuj okupiĝis observante kaj kontrolante vicon da aparatoj.

Sed kiel eblis, ke la ringo tenis sin libere ŝvebante en la alteco de 6.356 kilometroj super la tero? Profunda ekkono de la naturo kaj ekstreme sagaca evoluo de la teĥniko kapablis konstrui tiun miraklon.

Nature la ringo subkuŝis la altiran forton de la tero kaj falintus sur la insulon

ĉe la poluso lasite al si mem. Sed ĝuste de tiu insulo al ĝi efikis forpuŝanta forto, kiu tenis ĝin ekvilibre en la distanco, kiu egalis la duondiametron de la tero. Tiu forto havis sian fonton en nenio alia ol la suno mem, kaj transformi la forton de la sunradioj tiel, ke ĝi tenis tiun ringon en la ekvilibra stato kontraŭ la tero, tion la arto de grandioze progresintaj scienco kaj teĥniko ja realigis.

En tiu alteco, terduondiametron super la poluso, la ringo estis daŭre eksponata al la sunradiado. La de la suno elradiata energio nun estis sorbata kaj kolektata de enorma amaso de areaj elementoj, kiuj troviĝis sur la supraĵo de la inerciradoj. La homoj utiligis sur la tersupraĵo ĉefe nur varmon kaj lumon de la sunenergio. Sed ĉi tie en la malplena kosmo montriĝis, ke la suno elradias nekompareble pli grandajn amasojn da energio, speciale radiojn de tre granda ondolongo, kiel la elektrajn, sed ankaŭ tiajn de pli malgranda ol tiu de la lumondoj. Ni rimarkas nenion de tio, ĉar ili plejparte jam estas sorbitaj de la plej eksteraj tavoloj de la atmosfero aŭ reflektitaj en la kosmon. Sed ĉi tie ĉiuj tiuj alikaze perditaj energiamasoj estis kolektitaj, transformitaj kaj reflektitaj en taŭga formo al la insulo ĉe la norda poluso. Sur la insulo ili estis utiligitaj, kune kun la de la insulo rekte sorbita radiado, al vico da grandiozaj faradoj; ĉar oni havis tiamaniere enormegan energiamason al sia dispono.

Parto de tiu laborforto estis nun unue uzata estigi elektromagnetan kampon de plej grandegaj forto kaj etendo. La tuta insulo kun siaj cent kvardek kvar rondaj bastionoj reprezentis kvazaŭ gigantan elektromagneton, kiu estis provizata de la sunenergio mem.. La konstruaĵo estis konstruita tiel, ke la fortolinioj koncentriĝis ĉirkaŭ la ringo kaj tiu estis tenata ŝvebante kontraŭ la gravito. Ke tio okazis ekzakte en la distanco de la terduondiametro de la poluso, rilatis al la rilato inter elektromagnetismo kaj gravito, laŭ kiuj ĝuste en tiu loko eblis estiĝi speco de nodopunkto por la onda movado de ambaŭ fortoj kaj ebligis ekvilibron.

Fakte oni zorgis per vico da komplikaj kaj plej akre elpensitaj kontrolaparatoj pri tio, ke ĉiuj balancoj de la energiamasoj estis kompensitaj ĝustatempe. Starigi tian aparaton do estus eble ĉe neniu alia loko de la tero ol en la plilongigo de ĝia rotaciakso, do super la norda poluso aŭ super la suda poluso. Ĉar ĉe ĉiu alia loko la movado de la tersupraĵo kaŭze de la taga rotacio de la tero, krom pli profundaj malfacilaĵoj, proponus nesupereblajn barilojn por la farado de la ekvilibro inter la gravito kaj la elektromagneto; ankaŭ la konstanta sunradiado mankus. Sed la poluso proponas ĉiurilate la plej facilajn cirkonstancojn, se sukcesas atingi ĝin.

Nu, la nesuperitaj inĝenieroj de la insulo kaj de la ringo ja ĉeestis. Sed de kie ili venis? Kiel ili venis tien sen tio, ke la internacia komisiono pri polusa esplorado havis la plej malgrandan scion pri tio? Kaj antaŭ ĉio – se ili ja ĉeestis –, kiu estis la celo balanci tiun libere ŝvebantan ringon super la poluso? Kaj se tiu ringo ja ĉeestis, kiel oni povis veni supren kaj malsupren?

Tiu ringo estis ja nur rimedo por atingi tute alian celon. Ĝi servis al ekhavi bazon ekster la atmosfero de la tero, stacion por efektivigi inter tiu kaj la tero nenion pli malgrandan ol – dumtempan neniigon de la gravito. La spaco inter la interna malfermo de la ringo de dudek metroj da diametro kaj la sur la insulo troviĝanta kavo, do cilindro, kies akso egalis la terakson, estis ‘sengravita kampo’. Tio signifas terenon sen pezeco. Korpoj, kiuj venis en tiun cilindran spacon, ne plu estis altirata de la tero. Tiu sengravita kampo kaŭzis, ke en la tuta ĉirkaŭaĵo de la kampo ekzistis potencialaj diferencoj en la spaco, per kio eble alproksimiĝantaj korpoj estis pelataj

en la kampon. Pro tio okazis, ke la balono de la aerostatistoj estis alvenigita iom post iom al la insulo kaj per tio neeskapeble al la sengravita kampo.

La farado de tiu kampo, en kiu la gravito estis neniigita por la interna spaco inter la insulo kaj la ringo, eblis per tio, ke oni produktis gravitan forton kontraŭ la tergravito. Estis konate al tiu polusosurloĝantoj, kiel oni povas transformi tiujn radiojn, kiuj ĉefe liveras ĥemian efikon, varmon kaj lumon, al gravito. Ili tiucele estis gvidataj ĝis en la interna parto de la ringo kaj eniris ĉi tie la 'gravitogeneratoron'. Tiu estis aparato, per kiu oni transformis varmon en graviton. Dua, same konstruita gravitogeneratoro troviĝis en la centra kavo en la interno de la insulo. Ambaŭ aparatoj funkciis kune tiel, ke la akcelo de la gravito en la interno inter insulo kaj ringo povis estis regulata laŭvole. Oni povis nur malpliigi ĝin, aŭ tute neniigi – tiam la sengravita kampo en la propra senco estis farita –, aŭ oni povas plifortigi la kontraŭgraviton tiel, ke korpoj en la sengravita kampo 'falis supren', tio signifas, ili ricevis laŭvole fortan akcelon kontraŭ la tergravito, do for de la tero. Tiamaniere eblis ekmovi kun ĉiu dezirita rapideco korpojn inter la insulo kaj la ringo, kaj de malsupre supren kaj de supre malsupren, enfermante ilin en tiucele konstruita flugveturilo.

Estis nun la malfacila tasko de la inĝenieroj ĉe ambaŭ finstacioj reguli la funkcion tiel, ke ĉiufoje la sengravita kampo havis la necesan forton por peli la veturilon supren aŭ haltigi ĝin en ĝia movado.

Kiam la aerostato de la polusesploristoj venis en la sengravitan kampon, tiu ĝuste estis agordita je 'kontraŭgravito'. Kaŭze de tio, la al la sengravita kampo puŝata aerostato, tuj kiam li venis en la akson, estis tiregata alten kun granda rapideco.

Ekstere la kampo distingiĝis de la ĉirkaŭa aero ĉe nenio. Nur forta leviĝanta aerfluo kaj kaŭze de tio flanka alfluo de aero kompreneble ekzistis. Sed ĉe la malgranda diametro de la kampo de dudek metroj la alten pelita aeramaso estis tiom malgranda, ke ne sekvis rimarkeblaj nebul- aŭ nubestiĝo, principe ĉar de la ringo kiel de la insulo tiom forta alradriado okazis, ke la eble kondensanta akvovaporo tuj gasiĝis.

Dum la aerostato ankoraŭ troviĝis en la aertavoloj ĝis unu aŭ du kilometroj, la emano de la gaso povis certagrade prokrasti ĝian leviĝon. Sed tiam la akcelo estiĝis tro granda. La nacelo, kiu troviĝis en la centro de la kampo, spertis ĉe tio pli grandan akcelon supren ol la laŭ maso ja pli malgranda, sed laŭ etendo tiom pli granda balono. Ĉar la diametro de la balono estis pli granda ol dudek metroj, ĝi elstaris parte el la sengravita kampo. Nur kiam ĝi enfalis per la perdo de gaso, ĝi venis tute en la sengravitan kampon, kaj nun komenciĝis tiu akcelata 'falo supren', kiu tiregus la aerostaton dum kvaronhoro al mil kilometroj supren, se ĝi ne estus haltigita feliĉe post apenaŭ unu minuto.

Kiam la inĝenieroj de la insulo rimarkis la aerostaton, ili unue provis teni ĝin kaptante la trenzonon. Tion Grunthe malhelpis elĵetante la ĉampanobotelojn, ĉar li volis eviti ĉiun tuŝon de la insulo. Tial la aerostato leviĝis tiom, ke ĝi ne plu povis esti kaptota, sed per tio ĝi nesaveble estis transdonita al la sengravita kampo. Ĉi tie la surloĝantoj de la insulo ja tuj povintus haltigi kaj regvidi ĝin, se ili malŝaltintus la 'kontraŭgraviton' en la kampo. Tio ne estis ebla al ili pro tio, ĉar supre de la aerostato, jam delonge ne plu videble, ilia propra flugveturilo troviĝis. Ili do ne povis ŝanĝi la kampon, antaŭ ol ilia veturilo alvenis ĉe la stacio de la ringo. Feliĉe por la pasaĝeroj de la aerostato tio devis okazi post plej mallonga tempo.

Sed intertempe ankaŭ la inĝenieroj sur la ringo, kvankam ili ne povis vidi la aerostaton, ja observis perturbon en la sengravita kampo per siaj gravitomezuriloj. Do ili sendis depeŝon de la ringo al la insulo.

Tiu transsendo proponis neniun malfacilaĵon, ĉar ili kapablis utiligi la lumradiojn mem kiel portantojn de siaj depeŝoj. La spaco inter ringo kaj insulo permesis tion pro la intensa alradiado ankaŭ ĉe la plej malseka vetero.

Ili ne nur telegrafis, ili telefonis pere de la lumradio. La elektromagnetaj osciladoj de la telefono transformiĝis en fotoĥemiajn kaj tuj estis registritaj ĉe la aparato sur la alia stacio. Dum la malfeliĉaj aerostatistoj kovritaj de la silko de la balono faris sian rapidegan veturadon sur la terakso, preterpasis ilin jena depeŝo de la ringo al la insulo:

"E najoh. Ke."

Kaj de la insulo redepeŝiĝis:

"Bate li war. Tak a fil."

Tamen oni povus trarigardi ĉiujn konatajn lingvojn de la tero sen trovi en iu ajn tiujn frazojn. Ili signifas:

"Atentu! Perturbo! Kio okazis?"

Kaj jen la respondo:

"Homoj en la sengravita kampo. Malŝaltu kiel eble plej baldaŭ."

La ricevinto de tiu depeŝo staris en la observada sekcio de la ŝvebanta ringo kaj kontrolis la aparatojn, kiuj tie estis muntitaj ĉe granda ŝaltpanelo. La montrilo de la diferenciala gravitomezurilo montris al li ekzakte la lokon, kie la flugveturilo troviĝis nuntempe. Jam tiu alproksimiĝis. Kelkaj manipuloj de la oficisto regulis la rapidecon de la veturilo, kiu aperis post malmultaj minutoj sur la finstacio. La antaŭensaltinta retkaptilo detenis ĝin, ĝi kuŝis ĉe sia celo.

La oficisto – estis la estro de la ekstera stacio mem – nomita Fru, ĝis nun forprenis neniun rigardon de la aparatoj. Oni konsiderus lin maljuna viro, ĉar longa, preskaŭ blanka hararo flirtis ĉirkaŭ sia tempio. Eksterordinare alta frunto volbiĝis super la grandaj okuloj, kies pupiloj montris profundan brilon. La teniĝo de la korpo ja estis libera kaj malpeza. Lerte li moviĝis laŭlonge de la ŝaltpanelo de unu aparato al la alia, liaj paŝoj egalis preskaŭ glitadon super la plankon. Li evidente kutimiĝis, ke la gravito estis pli malgranda ol sur la tero. Ĉar ĉi tie, en duobla distanco de la centra punkto de la tero kiel ties supraĵo, la pezeco estis nur kvarono de la de ni alkutimiĝita.

La pordo de la flugveturilo estis nun malfermata. La estro de la ringostacio nur paseme rigardis tien kaj turnis sin tiam denove al la aparatoj por telegrafi al la poluso, ke la sengravita kampo estas libera.

La pasaĝeroj eliris la veturilon kaj paŝis sur la galerion. Estis eble dek ok personoj, en stranga kostumo, kun stretaj vestoj. Iliaj eminentaj kapoj distingiĝis plej ofte ĉe tre hela, preskaŭ blanka hararo kaj brilaj, penetrantaj okuloj, kiuj nun estis ŝirmataj per malhelaj okulvitroj. Ili trapaŝis la galerion, kies superskribo diris, ke oni troviĝis sur la 'ekstera stacio de la tero', kaj turnis sin trans ŝtuparon al la elira pordo al la supra galerio . Super la pordo skribiĝis per grandaj literoj: 'Vel lo nu', tio signifas: 'Al la kosmoŝipo al la marso.'

Tiu ŝvebanta ringo estis nenio alia ol la marsa stacidomo de la tero. Ĝi estis stacio proksime de la tero, per kies konstruado eblis al la *loĝantoj de la planedo*

marso establi regulan konekton inter sia planedo kaj la tero. La pasaĝeroj de la flugveturilo estis marsanoj, kiuj volis reveni al sia hejmo.

4a ĉapitro – La falego de la aerostato

La regulado de la sengravita kampo okazis de sur la ringostacio por gvidi la leviĝantan flugveturilon kun la necesa rapideco. Sed la ŝanĝo de kontraŭgravito al tergravito etendiĝis al la tuta kampo kaj nature kaŭzis, ke ankaŭ la akcidenta aerostato subkuŝis la balancojn de la gravito. Tiel ĝi unue estis moderigita ĉe sia flugo supren, trairis tiam mallongan strekon kun konstanta rapideco, kaj de la momento, en kiu la flugveturilo atingis la ringon, la aerostato ekfalis denove kun pliiĝanta rapideco. Ĉar je tiuj altecoj rezisteco de la aero fakte ne ekzistis, tial ankaŭ nun la balono kaj la nacelo falis kun sama rapideco. La forte kunfalita balono, kiu perdis grandan parton de sia gasamaso, kovris per densaj faldoj la korbon.

Tiu cirkonstanco savis la aerostatistojn de tuja morto. Unue la kovrado en la balono protektis ilin kontraŭ frostmorto; ja la temperaturo strange plialtiĝis ene de la korbo, trafluginte la atmosferon de la tero. Tion kaŭzis la sunradiado, kiu nun per tuta forto, ne plu malhelpate de la aero, trafis la balonon. Ĝi estis sorbita de la kovro de la balono kaj varmigis ĉion, kio troviĝis en tiu.

Bonŝanco estis farinta tiel, ke parto de la gaso teniĝis en la balono, kies teksaĵo estis de tiel bonega kvalito, ke ĝi preskaŭ tute neniigis la difuzon de la hidrogeno kontraŭ la malplena spaco. La gaso povas emani nur tra la alteriĝa valvo. La nefunkciado de la ŝirmekanismo, kiu ŝajnis ilia pereo, estiĝis nun la savo de la aerostatistoj.

Per la renversado, kiun la balono spertis en la sengravita kampo, la malsupra parto de la balono estis pelita en la supran tiel, ke la valvo kuŝis kunpremite inter la faldoj kaj plia emano de la gaso estis malhelpita. Fakte ankaŭ tio ne sufiĉus longe, sed la tuta farado, de la momento, en kiu Grunthe ekprenis la ŝirŝnuron, ĝis la kunfaldado de la balono kaj tiam ĝis la malŝalto de la sengravita kampo de la marsanoj daŭris nur malmultajn minutojn.

Ĉar temis ĉe la malleviĝo de la aerostato en la sengravita kampo pri malleviĝanta korpo, la inĝenieroj de la insulo devis reguli la movadon. Ili ja ne povis vidi ĝin pro la okazinta nubokovraĵo, sed iliaj instrumentoj montris al ili ekzakte la lokon, en kiu ĝi troviĝis, kaj la rapidecon, per kiu ĝi falis. Ili donis nun en taŭga momento al la kampo tiel fortan kontraŭakcelon, ke la aerostato haltis je la alteco de proksimume tri mil metroj super la tero, ĝuste en la momento, en kiu ĝi trapasis la nubokovraĵon kaj estis observebla tra la lorno. La aerostato estis nun lasita al la kutimaj cirkonstancoj de la atmosfero. La sengravita kampo estis nun tute malŝaltita, por ke ĝi ne distingiĝis ĉe nenio de la aliaj partoj de la atmosfero. Tamen la balono perdis tiom da gaso, ke ĝi ne povis teni sin je la alteco. Sed se la aerostatistoj ankoraŭ estis vivantaj, la marsanoj rajtis supozi, ke ili de nun per elĵetado de balasto povis malplirapidigi kaj

memstare reguli sian malleviĝon.

Sed kion la marsanoj ja vidis tra siaj lornoj? La balono vere denove leviĝis super la korbon. Sed tiu mem estis premata kontraŭ la ringo kaj veninta en la ĥaoson de la ĝin portantaj ŝnuroj kaj kuŝis nun klinite al la flanko. La trenkablo ne pendis malsupren, sed estis volvita ĉirkaŭ la balono. La fermo de la korbo estis malfermita. Granda parto de la enhavo de la nacelo ŝajnis elfalinta ĉe tio. La ŝarĝo de la aerostato estis per tio tiom malpezigita, ke la restanta gasamaso tamen sufiĉis por porti ĝin, kiom ajn malgranda ĝi estis. La aerostato malleviĝis nur iom post iom kaj estis kaptita de la vento, ĉar la sengravita kampo estis malŝaltita. Tiel la aerostato ŝvebis for de la insulo super la enlandan maron, preskaŭ en la kontraŭan direkton ol tiu, el kiu la aerostatistoj venis.

La marsanoj ekkonis nun, ke la pasaĝeroj de la aerostato perdis ĝian kontrolon. Sed kion ili povis fari por ilia savo? Ili certe povintus kaŭzi per farado de la sengravita kampo, ke la aerostato devis denove alproksimiĝi al la centro, sed ili ja male volis forigi ĝin de la insulo. Ĉar ili ne pli longe rajtis lasi malhelpi sian trafikon kun la ringostacio per tiu fremda korpo.

Kiam la marsanoj konsilis, la aerostato jam superflugis la insulon kaj troviĝis super la maro. Samtempe ĝi malleviĝis al proksimume du mil metroj. Ĉu ĝi atingus la transan bordon? Ĉu ĝi falus en la maron? Aŭ ĉu ĝi disrompiĝus ĉe la rokomuro de la krute falanta bordo? La lasta ŝajnis la plej probabla, se ne sukcesis aŭ eklevi aŭ rapide ekmallevi la aerostaton.

En la duone renversita nacelo de la aerostato aspektis ĥaose. La instrumentoj parte detruitaj, la korboj kaj kestoj rompitaj, provizoj kaj homoj en ĥaosa amaso, nur malhelpitaj de elfali de la reto de la multfoje interligitaj ŝnuroj.

Vekite de pikanta doloro en la dekstra piedo, Grunthe malfermis la okulojn. Li vidis sin je lia surprizo rande de la korbo, kiu estis interligita kun la ringo ĉe unu flanko, kunpremita inter ties plektaĵo kaj unu de la ankroj. Tiu vundis lin ĉe la piedo. Rapide Grunthe revenis al plena konscio. Li povis movi nur sian superan korpon kaj la brakojn. Rigardo al la stato de la aerostato timigis lin, ke estus neeble, gajni la altecon de la montaro trans la maro. Sed sub li kuŝis la areo de la maro. Plenzorge li ĉirkaŭrigardis al siaj kunuloj. Tormon li nenie kapablis eltrovi. Sed nun li vidis, kiel sub rompita korbo kaj amaso da kovriloj io moviĝis kaj kapo kun malhelbruna, bukla hararo ekvidiĝis. Estis Saltner, kiu same vekiĝis el sia sveno. Saltner, kiu sciis nenion pri la stato de la aerostato, pruvis liberigi sin el sia malkomforta pozicio. Sed Grunthe ekkonis, en kiu danĝero la vojaĝkunulo estis. Ĉiu plua movado povis elĵetegi lin el la korbo kaj lasi lin fali malsupren.

“Kuŝu senmove”, li vokis al li, “agu tute trankvile – la korbo estas renversita – firmtenu vin!”

“Ve”, Saltner grumblis sub la kovrilo, “ja kuŝu vi senmove, se vi sidiĝas sur rompita ĉampanobotelo! Se ni nur fintrinkintus la tutan aĵon tuj kaj elĵetintus la malplenan botelon!”

Ĉe tio li ĵetis sin per ekpuŝego flanken, sed samtempe li ekruliĝis.

Grunthe ekkriegis pro teruro. Li vidis la kunulon ŝvebantan je la plej ekstera rando de nacelo – Saltner etendis la brakojn en la aeron, sed li ne trovis apogon – la korpo elfalis – liaj genuoj pendiĝis en maŝo de ŝnuro – en tiu terura pozicio, kun la kapo malsupren, Saltner ŝvebis pli ol mil metrojn super la nivelo de la polusa maro.

En la ekscito de la momento Grunthe tordis sian korpon, per ambaŭ manoj sin firmtenante, tiom perforte, ke li sukcesis eltiregi sian piedon de sub la ankro. Li ne atentis la doloron; kiel eble plej rapide, kvankam per granda singardo, li grimpis laŭ la drosoj de la korbo al Saltner. Li serĉis ŝnuron, kiun li povis alĵeti al li por retiri lin en la nacelon. Sed kie en tiu ĥaoso de ŝnuroj estis taŭga droso tuj trovebla? Ĉi tie vasta maŝo pendis. Li eksvingis ĝin, li tiregis ĉe tiu, kaj li sukcesis venigi la droson ĝis la proksimeco de Saltner.

Feliĉe tiu perdis dum neniu momento sian spiritpretecon. Kiam li vidis la droson en la areo de siaj manoj, li ekprenis ĝin. Li sukcesis firmteni sin, kaj nun li provis pene regrimpi supren laŭ la droso al la nacelo. Jam li troviĝis en rekta pozicio. Prenante la ŝnuron pli alte per la manoj, li tiris siajn piedojn el la maŝo, en kiu li restis pendinta, kaj metis ilin sur la randon de la korbo. Subite super li ekmuĝis kaj ekkrakis. La ŝnuro, ĉe kiu li firmtenis sin, estis parto de la super la balonon falinta trenkablo. Ĝi nun malligiĝis kun sia libera fino de la balono kaj glitis malsupren. Saltner havis ankoraŭ preskaŭ tempon firmkroĉi sin ĉe la nacelo, kiam la ŝnuro rapidegis malsupren en sia tuta longeco. Sed transglitante trans la balonon, ĝi implikis kun la ŝirŝnuro kaj tiris ĝin perfortege kun si. Nun la disŝirmekanismo ekfunkciis. La balonokovro disstaris. La gaso emanis ŝuŝante. La aerostato turniĝis ĉirkaŭ sian akson kaj ekfalis kun rapidegeco.

"Supren en la ringon", Grunthe vokis. "Ni devas provi fortranĉi la nacelon."

"Sed kie estas Torm?" Saltner vokis.

Ili vokis, ili kriis, ili serĉis – Torm ne estis trovebla. Tamen estis eble, ke li ankoraŭ troviĝis en la korbo – do ili ne rajtis apartigi tiun de la balono, ili ankaŭ ne plu povis traserĉi ĝin –

"La paraŝuton, la paraŝuton!" Grunthe vokis denove.

"Ĝi estas for!"

La aerostato kirliĝis malsupren –

Bato, ŝaŭmado kaj ŝprucado – la maro kunfrapiĝis super la nacelo kaj ĝiaj pasaĝeroj – –

Kiel giganta testudo la kovro de la balono flosis, plenbloviĝante, sur la akvo, la tutan ekspedicion sub si entombigante.

5a ĉapitro – Sur la artefarita insulo

La milda lumo de la polusa tago brilis tra la larĝaj fenestroj de alta ĉambro, kiu estis meblita laŭ la stilo de la marsloĝantoj. Laŭlonge de la plafono tiriĝis granda nombro de metalaj strioj, kiuj entute reprezentis plaĉan dizajnon. En la mezo ili fermiĝis al rozeto, de kiu multnombraj dratoj gvidis malsupren kaj finiĝis en ŝrankosimila surmetaĵo. Tiu surmetaĵo troviĝis sur granda ronda tablo kaj portis ĉe sia ekstera rando ĉirkaŭe vicon de kejloj aŭ manteniloj; surskribaĵoj super ili markis ilian celon. La la fenestrojn kontraŭstaranta muro estis kovrita ambaŭflanke de la larĝa meza pordo de skulptitaj bretaroj, kiuj servis al la tenado de multampleksa biblioteko. La liberan spacon super ĝi ornamis pentraĵoj; ili montris vidaĵojn de la marso. Tamen oni povus kredi vidi tra vico de malfermoj plastikajn artaĵojn, aŭ pli ĝuste la naturon mem. Ĉar la nuancoj de la koloroj estis tiom intensaj, ke ili donis iluzion de kompleta realeco. Oni vidis en pejzaĝo la rebrilon de la sunradioj sur la marĉa grundo kiel lumantajn stelojn, kaj tamen oni povis distingi en la profunda ombro de la gigantaj arboj la plej fajnajn nuancojn. Super la pordo lumis la nature granda busto de Imm, la senmorta filozofo de la marsanoj, kiu malkovris al ili la doktrino de numeeco.

Ĉe la fenestra flanko ekfloris strangaj kreskaĵoj en pelvetoj. La plej stranga el tiuj estis la dancanta floro 'Ro-Wa', lilisimila planto, kies longaj florstangetoj moviĝis serpentosimile tien kaj reen kaj daŭre faris graciajn movadojn kun siaj gracilaj burĝonoj, samtempe aŭdigante mallaŭtan pepadon kiel de birdovoĉoj. Inter la florotabloj staris unuflanke tajpilo, aliflanke aparato, kiu estis neniu alia ol maŝino por farado de malfacilaj matematikaj kalkuladoj.

La fenestroj etendiĝis ĝis la planko de la ĉambro. Tamen ŝajnis, ke tiriĝus tegaĵo laŭlonge de tiuj proksimume ĝis la alteco de unu metro. Sed strange, tiu tegaĵo briletis en malhela verdo kaj lante ondis supren kaj malsupren; kaj kelkfoje ekbrilis pli malgrandaj kaj pli grandaj fiŝoj en ĝi kaj puŝis siajn kapojn kontraŭ la vitraĵoj. Estis la maro, kiu enrigardis la ĉambron ĝis metralteco super la planko. Ĉar tiu ĉambro troviĝis ĉe la ekstera rando de la insulo, kiun la akcidenta ekspedicio de Torm vidis ĉe la norda poluso de la tero.

Tamen natura insulo ne estis tiu instalaĵo de la marsanoj. Pli ĝuste, ili estis konstruintaj en la enlandan maron, kiu troviĝas ĉe la norda poluso, artefaritan insulon, pli vere flosantan floson de granda etendo, kiu devas porti ilian kampon de gigantaj elektromagnetoj. Ĉar tiujn elektromagnetojn ili bezonis por la balancado de sia ekstera stacio kaj per tio por la farado de la sengravita kampo. Ĉe la interna rando de ringoforme konstruita flosego troviĝis la labormaŝinoj kaj aparatoj, kontraŭe la

ekstera rando servis kiel loĝejoj kaj staplo de ĉiuj provizoj kaj iloj, kiujn la marsanoj kolektis ĉi tie iom post iom, por prepari la konkeron de la tero ekde la norda poluso.

Trans la ŝtuparon, kiu gvidis de la tegmento de la insulo al la koridoro kaj la najbaraj loĝoĉambroj, malsupreniris ina estaĵo. Apogite sur la apogrelo ŝi pene moviĝis, kiel malsupren klinite per peza ŝarĝo. Ŝi dolore ektremis tiom ofte, kiom ŝia piedo tuŝis la sekvan pli malaltan ŝtupon kun konvulsia surtrafo. Post tio ŝi trapaŝis egale peze kaj pene la koridoron, subtenante sin ankaŭ per la manoj ĉe unu de la apogreloj, kiuj tiriĝis laŭlonge de la koridoro. Nun ŝi tuŝis la pordon de la ĉambro, kiu senbrue enrulis en sin mem, kaj enpaŝis. La pordo memfermiĝis post ŝi.

Subite la pozicio de la estaĵo estis ŝanĝita. Malpeze kaj forte ŝi ekleviĝis. Per gracia movado ŝi ĵetis la kapon malantaŭen kaj profunde spiris kelkfoje. Ŝi glitis kelkajn paŝojn tra la ĉambro; ne plu klinite kaj pene, sed kiel ŝvebante ŝi trairis la ĉambron en gracia pozicio kaj rigardis sur la tablo al la ciferplato, kiu montris la staton de la pezeca premo en la ĉambro. Hela ekbrilo de ŝiaj grandaj, brilantaj okuloj signus ŝian kontenton, ĉar ŝi korektis apenaŭ rimarkeble la pozicion de mantenilo, per kiu ŝi povis reguli la en la ĉambro regantan graviton. Forko de la sengravita kampo ebligis al la surloĝantoj de la insulo adapti siajn loĝoĉambrojn al la pezecaj cirkonstancoj, kiujn ilia konstitucio postulis. Ĉar la gravito sur la marso estas nur triono de tiu sur la tero.

Nun ŝi deŝovis per facila movo la varman kovron, kiu kovris ŝiajn ŝultrojn, sen rigardi malantaŭen ŝi ĵetis tiun tie, kie ŝi ĝuste staris, senatente alten. De sia kapo ŝi malligis la kapoton, kiun ŝi estis portinta ekstere, kaj puŝegis ĝin ankaŭ sencele en la aeron. Ĉe siaj gantoj ŝi premis butoneton kaj etendis siajn manojn kun disetenditaj fingroj iom alten, post kio la gantoj memdeŝoviĝis kaj leviĝis. Ĉiuj tiuj alten ĵetitaj objektoj flugis mem al angulo de la ĉambro, malfermis tiean klapon kaj glitis malantaŭ la muro sur la al ili deciditajn lokojn, dum la klapo refermiĝis. Ili ĉiuj estis subŝtofitaj per de la marsanoj malkovrita ŝtofo, kiu lasis sin manipuli kiel specon de planta fibro, sed estis altirata laŭ ekstreme forta maniero, kiel la fero de la magneto, de por tio instalita aparato. La altiranta forto ekagis, tuj kiam la konekto estis malligita, kiu fiksis la objektojn sur la korpo. Ĉe la en la ĉambro reganta malgranda pezeco sufiĉis ĵeti la objektojn per malforta ekpuŝo alten; kie la aŭtomata vestejo faris la ceteron. Tiel estis facile por la marsanoj konservi la ordon de siaj aferoj. Ĉar per la konstruo de la diversaj malfermoj, kiujn la vestaĵoj devis pasi, dum ili falis denove malsupren ene de la vesteja ŝranko, ili estis aŭtomate ordigitaj, purigitaj kaj enmetitaj en la al ili deciditajn fakojn, por ke ili estis tuj denove ĉemane por komforta uzo.

Sen zorgi pri la demetitaj vestaĵoj la damo alproksimiĝis al la librobretaro kaj eltiris unu el la tie starantaj libroj ekkaptante ĝin ĉe ĉe ĝi troviĝanta mantenilo. Ŝi iris kun ĝi al la sofo kaj etendiĝis en komforta pozicio.

La estis la filino de la inĝeniero Fru, la estro de la ekstera stacio. Se ŝi vivintus sur la tero, tiel ŝia vivaĝo estus kalkulenda je pli ol kvardek jaroj. Sed kiel loĝanto de la marso, kies jaroj estas duoble pli longaj ol tiuj de la tero, ŝi aĝis nur kelkajn dudek somerojn kaj staris florante en sia juneco. Ŝia plena hararo, kiun ŝi portis plektita en nodo, havis sur la tero ja ne facile troveblan koloron, helan, iomete ruĝete briletantan blondon, iel kompareblan kun la te-rozo; en ravanta delikateco ĝi leviĝis kiel krono super la blanka, pura koloro de ŝia fajna vizaĝo. La grandaj okuloj, kiuj

estas siaspecaj al ĉiuj marsanoj, ŝanĝiĝis laŭ la lumigo de luma bruno ĝis profunda nigro. Ĉar laŭ la fortaj diferencoj de heleco, kiuj regas sur la marso, ties loĝantoj posedas tre vastan akomodokapablon, kaj ĉe malforta lumo iliaj malhelaj pupiloj plivastiĝas ĝis la rando de la palpebroj. La mienludo gajnas per tio surprizantan viglecon, kaj kutime nenio fascinis pli la homojn ĉe la marsloĝantoj, post kiam ili ekkonis ilin, ol la eksprimplena rigardo de iliaj grandegaj okuloj. En ili montriĝis la enorma supereco de la intelekto de tiu pli altan kulturon ĝuanta estaĵo.

Kiel malpeza nubo ĉirkaŭkovris multfalda vualo la tutan korpon kaj lasis nur la noble formitan kolon kaj la malsuprajn partojn de la brakoj malkovrataj. Sed sub tio briletis la formoj de la korpo kiel vestita en brilanta kiraso; ĉar fakte la streta robo konsistis el metala teksaĵo, kiu, kvankam ĝi plej komforte adaptiĝis al ĉiu movado kaj cedis la plej malfortan premon, tamen formis kirason de plej granda fortikeco.

La libro, kiun La prenis de la biblioteko, havis kiel ĉiuj libroj de la marsanoj la formon de granda ardezotabuleto kaj oni tenis ĝin ĉe mantenilo simile kiel ventumilon tiel, ke la pli longa rando kuŝis malsupre. Premo de la fingro sur tiu tenilo efikis, ke la libro malfermiĝis supren, kaj je ĉiu plua premo paĝo sur paĝon turniĝis de malsupre supren. Tiamaniere oni bezonis nur unu manon por teni la libron, foliumi kaj elekti ĉiun ajn paĝon.

La ŝajnis ne esti hastema studante. Ŝi tenis la libron fermitan en la leĝere malsupren pendanta mano kaj revis sekvante siajn pensojn. Post kelke da tempo ŝi ekmovis la lipojn kaj mallaŭte ekdiris sonojn, kiuj evidente faris ne malgrandan penon al ŝi. Iafoje ŝi mallaŭte ridis pro si mem, kiam unu el la fremdaj vortoj ne volis pasi la lipojn, aŭ momente esprimo de senpacienco iris trans ŝiajn trajtojn. Ŝi ripetis laborkvanton, kiun ŝi ellernis por si mem. Sed nun ŝi tute stagnis kaj meditis iom da tempo. Tiam ŝi mallaŭte diris:

"Estas ja stulta volapukaĵo, kiun tiuj Kalalekoj parolas!"

Nur nun ŝi levis la libron kaj lasis la foliojn turniĝi per granda rapideco, ĝis ŝi trovintis la deziratan lokon.

La libro enhavis kompilaĵon de ĉio tio, kion la marsanoj povintis ekscii ĝis nun pri la vivmaniero kaj la lingvo de la eskimoj. Per la eskimofamilio, kiun ili estis trovintaj kaj nutris sur sia stacio, ili sukcesis esplori la lingvon de la eskimoj. Ili ja eĉ konis la reprezentadon de nombro de vortoj per latina presliterskribo; ĉar la pli juna de la du eskimoj estis pasinta iom da tempo sur misistacio en Gronlando kaj posedis gronlandan tradukon de la Nova Testamento, en kiu li scipovis literumi. La studis la gramatikon kaj la vortaron de la eskimoj aŭ 'Kalalek'.

Mallaŭte dirinte vicon de vortoj kaj proverboj ŝi ekdubis, ĉu ŝi bone trafis ankaŭ la ĝustan elparoladon. La revizio estis facila; ŝi bezonis nur meti la recivilan platon de la gramofono sur la koncernan lokon de la libro por aŭdi la sonon mem; ĉar la libro enhavis ankaŭ la sonregistraĵojn de la rekte de la buŝo de la eskimoj registritaj vortoj. Sed la gramofono, kiu aŭdigis la sonregistraĵojn, troviĝis en la ŝrankosurmetaĵo de la tablo, kaj ŝi devis ekstari de la sofo por tiu celo; tio estis tro malkomforta por ŝi.

Aĥ, ŝi pensis, estas ja tro mallerte aranĝita mondo! Ke oni eĉ ne alvenis tie, ke la memparolilo alkuras al oni!

Tamen la gramofono ne venis. Do La restis kuŝanta kaj kontentiĝis metante la libron apud sin sur tableto. Estas vere sufiĉe superflue, ŝi plupensis sian pensaron, tiom peni pri la eskima lingvo. Tiuj eskimoj ja estas trista socio, kaj la odoro de

balenoleo estas neeltenebla. Certe la tero estas surloĝata ankaŭ de estaĵoj de pli fajna maniero, kiuj verŝajne porolas tute alian lingvon. Eĉ nia juna Kalaleko ja scias rakonti kun mirego pri la saĝeco de siaj piaj patroj, kiuj donis al li la libron en la stranga skribo. Se ni unue trovus okazon interkomuniki kun tiaj homoj, tio pli valorus la penon. Kia estis tiu aerostato, kiu hodiaŭ tiriĝis trans la insulon kaj tiam malaperis en la alteco. Ene ja troviĝis certe neniuj eskimoj. Kio okazis al la aerostatistoj?

La rigardis supren. Sur la muro la klapo de la telefono estis falinta malsupren per malforta bato.

"La, ĉu vi estas tie?" demandis virina voĉo per la duonlaŭta tono de la marsanoj.

"Ĉi tie mi estas", respondis La per sia malalta, malrapida parolmaniero.

"Ĉu estas vi, Se?"

"Jes, estas mi. Hil lasas peti vin tuj veni en la gastoĉambron 20."

"Jam denove eksteren en la pezecon. Kio ja okazis?"

"Io tre speciala, vi vidos ĝin baldaŭ."

"Ĉu ni devas iri eksterdomen?"

"Ne, vi ne bezonas pelton. Sed venu tuj."

"Nu bone, mi venas."

La klapo de la telefono fermiĝis.

La ekstaris kaj alglitis per sia ŝvebanta paŝado al la pordo. Ŝi malfermis ĝin kun mallaŭta ĝemeto, ĉar ŝi iris ne volonte tra la koridoroj, sur kiuj tergravito regis tiel, ke ŝi povis nur kliniĝinte kaj pezece paŝi.

Tamen ŝi estis scivolema pri tio, kio speciala estu okazinta sur la insulo. Ĉu estis alvenintaj novaj gastoj de la marso? Aŭ ĉu la aerostato montriĝis denove?

*

Kiam la detruita aerostato falegis en la maron, la marsanoj de la insulo jam estis sidigintaj virojn en sian ĉasadan boaton, per kiu ili kutime traesploris la polusan enlandan maron. De baterioj pelata propelo donis al ĝi eksterordinaran rapidecon. Ses marsanoj sub la gvido de la inĝeniero Jo estis sidiĝinta en ĝi; ankaŭ la kuracisto de la stacio, Hil, troviĝis ĉe ili. Ĉiuj portis la kapojn en kaskosimila kovro, kiu kaj plifaciligis al ili iliajn movadojn en la aero kaj servis samtempe kiel subakva kasko. La kaskoj estis nome el kontraŭgravita, tio estas senpeza materialo kaj tial havis neniun pezon por siaj portantoj. Samtempe ili enhavis en sia kupolo sufiĉe konsiderindan senaeran spacon, ke ili efikis kompreneble nur malgrandan tirforton supren. Tamen tiu sufiĉis malgrandigi la pezon de la kapo tiom, ke la muskoloj de la nuko estis malŝarĝitaj kaj la marsanoj kapablis movi sian kapon preskaŭ tiel libere kiel sur la marso, eĉ se nekutima korpa pezeco ŝarĝis ilin. Ĝuste pro tio ili portis skafandrojn por transloki malfacilajn laborojn en la akvon. Ĉar ĉi tie la natura suprenforto de la akvo prenis la ŝarĝon de ilia korpa pezo de ili.

Rapide la ĉasada boato alproksimiĝis al la aerostato, kiun la restetoj de la ankoraŭ en ĝi enhavata hidrogeno kaj la aero, kiu estis kaptita sub ĝi, tenis flosanta sur la akvo. Por atingi la de la silko de la balono kovritan korbon, la marsanoj subakviĝis kaj penetris de la akvo ĝis sub la balonon. Ili tuj trovis la akcidentajn homojn kaj portis ilin plej rapide en sian boaton. Tiam ili disigis la nacelon de ĝiaj ligoj kaj kunprenis ĝian tutan enhavon ankaŭ en la boaton. Ĉion ceteran ili lasis provizore flosi, ĉar unue estis grave por ili porti la trovitajn homojn en sian loĝejon.

Saltner kaj Grunte suferis krom la vundo, kiun la lasta estis suferinta ĉe la piedo antaŭ la falego, neniujn pluajn lezojn pro la falo. Sed ili ne sukcesis eskapi el la akvo. Neniu montris vivosignon. Intertempe la marsanoj komencis laŭ la instruado de la kuracisto la plej intensajn revivigprovojn, ŝajne sen sukceso.

"Nun vi havintus", Jo diris, "finfine kelkajn verajn Bateojn, kiuj ne estas Kalalekoj, kelkajn civilizitajn teranojn, kaj nun la povruloj devas esti mortaj."

"Ni ankoraŭ volas esperi", respondis unu el la marsanoj. "La korpo jam estas varma. Eble la Bateoj havas persisteman vivon."

"Estintus granda bonŝanco", Jo komencis denove, "se ni povintus savi ilin. Ne estas nur aŭdacaj homoj, estas videble speciale elstaraj viroj de sia popolo, alikaze ili ne estus elektitaj por tiu grandioza farado."

"Mi tute ne sciis," diris alia, "ke la Bateoj havas aerostatojn."

"Tiaj aerostatoj jam plurfoje estis observitaj", Jo respondis, "sed oni ne certe sciis, al kio ili servas, almenaŭ ne, ke la Bateoj levas sin mem en la aeron. Mi ĉiam pensis, ke ili lasas per tio levi iujn ŝarĝojn super la teron aŭ tiri ilin. Egale, por ni gravas, ke ni ricevas pli detalajn informojn pri la kulturaj regionoj de la tero. Ĉiuj niaj planoj do estus esence subtenotaj. Hil, provu vian tutan arton."

La kuracisto ne respondis. Lia atento koncentriĝis al la penoj reaktivigi la spiradon de la dronintoj.

Finfine li ekstaris.

"Donu plenan energion!" li vokis al Jo. "Ekzistas eta espero, sed ĉi tie ekstere ni ne savos ilin. Ni devas esti en la loberejo post unu minuto."

La boato rapidegis tra la akvamaso. Post dek sekundoj ĝi atingis la insulon. Ĝi pafiĝis tra la eniro en la internan havenon. Tuj la akcidentaj personoj estis levitaj kaj portitaj en la malsanulan sekcion. Ne estis facila tasko, ĉar ĉiu el la du viroj havis, laŭ la kapablo de la marsanoj levi ŝarĝojn, pezon, kiu egalas tian de kvin centfuntoj. Ili povintus uzi siajn gruojn, sed tio daŭrintus tro longe. Gravis ja nur levi la akcidentajn personojn trans la sojlon de la pordo. Tiam la efiko de la sengravita kampo efektiviĝis, kaj la transporto ne plu havis problemojn.

Hil tuj komencis la kuracon per ĉiuj rimedoj de la marsa kuracarto. Li jam havis kelkajn spertojn el la studado de la eskimoj kaj el tio ekkonis la diferencojn en la fukciado de la organoj ĉe homoj kaj ĉe marsanoj, kiuj cetere estis tute ne tiel gravaj, kiel oni povus pensi. Al la penetranta akra rigardo de la marsano sufiĉis la konkludoj, kiujn li povis tiri el la akirita sperto por ĝuste decidi.

La loĝantoj de la insulo, se ili ĝuste nun ne okupiĝis pri urĝa laboro, intertempe estis interesiĝintaj plej vigle pri la trovitaj homoj. En la antaŭcambro de la malsanula ĉambro personoj venadis, foriradis kaj demandadis, la klapoj de le telfonaj konektoj leviĝis kaj malleviĝis, sed ankoraŭ ĉiam oni povis ekkonis nenion konkretan.

Finfine, post duona horo de intensa farado, Hil ekparolis. Li turnis sin al la direktoro de la stacio, Ra, kiu starante apud li atente rigardis la strangajn, kiel morte kuŝantajn estaĵojn, kaj diris:

"Ili vivos."

"Ha!"

"Sed estas dubende, ĉu ni realportos ilin al konscio ĉi tie. Ni devas krei cirkonstancojn, kiuj konformas al iliaj vivkutimoj. Antaŭ ĉio ni ne rajtas deteni la pezecon de ili, kaj mi kredas, ke ankaŭ la temperaturo de la ĉambro devas esti pli alta."

"Bone", Ra respondis, "ni ja havas sufiĉe da gastĉambroj, ni ja povas loĝigi ilin ĉe la ekstera flanko, apud niaj loĝejoj. Mi tuj ordonos la necesan."

Tuj kiam Ra eniris la antaŭĉambron kaj informis prj la esperplena eldiro de la kuracisto, la novaĵo propagiĝis tra la tuta insulo. La Bateoj, kiuj estis neniuj eskimoj, estis la centro de ĉiuj interparoladoj, kvankam nur la plej malmultaj marsanoj estis vidintaj ilin. Cetere ke iu, kiu ne partoprenis la flegadon, volintus sciovoleme enpenetri, tio memkompreneble ne povis okazi ĉe la fajna diskreteco de la marsanoj.

La du savitoj estis loĝigataj separate en taŭgaĵ ĉambroj kaj oni lasis ilin tute ripozi.

Dum horoj ili kuŝis en profunda dormo.

6a ĉapitro – En la flegado de la feino

Saltner ekmalfermis la okulojn.

Kion li vidis super si, ĉu tio estis la retaĵo de la balono? Ĉu tiuj regulaj, ore briletantaj arabeskoj sur lumblua fono? Ne, la balono ĝi ne estis – ankaŭ la ĉielo ne askpektas tiel – tamen – kio estis okazinta? Li ja estis falegita en la akvon. Ĉu aspektas tiel malsupre sur la maro? Sed en la akvo oni estas morta aŭ – li turnis la kapon, sed la okuloj refermiĝis al li. Li volis pripensi, sed la demandoj estis tro malfacilaj por li, li sentis sin tiel senforta – – nun li rimarkis, ke li tenis objekton inter la lipoj, tubeton. – Ĉu tio ankoraŭ ĉiam estis la buŝajuto de la hidrogena aparato? Ne. – Stranga odoro ĉirkaŭblovis lin – instinkte li suĉis ĉe la tubeto, ĉar li sentis brulantan soifon. Aĥ, kiel bonfara tio estis! Malvarmeta refreŝiganta trinkaĵo! Ne estis vino – ankaŭ ne lakto –, egale, ĝi bongustis – ĉu tio estis eble nektaro? Liaj sensoj perturbiĝis denove. Sed la trinkaĵo efektis mirakle. Nova vivo fluis tra liaj vejnoj. Li povis denove malfermi la okulojn. Sed kion li ekrigardis? Do li ja estis en la akvo?

Super li, pli alte ol lia kapo, la ondoj de la maro muĝis. Sed ili ne penetris al li. Travidebla muro disigis ilin de li, fortenis ilin. La ŝaŭmo ŝprucis alten laŭ ĝi, la lumo refraktiĝis en la ondoj. Tamen li ne povis vidi la ĉielon, suntegmento ŝirmus ĝin. Iam kaj iam fiŝo obtuze puŝiĝis kontraŭ la vitraĵoj. Sensukcese Saltner provis klarigi sian situacion. Unue li kredis troviĝi sur ŝipo, kvankam mirigis lin, ke en la ĉambro ne la plej malgranda movado estis sensebla. Sed nun li rigardis iom pli flanken. Ĉu ja ne plu estis tago? La ĉambro ja estis heligita de taglumo, sed tie maldekstre li rigardis rekte en malluman nokton. Al li nekonata konstruaĵo en neniam vidita stilo kuŝis en la lunobrilo antaŭ li. Li rigardis sur ties tegmenton, kiu estis limigita de la suproj de strangaj arboj. Kaj kiel strangaj estis la ombroj –! Saltner provis antaŭenkliniĝi, levi la kapon. Tie staris vere du lunoj sur la ĉielo, kies radioj kruciĝis. Sur la tero io tia ne ekzistis. Sed pentraĵo ja ne povis montri tiom fortajn lumdiferencojn – ĝi do devus esti diafana bildo –

Per la mallaŭta brueto, kiun ĝia movado kaŭzis, la pejzaĝo subite flankenŝoviĝis. Figuro apogiĝis en seĝego kaj rigardis al Saltner per grandaj, brilantaj okuloj. Momenton li irite fiksrigardis tiun novan aperon. Li kredis neniam antaŭe esti vidinta tiel grandiozan virinan vizaĝon. Rapide li volis ekstari, kaj nur nun li rigardis sian propran korpon. Videble oni estis baninta lin dum lia senkonscieco kaj donis al li freŝajn subvestaĵojn. Li trovis sin vestita en malstreta matena robo el al li nekonata ŝtofo.

Nun la figuro etendis manon kaj turnis unu el la butonoj, kiuj troviĝis apud ŝi

sur tablo. En la sama momento senso trakuris tra Saltner, kiel oni subite volus levi lin alten. La mano, kies pozicion li volis ŝanĝi, moviĝis iomege pli alten, ol li intencis levi ĝin. Per facileco li levis la supran parton de sia korpo, sed ĉe la ekpuŝo ankaŭ siaj kruroj ekflugis en la aeron, kaj per surprizanta rapideco li faris kelkajn neintencajn gimnastikajn ekzercojn, ĝis li sukcesis balanciĝi en sidanta pozicio sur sia lito.

Samtempe la ina figuro ekstaris kaj ŝvebis renkonte al li. Korgajnanta rideto kuŝis sur ŝiaj trajtoj, kaj el la grandiozaj okuloj parolis la plej profunda kunsento.

Saltner volis ekstari, sed li rimarkis jam ĉe la unua altiro de sia piedo, ke li endanĝeriĝis ekrapidegi en nedeterminitan altecon. Malgranda manmovo de la antaŭ li staranta figuro signalis al li residiĝi. Nun finfine li retrovis la lingvon en kutima vigleco.

"Kiel vi ordonas", li diris. "Estus granda honoro por mi, se ankaŭ vi volus sidiĝi kaj bonkore indikus al mi, kie mi verdire troviĝas." Ĉe tiuj vortoj la figuro aŭdigis mallaŭtan, arĝentan ridon.

"Li parolas, li parolas!" ŝi vokis en la lingvo de la marsanoj. "Estas tro amuze!"

"Fafagolik?" provis Saltner rediri la fremdajn sonojn. "Kia lingvo estas tio aŭ kia regiono?"

La marsanino ridis denove kaj amuze rigardis lin ĉe tio tiel, kiel oni rigardas strangan beston atentante.

Saltner ripetis sian demandon france, angle, itale kaj eĉ latine. Per tio lia lingvaro elĉerpiĝis. Ĉar evidente la fremdulino ne komprenis lin kaj li ankoraŭ ne ricevis respondon, li diris denove en la germana:

"Via sinjorina moŝto ŝajnas ne kompreni min, sed mi tamen volas almenaŭ memprezenti. Mia nomo estas Saltner, Josef Saltner, naturesploristo, pentristo, fotografisto kaj membro de la Torma polusekspedicio, momente akcidenta kaj, kiel ŝajnas al mi, pli malpli savita. Vere ĉe tio estas nenio ridenda, via sinjorina moŝto, aŭ kiu vi estas krome."

Tiam li montris kelkfoje per la fingro al si mem kaj klare diris: "Saltner! Saltner!" Tiam li montris per la mano ĉirkaŭe al sia ĉirkaŭaĵo kaj fine al la bela marsanino.

Tiu tuj akceptis lian gestlingvon. Ŝi malrapide movis la manon renkonte al si kaj diris sian nomon: "Se."

Tiam li montris al Saltner kaj klare ripetis lian nomon. Kaj ankoraŭ unu fojon ŝi ripetis kun la koncernaj gestoj:

"Se! Saltner!"

"Se, Se?" Saltner diris demandante. "Do tiu estas via kara nomo. Aŭ ĉu eble vi opinias, ke tie ekstere estas la maro, germane: die See? Ĉu vi eble ja komprenas iom de la germana? Kie ni do troviĝas ĉi tie?"

Post lia demandanta manmovo Se montris al la maro, kiu ondis antaŭ la ĝis la planko etenditaj fenestroj, kaj nomis la vorton, kiu signifas maron en la lingvo de la marsanoj. Tiam ŝi tiris ĉe mantenilo, kaj anstataŭ la maro montriĝis la pejzaĝo, kiun Saltner estis admirinta. Li vidis nun, ke tiu estis pentrita sur ekranon, kiun Se ĵus ŝovis antaŭ la fenestron. Ŝi montris al la pejzaĝo kaj diris "Nu." Tio signifas 'marson', sed kompreneble al Saltner tiu vorto servis ne multe.

Se nun iris reen en la ĉambron, kiun kovris la ekrano ĝis nun kontraŭ liaj rigardoj, kaj serĉis objekton, kiun ŝi ŝajnis ne tiuj trovi. Saltner sekvis ŝin per la okuloj. Li

kredis neniam esti vidinta ion pli gracian, ĉiukaze ankoraŭ ne ion pli grandiozan.

Rozeta vualo kovris la plej grandan parton de la figuro, sed lasis tie kaj ĉi tie la metalan brileton de la subvesto travidiĝi. La haroj bukliĝis super la nuko en senmovaj bukloj, kiuj montris kiel bazan koloron luman brunon, sed ĉe ĉiu movo ili irizis kiel la kolorŝanĝiĝo sur sapveziko. Ĉiuj movadoj de ŝia korpo similas la malpezan ŝvebadon de anĝelo, kiu estas sendependa de la pezeco de la materio. Kaj tuj kiam la kapo alvenis al pli malhelan lokon de la ĉambro, la hararo ekbrilis fosforeskante kaj ĉirkaŭis la vizaĝon kiel aŭreolo.

Subite ŝi ĉesis serĉi kaj vokis:

"Kiel distrita mi ja estas! Tio ĉio ja ankoraŭ havas tempon. La povra Bat' certe estas malsata, mi devis unue pensi pri tio. Atendu, mia povra Bat', mi tuj volas rosti ion por vi."

Ŝi paŝis al la tablo en la fundo de la ĉambro kaj agadis ĉe la ŝranksurmetaĵo kaj diversaj manteniloj. Tiam ŝi estis denove apud li kaj diris en neimitebla tono, kiu ravis lin: "Saltner", farante nemiskompreneblan pantomimon de manĝado.

"Brilanta penso, graciega Se", Saltner vokis ripetante la pantomimon.

Post manipulo de Se, Saltner ne sciis kiel, subite ekstaris tableto antaŭ lia lito, kaj Se metis manĝaĵon antaŭ lin, kiun ŝi ĵus preparis. Li ekzamenis ne longe tion, kion ĝi estu, ne pripensis la strangajn formojn de la al li donitaj instrumentoj, sed tuj uzis ilin, senzorge pri la rideto de Se, kiel kuleron kaj tiam li suĉis grandan kvanton el la ajuto de per likvo plenigita ujo. Lia malsato estis, kiel li nur nun rimarkis, tiel granda, ke li momente estis forgesinta eĉ la ĉeeston de Se kaj sian tutan ĉirkaŭaĵon. Nur post kiam la unua instigo ĉesis, li denove atenteme aŭskultis la klarigojn de Se, kiu nomis al li la apartajn objektojn en sia lingvo, kaj baldaŭ li sukcesis memorteni kelkajn vortojn.

Kiam li estis finiĝinta sian manĝon, Se rigradis lin denove kun kontenta mieno. Kiel oni karesas hundeton, ŝi glitis permane trans lian hararon kaj diris:

"La povra Bat' estis malsata, nun li resaniĝos. Ĉu estis bone, Saltner?"

Saltner kompreneble ne komprenis ŝiajn vortojn, sed la sencon li klare elsentis. Li sentis sin ankaŭ iom humiligita, ĉar li ja rimarkis, ke Se traktis lin ne kiel samrangan estaĵon. Sed kiel ŝi elparolis lian nomon, kiel ŝi rigardis lin per la okuloj, kiuj ŝajnis enlumi ĝis la plejinterno de lia animo, li kapablis neniel alie ol danki ŝin per la plej elkoraj vortoj. Kaj ankaŭ Se komprenis la dankon sen koni la vortojn, kiujn li parolis. Ridetante ŝi diris en sia lingvo:

"Saltner plaĉas al mi, li ne estas kiel Kalalek'."

Saltner estis kompreninta la vorton Kalalek, kiun la eskimoj estis nomintaj kiel la nomon de sia tribo.

"Ne", li energie vokis, "mia bela Se, ne eskimo mi estas, mi estas germano, neniu eskimo – germano!"

Kaj li akompanis la vortojn per tiaj energiaj gestoj, ke Se tuj komprenis ilian sencon.

Ŝi rapidegis al la librobretaro ĉe la ĉambromuro – ĉar libroj apartenis ĉe la marsanoj al la nepra ekipaĵo de ĉiu ĉambro, pli volonte oni malhavus la fenestrojn ol la bibliotekon – kaj ŝi alportis maparon.

Intertempe Saltner petegis sian flegistinon demandante pri la sorto de siaj kunuloj sen povi komprenigi sin sufiĉe. Unue Se ne zorgis pri liaj vortoj kaj gestoj, sed tenis

la maparon ĉe ĝia tenilo antaŭ la okulojn de Saltner kaj lasis la folion rapide turniĝi. Lia mirego pri tiu mekaniko estis superigita, kiam ŝi ĉesis foliumi kaj fiksis la tenilon de la libro en tresto sur tableto antaŭ li. Li tuj rekonis la mapon de la regionoj ĉirkaŭ la norda poluso de la tero, kiun li estis admirinta en la giganta skalo de la insulo de el la aerostato.

Se montris per sia maldika, gracia fingro, ĉe kiu li rimarkis la grandan moveblecon de la unuopaj membroj, al Gronlando kaj la proksimaj landamasoj ĉirkaŭ la poluso; ĉe tio ŝi diris ripete: "Kalalek, Bat Kalalek." Tiam ŝi montris al Saltner, ekprenis lian manon kaj gvidis ĝin trans la aliaj partoj de la mapobildo demandante: "Bat Saltner?"

Saltner serĉis sur la mapo la regionon de Germanio, kiu montriĝis jam forte mallongigite, kaj klarigis al ŝi per gestoj, ke ĉi tie estas lia hejmo. Ĉar li el la pli ofte aŭdita vorto 'Bat' konkludis, ke tiu verŝajne signifis ion kiel homon aŭ tribon, li do montris al la poluso kaj diris ĉe tio:

"Bat Se?"

Se respondis per vigla defenda movo. Ŝi metis la tutan manon sur la mapon kaj diris: "Bat." Tiam ŝi montris al si mem kaj parolis kun memkonscio: "Se, Nume."

Kaj kiam Saltner alrigardis ŝin demandante, ŝi montris per etendita brako al definita loko de la planko kaj ripetis: "Nume." Kiam ŝi tiel staris, ŝiaj okuloj lumis per transfigurita brilo, kaj Saltner ne povis dubi, ke li havis pli altan estajon antaŭ si. Sed tuj ŝi klinis sin al li kun aminda rideto kaj lasis kelkajn foliojn de la maparo returniĝi. Grupo de geometriaj figuroj montriĝis, en kiuj Saltner senprobleme ekkonis skizon de la planedaj orbitoj en la sunsistemo. Se montris al la centro kaj diris: "O."

"Suno", respondis Saltner montrante samtempe al la direkto, en kiun la sunradioj speguliĝis sur la surface de la maro.

Se kapjesis kontente, tiam ŝi sekvis per la fingro sur la mapo la terorbiton kaj ripetis la nomon de la tero: "Ba", kaj montrante al Saltner: "Bat!" Tiam per la tuta fiero de la marsanoj la nomon 'Nume' elparolante, ŝi montris sur la mapo la orbiton de la marso kaj diris kun moŝta rigardo al Saltner: "Nu."

"La marso!" Tio venas preskaŭ sentone de la lipoj de Saltner. Li rimarkis, kiel ĉiuj liaj sensoj minacis konfuziĝi. Senhelpe li rigardis alten al Se, kiu lian eksciton rimarkante tuj indikis al li kuŝiĝi. Li ja volis saltante ekstari malgraŭ la febleco, kiun li sentis ĉe si, por plu kontentigi sian scivolemon, sed rigardo, kiu ne akceptis kontraŭstaron, katenis lin sur lian liton.

En tiu momento la pordo de la ĉambro malfermiĝis, kaj en tiu aperis klinigite kaj pene sin portante, apogite sur du bastonoj, la figuro de la kuracisto Hil. Tuj post kiam Hil eniris en la ĉambron, li malkliniĝis al tuta alteco, forĵetis la bastonojn kaj rapide paŝis al la lito. Li tuj ekprenis la manon de Saltner, kaj observante la pulson li diris kun eta riproĉo:

"Sed Se Se, kiajn stultaĵetojn vi faras? Do malŝaltu tuj la kontraŭgraviton. Nia Bat' devas havi sian ĝustan terpezecon, alie li pereos, antaŭ ol ni vidos lin refortigita."

"Bonvolu ne riproĉi min, Hil Hil", Se ridas, "mi ja tiel bone prizorgis kaj manĝigis lin – vidu la bovlon – 150 gramoj da proteino, 240 gramoj da graso kaj –"

Hil rigardis la risortopensilon, kiu troviĝis sub ĉiu manĝaparato de la marsanoj

kaj tuj konstatis, kiom da nutraĵoj oni estis metinta sur ĝin aŭ provizinta al la korpo.

"Sed vi malŝaltis la graviton, pri tio nenio estis skribita en via instrukcio."

"Jes, Hil Hil, vi ja ne povas postuli, ke mi rampu tra la ĉambro, kiam li estas veka."

"Aha, la kara vanteco!"

"Ho, antaŭ la Bat'! Sed kiam li vekiĝis, mi devis rapide iri al li, kaj tiam mi devis baki la pasteĉon, kaj – jes, se vi scius: Li nomiĝas Saltner kaj ne estas Kalalek', sed – nu, tiun vorton mi forgesis, sed mi montros al vi la regionon sur la mapo."

"Unue lasu peziĝi – sed stop, momenton, mi volas unue alporti seĝon por mi – bone –"

"Kaj ankaŭ mi volas unue sidiĝi", Se diris.

Kiam ambaŭ estis sidiĝintaj, Se ekprenis kejlon, kaj Saltner vidis, kiel Se kaj Hil videble malleviĝis en siaj seĝoj kaj iliaj okazaj movadoj iĝis penaj kaj pezecaj. Sed li rimarkis, kiel la stranga sento de vertiĝo, kiu regintis lin, malaperis, li denove povis normale estri siajn membrojn, kaj li komforte rekuŝiĝis sur sian liton.

La kuracisto bonkore alrigardis lin per siaj grandaj, parolantaj okuloj.

"Do oni estas denove viva?" diris li, kion Saltner kompreneble ne komprenis. Tiam li aldonis en la lingvo de la eskimoj: "Ĉu vi eble komprenas tiun ĉi lingvon?"

Saltner divenis la demandon kaj kapneis. Kontraŭe li mem de nun diris en la lingvo de la marsanoj tion, kion li lernintis de Se:

"Trinki – vino – Bat' bone vino trinki –"

Se ekridis per sia fajna, arĝenta rido kaj Hil diris amuzite: "Vi bonege progresis – nun ni baldaŭ povos interparoli."

Ĉe tio li montris al la apud Saltner staranta trinkujo, kaj tiu uzis ĝin sukcese por nova fortiĝo.

La sorto de liaj kunuloj plej forte ŝarĝis lian animon. Li ankoraŭfoje provis informiĝi pri tio levante fingron kaj dirante ĉe tio: "Bat Saltner." Tiam li levis tri fingrojn kaj provis klarigi per pluaj gestoj, ke tri 'Bate' alvenis per aerostato kaj falegis.

Hil, kiu vidis la unuan fojon eŭropanon, estis direktinta sian atenton pli al la tuta homo ol al lia deziro kaj nun demandante rigardis al Se, kiam Saltner turnis sin rekte al li per la de Se aŭdita titolado 'Hil Hil'.

Se klarigis:

"Li opinias, ke tri Bateoj alvenis kaj falegis en la maron. Sed ni tamen nur trovis du?"

"Certe", Hil diris, "kaj ankaŭ la alia fartas pli bone. La piedo ne estas grave vundita kaj resaniĝos post kelkaj tago. Mi lasis min anstataŭiĝi de La por kontroli ĉi tie. Cetere mi kredas, ke li estas konscia, le ripete malfermis la okulojn, sed sen paroli. Espereble li ne spertis gravan skuon. Ni ne alparolu lin por ne eksciti lin tro frue. Ĉu vi ne volas foje transiri al li?"

"Tre volonte, sed kiu restas ĉe Saltner?"

"Tiu nun devas dormi. Kaj tiam ni devos ekhavi tute alian aranĝon. Ni alportos ilin ambaŭ kune en unu ĉambron, nome en la grandan. Ĉe unu flanko mi lasos forigi la kontraŭgravitan ligon, same en la du apudaj ĉambroj. Tien ni portos iliajn litojn kaj ĉiujn iliajn aparatojn, ke ili povu vivi en siaj kutimaj cirkonstancoj. Kaj tiam

ni povos resti ĉe ili kaj studi ilin sen daŭre devi rampi sub tiu premo, malpezigi la pezecon en la alia parto de la ĉambro."

"Bele", Se diris, "sed antaŭ ol vi endormigos mian povran Baton, mi volas ankoraŭfoje konferenci kun li."

Ŝi alparolis Saltneron kaj eble plej bone klarigis al li, ke alia de liaj kunuloj estas savita kaj li vidu lin baldaŭ. Tiam ŝi lerte eksciis, kiel tiu nomiĝas, kaj lasis diri al si kelkajn germanajn vortojn tiel longe, ĝis ŝi estis enmemoriginta tiujn. Dum ŝi ridetante alrigardis Saltneron el siaj grandaj okuloj, Hil etendis la manon kontraŭ lian vizaĝon kaj movis ĝin kelkajn fojojn tien kaj reen. La okuloj de Saltner malfermiĝis. Estis por li ankoraŭ tiel, kiel du brilantaj sunoj lumus antaŭ li, tiam li ne plu sciis, ĉu tio estis du okuloj, ĉu la lunoj de la marso, kaj baldaŭ li kuŝis en sensonĝa dormo.

7a ĉapitro – Novaj enigmoj

Grunthe vekiĝis el sia senkonscieco en ĉambro, kiu estis meblita tute simile kiel tiu, en kiun oni portis Saltneron. Ĉar ĝi apartenis al la sama vico de gastĉambroj, kiuj estis destinitaj por la provizora restado de marsanoj sur la terstacio. Li ankaŭ povis vidi de sia lito nenion alian ol la grandajn vitraĵojn, post kiuj la maro ondis, kaj la ekranon, kiu kovris la ceteran parton de la ĉambro. Ankaŭ tiu ekrano estis ornamita per nokta pejzaĝo de la marso, kiu montris ambaŭ lunojn de la marso – ĉe la pentristoj populara lumefekto. Sed ĉi tie troviĝis krome en la malfono du figuroj, el kiuj unu montris al aparte hele brilanta stelo, dum la alia rigardis forte pligrandigitan bildon de tiu stelo, kiel ĝi aperis sur tabulo projekciite de aparato.

Grunthe provis kolekti siajn pensojn. Li kuŝis zorgeme enlitigite kaj en dormvestaĵo, kiu estis ne la lia, en hejtita ĉambro. Sian piedon, kiu cetere ne doloris al li, li ne kapablis movi; tiu troviĝis en firma bandaĝo. Li sentis sin senforta, sed tute konscia kaj sen senseblaj suferoj. La kapon kaj la brakojn, kaj ĝis certa grado ankaŭ la supran korpon li povis intence movi. Do li estis savita post sia falego en la akvon. Sed kie li troviĝis, kaj kiuj estis la savintoj?

La komenca iluzio, ke ĉe la loko, kie staris la ekrano, li vidus en veran noktan pejzaĝon, ne povis daŭri longe ĉe li, ĉar tiu enhavis figurojn, kiuj ne moviĝis. Do li havis bildon antaŭ si. Pro tio la maro estis, kiel li konkludis el la koloro kaj la maniero de la lumigo, verŝajne nenio alia ol la polusa maro, en kiun la aerostato estis faleginta, li troviĝis sur la insulo, kaj liaj savintoj estis la loĝantoj de tiu insulo. Kiuj estis ili, kaj kion li atendus de ili? Al tio ĉiuj liaj pensoj koncentriĝis. Li movis siajn brakojn, li obzervis sian spiradon, sian pulson, li aŭdis la muĝadon de la maro – ĉiuj fenomenoj de la naturo estis neŝanĝitaj, li estis sur la tero, kaj tamen la estaĵoj, kiuj loĝis ĉi tie, ne povis esti homoj. La ŝtofo de lia vestaĵo, de lia kovrilo, de lia lito estis tute nekonataj al li, el tio li povis konkludi nenion. Sed la bildo! Kion montris la bildo? Ĉu ne eblis, ekkoni el tio, en kies forto li troviĝis? La du estaĵoj sur la bildo estis, kiel ŝajnis, de homa speco. La staranta figuro, kiu montris al la stelo, ne aspektis alie ol ideala virina figuro kun okulfrapante grandaj okuloj; ĉirkaŭ ŝia kapo ludis stranga lumbrileto – ĉu tio estu simbola figuro kun aŭreolo? La vestaĵo – kondiĉe ke oni povis nomi ĝin tiel – lasis konkludi nenion, ĝi povus fonti el kraprico de la artisto. La sidanta figuro, kiu rigardis la bildon de la stelo kaj turnis la dorson al la spektanto, ŝajnis surhavi stretan metalan kirason; en la mano ĝi tenis al Grunthe ne konatan objekton. Ĉu tiuj du figuroj estu reprezentantoj de la loĝantoj de la polusinsulo? Sed la pejzaĝo mem estis neniu pejzaĝo de la tero. Ĉu do memoro pri la hejmo, el kiu venis la polusloĝantoj? Kaj se estus tiel – tiuj

du lunoj –, ili ne povis aparteni al alia mondo ol al la marso.

Loĝantoj de la marso koloniigis la poluson! La penso jam unufoje estis veninta al Grunthe, kiam li unue estis rigardinta el la aerostato la insulon kun ĝiaj aparatoj kaj la stranga mapobildo de la tero. Li estis forŝovinta ĝin kiel tro fantazian, li ne volis esti asociita kun tiel neverŝajnaj hipotezoj, dum li ankoraŭ povis esperi alian klarigon. Sed kiam la aerostato estis puŝegita alten de tiu neklarigebla forto, li denove devis pensi pri tiu hipotezo. Kaj nun, la stranga savo, la kuriozaj ŝtofoj, la bildo! Kia stelo estis tiu, kiu estis alrigardata sur tiu bildo? Li streĉis siajn akrajn okulojn por ekkoni la bildon sur la tabulo. Hele lumigita mallarĝa krescento, la cetera parto de la disko en brileto – tiuj malhelaj makuloj, la blankaj ĉapoj ĉe la polusoj – neniu dubo, tiu estis la tero, kiel ĝi aspektis de sur la marso ĉe forta pligrandigo, la mallarĝa krescento en la sunbrilo, la cetera malforte lumigita de la lunlumo. – Grunte ne plu povis malkonfesi la opinion, ke li troviĝas ĉe la marsloĝantoj – gasto, kaptito – kiu povis scii?

Kiel la marsloĝantoj povis veni sur la teron? Grunthe ne sciis respondi tiun demandon. Sed se oni ja prenis la fakton kiel donitan, tiel la aliaj fenomenoj tre facile klariĝis, la mirakla konstruaĵo de la insulo, la influo al la aerostato, la savo, la meblaro de la ĉambro – la hipotezo de la marsloĝantoj ja estis la plej facila –

Kaj subite Grunthe ektremis – memoro subite reviviĝis ĉe li –, liaj lipoj firme malfermiĝis unu sur la alia, kaj inter liaj brovoj profunda orta sulko formiĝis – Li streĉis sian memoron ekstreme –

Ell, Ell!, li diris ĉe si. – Kio ja estis tio, kion Ell estis dirinta al li, antaŭ ol li ekvojaĝis? Friedrich Ell, la amiko de Torm, vivis kiel privata erudiciulo en Friedau por siaj studoj, sed li estis la vera mensa kaj mona iniciatinto de la ekspedicio, la animo de la internacia asocio por polusa esplorado. Kun li li ofte estis diskutinta pri la ebleco, kiel la loĝantoj de la marso povus kontakti la teron. Kaj Ell ĉiam estis dirinta: Kiam ili venos, ni devos antendi ilin ĉe la norda poluso aŭ ĉe la suda poluso. Oni saltas sur vagonaron ne tie, kie ĝi veturas, sed tie, kie ĝi staras. Kiu scias, kion vi trovos ĉe la poluso! Salutu de mi la – – nu, la vorton li estis forgesinta. Li ne atribuis gravecon al tio. Ĉe Ell oni ne ĉiam sciis, ĉu li ŝercas aŭ parolas serioze. “Salutu de mi la –” Li ne memoris tion. Sed li bone memoris, kiel unu vesperon Ell estis iĝinta tre ekscita, kiam oni estis parolinta pri la loĝantoj de la marso kiel pri fablaj estaĵoj. Tiam li subite estis fininta la interparoladon.

Grunthe estis tirata el sia pripensado. Malantaŭ la bildo de la marsa pejzaĝo voĉoj aŭdiĝis. Kia lingvo estas tio? Grunthe ne konis ĝin, li komprenis neniun vorton.

Malantaŭ la ekrano estis sidinta, de Grunthe ne rimarkite, La. Estis tre malkomforte por ŝi suferi sub la premo de la tera gravito, kaj pro tio ŝi estis etendiĝinta senmove sur sia sofo. Nun Se pezece alvenis kaj ankaŭ sidiĝis.

“Kiel fartas la Bat’?” ŝi demandis.

“Mi vere ne scias”, La diris, “mi ankoraŭ ne aŭdis, ke li aŭdiĝis, kaj sub tiu premo vi ne povas postuli, ke mi iru al li.”

“Do ni malpezigas!” Se vokis kaj etendis la manon al la tenilo de la kontraŭgravita aparato.

“Sed Hil malpermesis tion”, La respondis. “Tio povus efekti domaĝe.”

“Ba, transe mi ankaŭ faris tiel, por mallonga tempo tio faris nenion al la Bat’. Ĉu vi jam manĝigis lin?”

“Ne, kiel mi povis?”

“Kaj tamen necesas, tion ankaŭ Hil opinias. Kaj tiom longe ni devas povi libere moviĝi. Do je mia respondeco.”

Se agordis la aparaton al la normala marspezeco. La du damoj ekleviĝis kaj senŝarĝe ekspiris.

En la sama momento Grunthe volis fari movon, sed lia brako moviĝis pli alten, ol li intencintis. Tuj li provis la movon denove kaj konstatis, ke ĉiuj liaj membroj kaj la kovrilo iĝintis pli malpezaj. Li serĉis objekton, kiun li volis ĵeti alten por studi la grandiozan fenomenon. Ĉar li malgraŭ la bandaĝo ĉe sia piedo povis facile levi la supran parton de la korpo, le ekvidis sur murbreto super sia lito kelkajn objektojn, kiuj apartenis al li; oni evidente trovis ilin en liaj poŝoj. Li ekprenis sian poŝtranĉilon, tenis ĝin eble pli alte super la planko kaj lasis ĝin fali. Li povis komforte sekvi la falon per la okuloj; daŭris unu sekundon, ĝis la tranĉilo atingis la plankon. Grunthe taksis la altecon kaj diris al si: La gravito malgrandiĝis, nome ĝi egalas nur trionon de la kutima. Tio estas la pezeco sur la marso. Kaj denove li devis pensi pri Ell, kiu tiel ofte estis dirinta: “Liberiĝi de la pezeco signifas domini la kosmon.”

Post la malforta bruo, kiun kaŭzis la surtrafo de la tranĉilo, Se estis flankenŝovinta la ekranon kaj alpaŝinta kun La al Grunthe. Tiu ne direktis sian atenton sur la ekranon kaj pro tio ektimis per movo de surprizo, kiam li subite vidis la du belajn marsaninojn antaŭ si. Tuj kiam li ekkonis, ke du vivantaj inaj estaĵoj proksimiĝis al li, li do malantaŭenkuŝiĝis kun frosta mieno kaj direktis siajn okulojn fikse al la plafono. Ĉar li ne aŭdacis alrigardi Laon kaj Seon, li ne povis rimarki, per kiaj afablaj kaj kunsentaj rigardoj ili alrigardis lin. Nur pro la tono de la voĉoj, per kiu ili parolis kelkajn vortojn en sia lingvo al li, li ekkonis la bonan intencon. La konvene tiretis la kovrilon por li, Se klinis sin super lin kaj rigardis per siaj lumantaj okuloj profunde en liajn okulojn. Tiu damosocieto estis terura por li; pli volonte li vidintus sin ĉirkaŭita de malamikaj sovaĝuloj. Aĥ, kaj nun li sentis molan manon sur sia kapo, Se karesis lian hararon – indigne li forpuŝis la manon.

“Povra homo”, Se diris, “li ankoraŭ ŝajnas tute konfuza. Antaŭ ĉio ni devas doni trinkaĵon al li.” Ŝi metis la manon denove sur lian frunton kaj diris: “Ne timu, ni faras nenion al vi, povra homo.”

“Ko bat”, tiel sonis la lasta vorto de Se en ŝia lingvo, “Ko bat” – tio surprize efektis sur Grunthe –, tiu estis unu el la strangaj esprimoj de Friedrich Ell. Tiel Ell kutime diris, kiam li ne povis venki per unu el siaj strangaj opinioj, kiam li volis esprimi sian kompaton pro la manko de kompreno ĉe la homoj. Grunthe ofte estis demandinta lin, de kie tiu frazo venas, kiel li ekkonis ĝin. Tiam Ell ĉiam nur silente ridetis kaj ripetis: “Ko bate, tion vi ne komprenas, povraj homoj!” Tiuj memoroj reaperintis en Grunthe per tiu vorto. Li nun kondutis tute trankvile.

Intertempe La estis alportinta trinkujon plenigitan per la grandioza nektaro de la marsanoj. La marsanoj ĉiam trinkis per tubo kun ajuto, kiu estis fiksita en la ujo, kaj tiun ajuton La nun provis ŝovi inter la lipojn de Grunthe. Sed tio estis vana peno, Grunthe tenis ilin firme malfermitaj kaj turnis sian vizaĝon flanken.

“La Bateoj ja estas malafablaj estaĵoj”, La diris ridante.

“Ho”, Se respondis, “Saltner estis tute alia, tiu parolis tuj!” Grunthe komprenis la nomon, nun li malfermis la lipojn la unuan fojon.

"Ĉu Saltner?" li demandis, sed sen alrigardi Seon.

"Aĥ", Se diris, "vidu, li kapablas aŭdi kaj paroli. Nun atentu, mi nun parolos kun li."

Ŝi amike brakumis ĉirkaŭ la ŝultron de La kaj stariĝis apud la liton. Tiam ŝi diris per penego de sia parolorgano la de Saltner lernitajn germanajn vortojn: "Saltner deutsch Freund trinken Wein, Grunthe trinken Wein, deutsch Freund." [Saltner germana amiko trinki vino, Grunthe trinki vino, germana amiko.]

Grunthe nun mire alrigardis la germane parolantan marsaninon, dum La apenaŭ povis kaŝi sian ridon pri la vortoj, kiuj ŝajnis al ŝi ege komikaj. Ankaŭ Grunthe estis ekridetonta, sed kiam li ekvidis la du ravajn figurojn tiel proksime antaŭ si, li fiksrigardis tuj denove la plafonon, sed respondis per ĝentila tono:

"Se mi bone komprenas, ankaŭ mia amiko Saltner estas savita. Bonvolu diru min, kie mi estas ĉi tie."

"Trinken Wein, Grunthe" [Trinki vino, Grunthe.] Se urĝe ripetis, kaj La tenis la ajuton antaŭ lian vizaĝon.

Grunthe nun prenis la prezentitan refreŝigaĵon. Kaj baldaŭ li sentis sin per la trinkaĵo plej agrable refreŝigita kaj vigligita. Li dankis kaj prezentis kelkajn demandojn al Se, sed ŝiaj lingvokonoj nun elĉerpiĝintis. Grunthe komprenis, ke li devas uzi la gestlingvon, kaj tiel li vole-nevole devis decidi alrigardi la du marsaninojn. Li montris al ili, tiam al la bildo, kaj divene diris: "Mars? Mars?" [Ĉu marso? Ĉu marso?]

Tiun vorton Se estis memorteninta. Ŝi ripetis ĝin jesante: "Mars, Nu!" Kaj al La kaj si montrante ŝi diris alten erektiĝinte: "La, Se, Nume!"

Nume! Estis tio! Tiu estis la vorto, kiun Ell diris al li: Salutu la Numeojn!

Do Nume nomis sin la marsanoj, kaj Ell estis sciinta tion – – tio donis al Grunthe tiom por pripensi, ke li momente forgesis sian ĉirkaŭaĵon. Por ne esti ĝenata dum sia pripensado, li fermis la okulojn, kaj lia vizaĝo denove ekhavis la rigidan esprimon. Se volis demandi lin, ĉu li volas manĝi, sed ŝi forgesis la germanan vorton, kiun ŝi lasis diri al si de Saltner. Ĉar Grunthe obstine tenis la okulojn fermitaj, ŝi iris en la fonon de la ĉambro por prepari manĝon. Tio okazis en ĉiu ĉambro tre facile kaj rapide per la elektra kuirejo. La intertempe preferis altiri seĝegon kaj sidiĝi apud la lito. Ŝi atente inspektis la objektojn, kiujn oni estis trovinta ĉe Grunthe, kaj ludis kun malgranda libro, kiu troviĝis inter tiuj. Ĝi estis instrukcio pri la interkomunikiĝo en la eskima lingvo kaj montris kiel antaŭpaĝan vinjeton fajne faritan lignogravuraĵon, eskimon kun lia kajako sur sovaĝe moviĝanta maro maturigantan la fiŝkaptaĵon.

"Ho, vidu!" ŝi vokis al Se, "ĉi tie estas Kalalek' en sia kajako." La du eskimaj vortoj kompreneble aŭdiĝis al la orelo de Grunthe kaj vekis lin el lia konfuza cerbumado. Ĉu la marsanoj eble ellernis la gronlandan? Li diris al si, ke tio je estas facile ebla. Li mem estis lerninta la plej necesan por la interkomunikiĝo pro la celo de la vojaĝo kaj pro tio demandis:

"Mi parolas kelkajn vortojn de la eskimoj. Ĉu vi komprenas min?"

Se ne sciis, kion li volis diri. Sed La estis direktinta de kelke da tempo siajn studojn al la lingvo de la unununraj homoj, kiujn la marsanoj renkontis ĝis nun. Ŝi komprenis lin kaj respondis:

"Mi komprenas iomete."

"Kie estas miaj amikoj?" Grunthe demandis.

“Nur unu ĉeestas. Li estas en alia ĉambro.”

“Ĉu mi povas iri al li?”

“Li dormas, sed oni poste portos vin unu al la alia.”

“Kiel vi venas de la Nu’ al la tero?”

La ne sciis esprimi la respondon. Kontraŭe ŝi demandis.

“Kion vi volas ĉi tie?”

Grunte nun ne sciis siaflanke kiel esprimi la nocion ‘norda poluso’ en la gronlanda. Li volis konsulti la libreton kaj diris:

“Donu al mi la libron.”

“Kion?” La demandis.

Grunthe eksidis por ekkapti la libron, kiun ŝi tenis en la mano. Sed li momente ne pensis pri la ŝanĝitaj pezecokondiĉoj, kaj tiel okazis, ke lia tuta supra korpo transrapidiĝis ĝis la loko de La. Li estus falinta el la lito, se La ne estus kaptinta lin rapide ĉe la brako kaj teninta lin. Tiu tuŝo nun estis por Grunthe tre embarasa, kaj li volis eviti ĝin, sed ĉar li ankoraŭ tute ne komprenis uzi siajn membrojn ĉe la ŝanĝitaj kondiĉoj kaj krome estis malhelpata de sia piedo, okazis, ke li minacis fali aliflanken kaj La devis ĉirkaŭpreni lin per siaj brakoj. Ŝi tenere rekuŝigis lin sur la liton, dum li vidis ŝian te-rozkoloran hararon brileti proksime antaŭ siaj okuloj. Vertiĝo minacis ekkapti lin.

Se alŝvebis kun la manĝaparato.

“Kion vi ja faras?” ŝi vokis ridante. “Mi aŭdas, ke vi tiel fervore interparolas, sen povi kompreni, kion vi parolas, kaj subite –”

“Jes”, ankaŭ La ridis,“estis tro amuze, kiajn saltojn la povra Bat’ faris!”

“Aĥ”, Se diris, “tio ŝajnas al mi esti danĝera afero! Unue li ne aŭdacas alrigardi vin, kaj kiam mi turnas la dorson, li faras al vi amdeklaron en la gronlanda.”

“Vi estas kulpa pri tio, vi malŝaltis la pezecon. Se nur la teruro ne estas malbona por li – kion diros Hil!”

Grunthe kuŝis denove senmove. Lia ja tute ne memkaŭzita akcidenteto grave kolerigis lin, la tuŝo kun la bela La estis terura por li, krome la malpliigo de la gravito nun kaŭzis korpan malsaneton.

Sed La petis lin tiel afable en la eskima lingvo tamen manĝi, kaj Se prezentis al li la alloge odorantajn manĝaĵojn per tiel ordona rigardo, ke li aŭdacis ĉesigi sian malsaton.

Per plej granda atento li eksidis kaj ĝuis kelke de la manĝaĵoj, pri kiuj li ne sciis tion, kio ili estis. Tuj kiam li malantaŭenkliniĝis dankante, Se flankenŝovis la manĝtableton, kaj La diris:

“Fartu bone, Grunthe, dormu.”

Ŝi ŝvebis el la ĉambro, kaj Se antaŭentiris la ekranon, ke Grunthe denove restu sola. La kapo tremsonis al li pro ĉio, kio estis okazinta ĉirkaŭ li, novaj demandoj entrudis, kaj li ĵus volis denove eksidi; tiam sento ekkaptis lin, kiel li estus perforte premata kontraŭ sian liton. Se estis rekreinta la terpezecon. Nun densaj kurtenoj ŝoviĝis antaŭ la fenestrojn, kaj Grunthe kuŝis en la mallumo. Mallaŭta muziko kiel el granda malproksimeco aŭdiĝis kaj intermiksiĝis melodie kun la muĝado de la maro.

Sensukcese Grunthe provis koncentri siajn pensojn. Ili moviĝis ĉirkaŭ la demandon, kiel eblis al vivantaj estaĵoj traflugi la senaeran kosmon. Kiel la marsanoj estis povintaj veni sur la teron? Sed liaj ideoj vagis nur en necertaj konjektoj, kaj antaŭ

ol li atingis iun klarecon pri tiu demando, liaj pensoj dissolviĝis en malklaraj sonĝaj bildoj. Grunthe ekdormetis.

8a ĉapitro – La sinjoroj de la kosmo

"Trifoje kuraĝo kaj forto kirasis
la feran koron al tiu, kiu unue aŭdacis
iri elen en rompebla boato
sur la malican maron. ..."

Tiel iam Horacio laŭdis la aŭdacon de la ŝipano, kiu konfidis sian malsekuran veturilon al la fremda elemento. ... Sed la turisto senhezite enŝipiĝas en la luksan konstruaĵon de giganta vaporŝipo por transiri la bone konatan oceanan straton dum kelkaj tagoj.

Simile poeto de la marso laŭdis la kuraĝon kaj la sagacecon de tiu marsano Ar, kiu iam aŭdacis ĵeti sian neperfektan aparaton sur la vojoj de la lumo kaj de la kosma gravito en la malplenan spacon por provi la unuan fojon la flugon tra la monda etero al la lumanta najbara stelo, la brilanta 'Ba', la ornamo de la marsnoktoj, la sopiro de jarmiloj de ĉiuj 'Numeoj'. Sed nun oni konis sur la marso ekzakte la rimedojn, kiujn la marsloĝantoj, kiuj nomis sin mem 'Nume', devis apliki, la unuopajn cirkonstancojn, kiujn ili devis atenti, por atingi laŭ la pozicio de la planedoj la brilantan Baon, tio estas la tero. La vojaĝo inter marso kaj tero ja ankoraŭ estis temporaba kaj multekosta entrepreno, sed ĝi havis tiel sekuran kaj komfortan sinsekvon kiel eble hodiaŭ vojaĝo ĉirkaŭ la mondon por homo.

La esplorado de la tero, la malkovro de la interplaneda vojo al tiu kaj la fina uzurpado de la norda poluso formis ampleksan kaj gravan ĉapitron de la kulturhistorio de la marsanoj.

La travideblecon de la atmosfero sur la marso frue igis sian loĝantojn bonaj astromoj. Matematiko kaj naturscienco estis atinginta altecon de disvolviĝo, kiu estas malklara ideo kiel malproksima idealo por ni homoj. Ju pli la maljuniĝanta marso malfaciligis per sia relative malgranda akvoprovizo la ekzistokondiĉojn de la marsanoj, des pli grandiozaj estis la penoj, per kiuj la marsanoj formis la teknikon de la dominado de la naturo. Ĉiam novajn fortojn kaj helpilojn ili sciis ellogi de sia planedo, kiu certe taŭgis per la propreco de sia strukturo je eĉ pli granda mezuro al la edukado de kulturpopolo ol la tero.

La tago sur la marso havas preskaŭ la saman daŭron kiel sur la tero, ĝi estas nur kvardek minutojn pli longa. La jaro de la marso kontraŭe egalas 670 marsajn, tio estas 687 teraj tagoj, do ĝi estas preskaŭ duoble pli longa ol tera jaro. La tuta surfaco de la marso egalas ĉirkaŭ nur kvaronon de tiu de la tero. La suda hemisfero de la marso estas la pli akvohavanta kaj pro tio plej loĝata; ĝi enhavis

ankaŭ la du ununurajn marojn, kiujn la marso posedas, se oni komprenas sub tio tiujn basenojn, kiuj estas plenaj de akvo dum la tuta jaro. La norda hemisfero konsistas plejparte el aridaj dezertoj. Sed la loĝantaro de la marso, al kiu la de la naturo sufiĉe akvumata regiono de ĝia planedo iĝis delonge tro malgranda, sciis eltiri novajn areojn de la agrikulturo el la malabunda naturo. Ĝi tratiris la tutan dezertan regionon per multe disbranĉiĝinta reto de larĝaj kanaloj kaj disportis tiamaniere je la tempo de la neĝdegelo, komence de la somero de ĉiu hemisfero, la akvon, kiu amasiĝis forme de neĝo ĉe la polusoj, trans la tuta planedo. Kiel la egiptoj uzis la kreskantan Nilon por eltiri la fekundan grundon de la Nilvalo el la dezerto, tiel la marsloĝantoj irigaciis per siaj kanaloj ambaŭ bordojn de tiuj. Rapide ĉi tie abunda vegetaĵaro ekkreskis, kaj tiel la tuta dezerta regiono estis tratirita de fekundaj, ĝis cent kilometrojn larĝaj vegetaĵaj strioj, kiuj enhavis seninterrompan ĉenon de florantaj setlejoj de la marsanoj. Kiam ĉi tie la malhelverdaj folioj de la plantoj subite ŝosis, tiam tiuj strioj malhele kontrastis kun la ruĝeta dezerta grundo, kaj la astronomoj de la tero miris, de kie venus tiu regula reto de strioj sur la marso. La giganta laboro de la irigacio de la planedo estis iĝinta neceso por la marsanoj, post kiam la kulture pli progresintaj loĝantoj de la suda hemisfero iom post iom konkeris la tutan planedon. La unuopaj popolgrupoj formis grandan konfederacion. Kiel sur la tero la monda trafiko reguliĝis per internaciaj kontraktoj sen tio, ke la sendependeco de la unuopaj politikaj koporacioj suferis, tiel la pli progresinta civilizacio de la marsanoj en sia internacia federacio havis centralan organon, kiu malgraŭ la libero de la unuopaj komunumoj regulis ĉiujn aferojn, kiuj havis komunan intereson por la loĝantoj de la tuta planedo.

Post kiam la surfaco de la planedo estis tute esplorita kaj koloniigita, la atento de la marsanoj direktiĝis nature pli forte ol iam trans la limojn de ilia loĝloko al iliaj najbaroj en la sunsistemo. Kaj kio ĉi tie povis pli forte kateni ilin ol la brilanta Ba', la mita tero, kiu foje kiel matena, foje kiel vespera stelo superbrilas ĉiujn aliajn stelojn de ilia malluma ĉielo?

La kvieto kaj travidebleco de la atmosfero permesis al ili uzi tiajn pligrandigojn ĉe siaj teleskopoj, kiel ili estis neeblaj sur la tero. Ĉar sur la tero la ĉiam nekonstante movata aero malpermesas, ke ni kapablus uzi instrumentojn de tiel fortaj pligrandigoj, kvankam ni ja povus teorie kaj teknike konstrui ilin. La premo de la atmosfero sur la marso estas tiel malgranda, kiel ni havas ĝin nur sur la plej altaj montosuproj de la tero, kaj la super la marsa surfaco pezanta aertavolo estas konforme pli maldika kaj pli travidebla. La astronomoj de la marso pro tio povis, ĉe konvena pozicio de planedoj rilate unu al la alia, alproksimigi la teron tiom al sia okulo, kiel ĝi estus nur ĉirkaŭ dek mil kilometrojn for, kaj ili do kapablis ekkoni objektojn de etendo de du ĝis tri kilometroj. Ĉe tiuj cirkonstancoj ili nature rimarkis, ke sur la tero troviĝas instalaĵoj, kiuj estus nur klarigeblaj kiel faraĵo de inteligentaj estaĵoj. Ili ankaŭ multe tro klare travidis la strukturon kaj la naturon de la tero same kiel la analogiojn en la tuta sunsistemo, ol ke ili ne havus konvinkon pri la loĝebleco de la tero kaj pri iu kulturo de la terloĝantoj. La mapo de la tero mem estis konata al ili en pli ampleksa maniero ol al ni homoj; ĉar de sia vidpunkto ili povis iom post iom inspekti ĉiujn tiujn regionojn de la terglobo, speciale la polusajn regionojn, kiuj ĝis nun restis fermitaj al niaj teraj esploradoj.

Ne mankis provoj de la marsanoj kontakti la de ili konjektitajn terloĝantojn. Sed

la donitajn signojn oni ja ne estis rimarkinta aŭ kompreninta. Ĉiukaze la terloĝantoj eble ne kapablis respondi. La tero estis multe pli juna planedo kaj en sia tuta evoluo sur tia nivelo, kiel la marso trairintis ĝin jam antaŭ milionoj da jaroj. Tiam la marsloĝantoj memkompreneble diris al si, ke la Bateoj, kiel ili nomis la hipotezajn loĝantojn de la tero, ĉiukaze staras sur multe pli malalta vidpunkto de la kulturo ol ili, la Numeoj; kiu ja sciis, ĉu ili entute jam leviĝis ĝis la alteco de la 'numeeco', la prudentideo de la marsanoj!

Je tiu epoko, kiam oni sur la tero ekparolis pri jarcento de la naturscienco, la marsanoj de longe rerigardis ne nur la epokon de la vaporo, sed ankaŭ la epokon de la elektriko kiel malnovan kulturan heredaĵon. Tiam perfektiĝis ĉe ili nova scienca malkovro, kiu estis taŭga por kaŭzi novformadon de ĉiuj cirkonstancoj. Estis la malkovro de la sekreto de la gravito, kiu gvidis al neantaŭviditan ŝanĝiĝon de la tekniko kaj faris la marsanojn sinjoroj de la sunsistemo.

La gravito estas tiu forto, kiu regas la movojn de la astroj en la kosmo. Ĝi kunligas la sunon kun la planedoj, la planedojn kun iliaj lunoj, ĝi fiksas la objektojn ĉe la surfaco de la mondokorpoj kaj kaŭzas tion, ke tiuj ekzistas kiel daŭraj unuecaj grupoj en la kosmo; ĝi lasas la ĵetitan ŝtonon refali teren kaj la akvarojn kolektiĝi al la maro. Ĝi estas ĝenerala eco de la korpoj, kiu dependas de ilia reciproka pozicio en la spaco; laboron, kiun korpo kapablas fari kaŭze de la gravito, oni tial nomas spacenergio.

Se sukcesus eltiri el korpo tiun originalan formon de energio, kiun ĝi posedas kaŭze de sia pozicio rilate al la ceteraj korpoj, speciale al la planedoj kaj la suno, se sukcesus transformi ĝian graviton en alian energiformon, tiel oni farus tiun korpon per tio sendependa de la gravito; la gravito tra- aŭ ĉirkaŭpasus ĝin sen influi ĝin; ĝi fariĝus 'gravitimuna'. Ĝi estus altirata de la suno same malmulte kiel ligna peco de magneto. Sed tiam ja devus ankaŭ sukcesi forpreni la korpon de la influo de la planedoj kaj de la suno tiom, ke ĝi povus libere moviĝi en la kosmo; tiam do devus sukcesi trovi la vojon de unu planedo al la alia, de la marso al la tero.

Tio sukcesis al la marsanoj. Ili kapablis produkti korpojn de certa konsisto tiel, ke ĉiu ilin trafanta gravita efiko senspure preterpasis ilin kaj la de ili ĉirkaŭatajn korpojn – tio signifas senspure kiel pezeco. La gravita energio transformiĝis en alian energiformon. Tiajn korpojn ni povas nomi 'gravitimunaj'.

Du cirkonstancoj plifalicigis al la marsanoj ekkoni la sekreton de la gravito. Unu konsistis el tio, ke la gravito sur ilia planedo egalas nur trionon de tiu valoro, kiun ĝi posedas sur la tero. Ŝarĝo, kiu pezas mil kilogramojn sur la tero, havas, portite sur la marson, nur pezon de 376 kilogramoj; libere falanta korpo, kiu ĉe ni falas 5 metrojn malsupren dum la unua sekundo, falas sur la marso dum tiu tempo nur 1,8 metron kaj alvenas ĉe la milda rapideco de 3,6, anstataŭ ĉe ni preskaŭ 10 metroj. Pro tio estis pli facile por la marsanoj studi ĉiujn proprecojn de la gravito pli komforte kaj pli ekzakte.

La dua cirkonstanco estis geografia, aŭ, kiel ni devus diri ĉe la marso, areografia, nome la atingebeleco de la polusoj de la marso. Dum sur la tero la polusoj kun sia daŭra glacikovrilo gardas sin kontraŭ la vizito, la marsaj polusoj ne estas glaĉeriĝintaj. Ili ja kovriĝas en vintro per dika neĝkovrilo, sed kiu tamen estas pli malgranda ol sur la tero, ĉar la atmosfero de la marso enhavas multe malpli da humido. Krome la somero daŭras preskaŭ tutan teran jaron, dum kiu la poluso kuŝas

en daŭra sunbrilo, ke la neĝo plejparte fordegelas. La polusoj de la marso estas pro tio ne nur konataj al la marsloĝantoj, sed ili konstruis ĝuste sur ili siajn plej gravajn sciencajn staciojn. Ĉar la polusoj de planedo estas elstaraj lokoj, ĉar ili subkuŝas ne la rotacion ĉirkaŭ la akson dum la daŭro de tago kaj ili ofertas per tio okazon por observoj, kiujn oni ne povas fari alilolke tiel facile.

Ĝuste nun tio montriĝis plej grava por la esploro de la gravito. Por studi iliajn efikojn en la kosmo, tio signifas ilian interrilaton kun aliaj kosmaj fortoj, oni devis iĝi sendependa de la rotacio de la planedo ĉirkaŭ ĝian akson kaj de ĉiuj pro tio estiĝantaj komplikaĵoj. Tio povis okazi nur ĉe la poluso. De la poluso ja ekiris ankaŭ la esploradoj de la marsanoj.

La marsanoj estis malkovrintaj, ke la gravito, same kiel la lumo, la varmo, la elektro, propagas forme de ondomovo tra la kosmo kaj la korpoj. Sed dum la rapideco de la radianta energio, kiun ni observas kiel lumon, varmon kaj elektron, egalas 300.000 kilometrojn sekunde, tiu de la gravito estas milionoble pli granda. Laŭ la kalkulado de la marsanoj la gravito trairas la spacon per rapideco de 300.000 milionoj da kilometroj sekunde, do ĝi rilatas al tiu de la lumo preskaŭ tiel kiel tiu de la lumo al la rapideco de la sono. La vojon de la suno al la tero do la efiko de la gravito trairas dum duona milono de sekundo; ne mirigas, ke la astronomoj de la tero ne sekcesis konstati la de ili ja antaŭviditan finitan rapidecon de la gravito.

Korpon, kiu ne lasas la lumondojn trairi sin, ni nomas netravidebla; se ĝi lasus ilin komplete trairi, ĝi estus absolute travidebla, ni vidus ĝin same malpli kiel aeron. Korpo, kiu lasis la varmondojn trairi sin, restas malvarma; ĝi devas ensorbi ilin en sin, absorbi ilin por varmiĝi. Tiel estis nun, kiel la marsanoj malkovris, pri la gravito. La korpoj estas *pezaj* tial, ĉar ili absorbas la gravitondojn. Korpoj altiras unu la alian nur tiam, kiam ili ne lasas la de si reciproke venantajn gravitondojn trapasi sin. Sed tuj kiam korpo konsistas tiel, ke ĝi ne ensorbas la gravitondojn de planedo aŭ de la suno, sed lasis ilin libere trapasi, tiam ĝi ne estas altirata, ĝi ne havas pezecon, ĝi estas gravitimuna, gravitopasebla, kaj per tio senpeza.

La marsanoj eltrovis, ke la stelito, sur ilia planedo troviĝanta korpo, lasis sin ŝanĝi tiel, ke la gravitondoj povas trapasi. Kaj de tiu momento tiu korpo estis altirata nek plu de la marso nek de la suno. Certe estis neatingeble produkti absolute senpezajn korpojn, kiel ja ankaŭ absolute travideblaj korpoj ne ekzistas; sed tamen la gravito lasis sin malgrandigi, ke ĝi efikas nur apenaŭ rimarkeble ĉe la gravitimuna korpo. Pligrandigante kaj malgrandigante la pezecon, oni povis nun, se la korpo posedis certan rapidecon, per konvena uzo de la altiro de la planedoj kaj de la suno reguli la vojon de la korpo en la spaco – kondiĉe, ke oni troviĝis en tia gravitimuna korpo, en globo el stelito.

Tiun aŭdacaĵon produkti aparaton, en kiu homo povis lasi sin ĵetegi en la kosmon, por tiam per regulado de la altiro, kiun la mondokorpoj kaŭzis al ĝi, direkti ĝian vojon, tiun unue la marsano Ar entreprenis. Sed oni neniam estis revidinta lin. Ĉu li estis fluginta elen en la fiksastran mondon trans la sunsistemo? Cu li estis faleginta en la sunon? Ĉu lia spacoŝipo orbitis ĉirkaŭ la sunon aŭ iun planedon kiel nova trabanto? Neniu sciis.

Sed aliaj aŭdacaj esploristoj ne lasis sin fortimigi. Ili nun estis komprenintaj la teorian eblecon de la interplaneda trafiko, estis nun ne plu aŭdacegaĵo transdoni sin al la spaco, sed urĝa tasko de la kulturo kaj tial etika postulo, devo de la ‘numeeco’.

Nun la plej granda malfacilaĵo troviĝas nur en sendanĝerigi la rapidecon, kiun la planedo posedis en sia propra vojo kaj kiu transdoniĝis al la senpeza spacoŝipo, tiuj kiam ĝi forlasis la marson. Oni forvojaĝis de unu el la polusoj por esti sendependa de la rotacio de la planedo, sed la rapideco de la marso en ĝia vojo egalas 24 kilometrojn sekunde, kaj per tiu oni flugis elen en la spacon, for de la suno en la direkton de la tanĝanto de la marsvojo. Tiam dependas de tio, ke oni lasis sin altiri de la suno en la ĝusta momento por veni per la vojo de la spacoŝipo en la gravitareon de la tero. Do oni dependas tute de la ekzistantaj gravitaj fortoj kiel ŝipo sur la maro de la direkto de la akvo- kaj aerofluoj; kaj plian sukcseson oni povas esperi, ne antaŭ ol sukcesis trovi rimedon por devii de la direkto de la ricevita rapideco.

Sed ankaŭ tiu problemo estis solvita iom post iom. La historio de la homaj malkovroj sur la tersurfaco estis ne malpli riĉa de viktimoj ol tiuj de la provoj de la marsanoj glisi tra la kosmo. Sed finfine post multjara foresto spacoŝipo estis reveninta, kiu estis ĉirkaŭfluginta la teron trifoje en granda proksimeco. Alia surluniĝis sur la luno de la tero. Fine la senripoza teresploristo Col sukcesis ĉe sia tria kosma vojaĝo atingi la nordan poluson de la tero. La suda poluso estis surpaŝita unue de la kapitano All. De nun la vojaĝa tempo al la tero pli kaj pli malgrandiĝis per la perfektigita tekniko de la kosma vojaĝado, la metoda okupado de la norda poluso anstataŭis la sporadajn malkovrajn vojaĝojn. Kaj post kiam la surteriĝo estis same sekurita per la konstruado de la eksterna stacio kaj per la farado de la kontraŭgravita kampo kiel alveno de vaporŝipo en konvena haveno, la marsanoj atingis la sopiritan celon viziti la teron laŭplaĉe.

Nur certe, la du polusoj estis la ununuraj lokoj, kiujn ili kapablis atingi. Ĉe la suda poluso ili estis konstruinta similan, kvankam pli malgrandan kaj malpli uzatan stacion kiel ĉe la norda poluso. Ĉar nur dum la somero de la norda hemisfero ili povis teni la nordan stacion. Vintre ili translokis la kontraŭgravitan kampon sur la sudan poluson, kiu havis someron je tiu tempo. Kontraŭe ili ne sukcesis atingi la loĝatajn partojn de la tero. Ili ankoraŭ neniam estis ekkonintaj civilizan homon. Kelkaj eskimoj estis la ununuraj ekzempleroj, laŭ kiuj ili povis juĝi la proprecojn de la terloĝantoj. Sed ĉe iliaj orbitaj rivoluoj de la tero en la distanco de kelkaj mil kilometroj iliaj bonegaj instrumentoj kompreneble montris al ili la instalaĵojn de la kulturo tiom klare, ke ili ja sciis, ke la farintoj de tiuj faraĵoj ne estas eskimoj. Sed surteriĝi ĉe aliaj lokoj ol la poluso ili ĝis nun ne sukcesis. Per la rotacio de la tero la kondiĉoj tie iĝis tiel komplikaj, ke la teknikaj malfacilaĵoj ne povos esti venkitaj. Tiuj rezultis el la speciala naturo de la gravito kaj kondiĉe de tio el la konstruo de la spacoŝipoj, kiuj ne povis kontraŭstari la premon de la aero kaj ĝiaj ventegoj. Ankaŭ ĉe la poluso la surteriĝo estis sekure farebla nur, post kiam post multaj viktimoj estis sukcesinte konstrui la eksteran stacion kaj tiel teni la spacoŝipojn ekster la atmosfero. Kiel la ondofrapado de insulo proktektas kontraŭ surpriza atako de surinsuliĝantaj malamikoj, tiel la rotacio ĉirkaŭ ĝian akson kaj la denseco de ĝia atmosfero protektis la teron kontraŭ subitan invadon de la marsloĝanto el la aero. Nur ĉe la poluso ili povas establiĝi. Se ili nun volis avanci sur la tero, tio devis okazi trans la glaĉerojn kaj la glacierojn de la polusaj regionoj.

Certe la marsloĝantoj nun intencis tion. Sed la transiro de tiuj glaciaj zonoj prezentis al ili tiom da malfacilaĵoj, kiel se eŭropanoj volis iri en la detruantan marĉoklimaton de tropika praarbaro aŭ tra la senakva dezerto. Niaj ŝipoj ja portas

nin al la bordo de nekonataj landoj, sed en la internon ni kapablas rigardi nur pli malfrue kaj kun la plej grandaj malfacilaĵoj. La marsanoj devis barakti sur la tero antaŭ ĉio kontraŭ du grandegaj obstakloj: aero kaj pezeco. La denseco de la aero, ĝia humideco kaj la alteco de la aerpremo estis detruaj por la konstitucio de iliaj korpoj; ili povis elteni la klimaton de la tero nur mallonge. La forteco de la gravito, trioble pli granda kiel sur la marso, malhelpis iliajn movadojn kaj premis la trioblan ŝarĝon sur ĉiun el iliaj mekanikaj laboroj. Ili tute ne povintus porti tiun, se ili ne posedintus tre gravan muskolan forton laŭ kondiĉoj de sia planedo. Ĝuste nun, kiam la nordpolusa ekspedicio de Torm fiaskis en ilia sengravita kampo, ili estis preparantaj avancon suden. Ĉar sur la marso sukcesis la eksperimentoj produkti materialon, kiu lasis sin fari senpeza kiel la stelito, sed kiu posedis ĉe tio sufiĉe da solideco por kontraŭstari la varmecon kaj humidecon de la aero. De ĝi multaj marsanoj esperis, ke ĝi preparos al ili la vojojn tra la tera aero.

9a Ĉapitro – La gastoj de la marsloĝantoj

Kiam Saltner vekiĝis la duan fojon sur la insulo, li miris ne malmulte retrovi sin en tute ŝanĝita situacio. La ĉambro estis mallumigita, tamen la plafono briletis je nebrila grizo tiel, ke li pli-malpli povis vidi sian ĉirkaŭaĵon. Li vidis tuj, ke li estis portita en alian ĉambron. Fenestroj ne ekzistis, kaj li ne kapablis aŭdi la muĝadon de la maro. Kontraŭe, li vidis malproksime de sia lito kelkajn korbojn kaj pakedojn staplitajn, en kiuj li kredis ekkoni parton el la enhavo de la nacelo de la subakviĝinta aerostato. Se nur estintus iomete pli hele! Sed kiel li povis ricevi lumon?

Unue li zorgeme levis sian brakon por ne denove fari senintencan aersalton, kaj kiam li rimarkis, ke li troviĝis sub la kutimaj cirkonstancoj de la tergravito, li sidiĝis dinamike sur la randon de sia lito. Kaj vidu, en tiu momento, en kiu liaj piedoj tuŝis la plankon, heliĝis en la ĉambro. Ĉe la plafono, vasta tegmenta fenestro estis formiĝinta, kaj la suno enbrilis mildigite nur per maldika ekrano. Li ekkonis nun, ke li fakte havis la proprietaĵojn de la ekspedicio antaŭ si, li trovis ĉe tio ankaŭ sian zorgeme purigitan kaj sekigitan vestaĵon. Kaj sur la planko kuŝis eĉ lia glacipioĉeto, kiun li kunportis por eblaj glaĉerogrimpadoj ĉe la norda poluso. Rapide li ekstaris, kaj jam ĉe la unuaj paŝoj, kiujn li provis sur la mola tapiŝo de la ĉambro, li sentis, ke li denove tute bonfartis kaj refortiĝintis. Li ŝovis kurtenon ĉe sia maldekstra flanko flanken kaj vidis malantaŭ ĝi diversajn aparatojn, kiuj ŝajnis al li plej fremdaj, sed lasis diveni tiom, ke ili estis banaparato kaj tio, kio krome apartenis al la tualetejo de marsano. Aŭdaconte uzi la al li ĝis nun nekonatajn objektojn, li esploris unue la ceterajn partojn de la vasta dormĉambro. En la mezo de la kontraŭe de la lito staranta muro troviĝis granda pordo, kiun li provizore ne aŭdacis malfermi. Li turnis sin nun dekstren kaj rimarkis, ke la panelaĵo de tiu flanka muro ankaŭ enhavis pordon, sed kiu ne estis tute fermita. Ĝi gvidis en mallumigitan ĉambron. Kiam Saltner palpumis ĉe la al li nekonata mekanismo, la pordo enruliĝis kaj per tio lasis pli da lumo en la ĉambron. Tiam li ekvidis ĉe la kontraŭa muro liton saman kiel la sian kaj li ekkonis – je sia neesprimebla ĝojo – Gruntheon, kiu kuŝis en trankvila dormeto.

"Bonan matenon, doktoro", Saltner vokis senĝene. "Kiel vi fartas?"

Grunte malfermis la okulojn mirante.

"Ĉu Saltner?" li diris.

"Ĉi tie ni estas, viglaj kaj sanaj, kiu pensintus tion! Sed la povra Torm – Neniu scias ion pri li!"

"Kaj ĉu vi ja scias", demandis Grunthe, tuj instigite, "kie ni troviĝas?"

"Mi scias, sed vi certe ne volos kredi tion. Aŭ ĉu vi jam parolis kun la honesta

Hil aŭ la bela Se?

"Ni estas en la forto de la Numeoj", Grunthe respondis sinistre. "Ĉu ni estas solaj?"

"Laŭ mia scio, sed la diablo fidu tiujn maŝinarojn – kiu povas scii, ĉu oni ne aŭdas kaj vidas de ie ajn ĉion, kio okazas ĉi tie, aŭ ĉu iu ajn sekreta fonografo ne protokolas ĉiun vorton. Nu, la german ili provizore ankoraŭ ne komprenas."

"Kioma horo estas? Kiel longe mi estis senkonscia?"

"Nu, se vi ne scias tion! Mi pensas, ke ĉi tie ekzistas tute neniu tempo."

"Nu, tiu ĉio lasos sin difini, kiam ni nur revidos la liberan ĉielon", Grunthe diris. "Sed kiel oni povas ĉi tie ŝalti lumon?"

"Bonvolu paŝi per viaj piedoj sur la plankon antaŭ via lito, tiam tagiĝos. Ni estas en la lando de aŭtomata servado."

"Tion mi ne kapablas, plej kara Saltner, mia piedo estas vundita.

"He – tio estus – lasu vidi –"

"Estas nenio, mi jam estas bandaĝita, sed mi ankoraŭ devas provizore resti kuŝanta.

Saltner intertempe estis rapidinta al la lito de Grunthe, kaj en tiu momento, en kiu li surpaŝis la tapiŝon antaŭ tiu, la tegmenta fenestro malfermiĝis.

"Vidu", Saltne vokis,"iom post iom oni lernas la marsarkanojn. Cetere, mi jam konas iomete la marsan kaj mi tuj mendos por vi matenmanĝon. Permesu nur, ke mi unue faras iom da korpa flegado.

Li rapidis al la alkovo, kiu evidente servu kiel tualetejo, kaj pripensante stariĝis antaŭ la aparatojn.

"Tio ŝajnas al mi esti banujo", li diris, dum Grunthe aŭdis tra la pordo lian duonlaŭtan monologon, "sed akvo ne estas en ĝi." Kaj tio ĉi devus esti lavtablo. Sed ĉi tie estas tri diferencaj teniloj, kaj ĉiu havas sian surskribon – nur ke mi ne kapablas legi ilin. Mi ja ne havas konon. Nu, mi turnos iom. Eble akvo elvenos."

Li atenteme turnis kejlon, pensante, ke la sub tiu troviĝanta malprofunda ujo pleniĝos iel per akvo. Sed antaŭ ol li povis gardi sin, la ujo eksaltis antaŭen etendiĝante al tablo kaj malgalante frapis lin kontraŭ la stomako. Kun 'ha lo' li saltis reen, sed li trovis sin tuj denove stumblante antaŭenrapidigita, ĉar samtempe seĝego estis ekleviĝinta malantaŭ lia dorso el la planko. Rekolektinte siajn fortojn post la unua ektimo, li zorgeme alrigardis la aferon, provis ĉe la tablo kaj la seĝego, kaj ĉar li trovis ilin stabilaj, li komforte sidiĝis sur la seĝego.

"Kio ja okazas?" Grunthe demandis el sia lito.

"Akvo ne estis", Saltner diris, "sed oni sidas ĉi tie sufiĉe bone. Nun ni volas provi la duan kejlon." Sed rapide li reekstaris saltante, li pensis, ke la dua mantenilo eble servus al remalaperigi tablon kaj seĝegon, kaj je tiu okazo li volis unue memsekuriĝi. Sed okazis alie. Li ricevis nur puŝon de elsaltanta tirkesto ĉe la manon. La tirkesto enhavis nombron de tiuj buŝajutoj, kiujn la marsanoj, kiel Saltner sciis, uzis por trinki, kaj nun li rimarkis ankaŭ, ke super la tablo tri malfermoj malfermiĝis, al kiuj la buŝajutoj konvenis.

"Stop", Saltner dirs, "ĉi tie ekzistas trinkaĵo. Sed ĉe tio ni ja volas atendi.

Li turnis la trian tenilon. Basenforma bovlo vidiĝis, kaj en tiun falis el malsupre troviĝanta malfermo fingrodikaj, helbrunaj objektoj, kiuj havis proksimume la formon de malgrandaj kolbasoj.

“Do tio estas matenmanĝo kaj ne tualetejo”, Saltner vokis ridante kaj gustumis la tre invitante aspektantajn kaj spice odorantajn stangojn. Ili ege bongustis kaj evidente estis krusteca bakaĵo, kiu estis plenigita per forta farĉo. Almenaŭ Saltner opiniis ilin tiaj. Sed dum li manĝis la unuan stangon, la aparato daŭrigis sian funkcion, kaj bakaĵo post bakaĵo falis en la bovlon, ĝis ĝi estis plenigita ĝisrande. Tio estas tro da beno, Saltner pensis kaj serĉis ĉirkaŭe, kiel tiu enigma nutraĵofonto lasus sin malŝalti. Sed vane, la kejlo mem ne lasis sin returni – Saltner ne sciis, ke por tiu celo oni devis unue malŝalti la aŭtomatan disdonilon de la bakaĵo turnante la bovlon. Plian mantenilon li ne sukcesis trovi, kaj tiel nehaltigebla fluo de viandorulaĵoj eliĝis sur la bovlon, falis de tie sur tablon kaj plankon kaj impone ekamasiĝis. Saltner malespere kuris tien kaj reen, sed li ne trovis rimedon – li ne volis perforte ŝtopi la malfermon. – Finfine li pensis, ke la stoko devos iam elĉerpiĝi, kaj volis lasi la aferon daŭri. Li nun volis forpreni la sur la bovlo kuŝantajn pecojn por alporti porcion al Grunthe, ĉe tio li rimarkis, ke la bovlo lasis sin turni, kaj subite la plua eldono de bakaĵo ĉesis.

Li kolektis la ĉirkaŭe kuŝantajn amasojn de la delikataĵo escepte de malgranda resto kaj portis ilin en la ĉambron de Grunthe, kiu ĉe tiu rigardo kaj la tragikkomika mieno de Saltner ne povis reteni rideton. Tie li kaŝis ilin en unu el la malplenaj korboj de la ekspedicio, ĉar ankaŭ en la ĉambron de Grunthe oni estis portinta parton de la el la nacelo savitaj objektoj.

“Kial vi ne simple lasas la aĵon?” Grunthe demandis.

“Tio ne eblas, alikaze mi estus hontegigita antaŭ la damoj kiel stulta Bat’. Cetere mi sopiras la matenmanĝon; sed unue mi ja devas rigardi, kiel mi trovos lavakvon.

Li laŭvice turnis diversajn mantenilojn, sen ke li trovis la deziratan. Foje ŝranko malfermis, kiu enhavis por li nekompreneblajn aparatojn, foje lampoj eklumis en diversaj lokoj de la ĉambro. Tiam bovlo vidiĝis, kaj li jam esperis esti ĉe la celo, sed ektimigite li saltis malantaŭen, ĉar la bovlo ekvarmiĝis. Finfine en angulo de la ĉambro la planko plivastiĝis al malprofunda baseno, kaj fontano ŝprucis. Atenteme Saltner konvinkiĝis, ĉu vere estis akvo, kaj tre ĝojis, kiam lia konjekto konfirmiĝis. Nun li kompletigis sian korpan flegadon helpe de siaj retrovitaj vojaĝaĵoj kaj eksidis kun plezuro ĉe la matenmanĝa tablo.

Ŝajnis nekutime kaj strange por li, ke la tableto estis tiel malplena kaj enhavis nek glasojn nek tasojn aŭ kulerojn kaj tranĉilojn. La bakaĵon li volis meti almenaŭ sur teleron kaj pro tio rigardis denove ĉirkaŭe en la ĉambro. Li rimarkis nun, ke ankaŭ granda spegulo troviĝis en la ĉambro, apud kiu staris tresto kun pluraj brilantaj rondaj diskoj, kiujn li opiniis teleroj. Li alportis tian teleron kaj metis sian matenmanĝan bakaĵon sur ĝin. Tiam li gustumis la trinkaĵon, kiun la malfermoj super la tablo volonte donacis, post kiam li fiksis la buŝajutojn ĉe ili. Estis unu varma kaj du malvarmaj likvoj, kiujn li ricevis kaj nomis ĉokolado, vino kaj minerala akvo, ĉar ili havis plej da simileco al tiuj trinkaĵoj, kvankam li diris al si, ke ili tamen multrilate diferencis de la sur la tero kutimaj plezuroj de tiu speco. Speciale la ĉokolado estis tre grasa.

Nove refortigite li paŝis en sia bonvesta vojaĝa kostumo al Grunthe en la ĉambron kaj diris:

“Mi nun estas preta daŭrigi nian polusan esploradon. Espereble ankaŭ vi povos baldaŭ veni kun mi. Sed antaŭ ol ni diskutas, kion ni devas fari, mi ja volas vidi, ĉu

mi ni ne povas havigi trinkaĵon por vi. Vi ja devas havi teruran soifon."

"Koran dankon", Grunthe respondis ridante, "vidu, kion mi havas." Kaj li montris al la buŝajuto de tubo, kiu pendis malsupren apud lia kapo super la lito. "Kaj jen", li daŭrigis, "gustumu tiun pasteĉon aŭ tiun, kiu ajn alia ĝi estas. Mi ja tute ne scias, kiel ĝi vere gustas, sed mi sentas min per tio mirinde fortigita. Se mia piedo ne malhelpus min, mi tuj ekstarus.

"Damne ankaŭ, tion mi toleras! Kion vi malkovris? Intertempe mi turmentis min mem, ricevis diversajn puŝegojn kaj sufiĉe malordigis la ĉambron. Kiel vi trovis tion, ĝi ja antaŭe ne ĉeestis ĉi tie?"

"Simple pripensante. Mi diris al mi, ke la marsanoj estas pli saĝaj ol ni kaj ĉiukaze pli prudentaj. Se ili nun havas pacienton, kiu ne kapablas paŝi, ili ja alportos matenmanĝon por li ĉe la liton, kaj se ili mem ial ne volas veni, ili ja metos ĝin al li. Do mi rigardis ĉirkaŭen. Nun rigardu tiujn du malgrandajn etikedojn ĉe tiuj ringoj."

"Tiuj ja estas latinaj literoj!"

"Certe. Estas du vortoj de la eskima lingvo. 'Misalukpok' kaj 'Imerpok'. Unu signifas 'manĝaĵon' kaj la alia 'trinkaĵon'."

"Kial oni ne algluis tiajn surskribaĵojn ankaŭ por mi? Ĉe mi ĉiuj etikedoj estas en signoskribo, kiu ĉiukaze estas marsa."

"Vi ja ne komprenas la gronlandan."

"Sed kiel la Numeoj scias, ke vi komprenas ĝin?"

"Ĉar mi hieraŭ interparolis kun marsani... – kun iu en ĝi."

"Ha, Grunthe, vi superas min! Sed mi ne komprenas ion, kiel la personoj, la sinjoroj marsanoj, povis scii, kiel oni skribas tiujn vortojn per niaj literoj?"

"Tio klariĝis ankaŭ ne al mi. Vidu, estas klasika tiparo, ekzakte pentrita laŭ la latinaj presliteroj. Kaj mia malgranda vortaro ne plu ĉeestas, el tiu ili prenis la signojn. Sed kiel ili trovis la ĝustajn vortojn en la libro, tio estas entute enigma por mi. Ĉar ili ja konas nur la sonon de la eskimaj vortoj, sed ne la presitajn signojn."

"Estas timiga afero", Saltner diris. "Sed bona virino ŝi ja estas, tiu Se, mi estas tute ravita! Se mi nur scius, kial neniu homo venas al ni, neniu Nume', mi volis diri, ĉar ili ŝajne vantegas pri tio, ke ili estas ne homoj."

"Ankaŭ tion mi povas diri al vi, Saltner. Ĉu vi vizitus viajn gastojn nokte inter la tria kaj la kvara?

"Ĉu tiu estas la horo? Sed antaŭe vi ja ne sciis ĝin, kaj mi pensas, ke ĉe la poluso horo tute ne ekzistas."

"Konvencia horo ja devas ekzisti. La personoj ja devas difini, kiam ili dormu kaj kiam ili tagmanĝu. Do ni ekzemple kunportis nian centreŭropan unuecan tempon sur niaj poŝhorloĝoj, kaj laŭ tio nun estus la naŭa kaj 55 minutoj antaŭtagmeze. Kiam la aerostato fiaskis, estis ĉirkaŭ la sesa vespere laŭ la centreŭropa tempo. Sed mi nur ne scias, ĉu de tiam unu aŭ du noktoj pasis, ĉar tio dependas de la daŭro de niaj senkonscieco kaj dormo."

"Ankaŭ mi ja ne scias tion. Mi ne scias ankaŭ, kiam nia unua vekiĝo okazis; la via supozeble baldaŭ post la mia."

"Nu, lasas sin difini poste el la deklinacio de la suno, kiu dato estas. Mi remalkovris mian horloĝon nur nun – ambaŭ horloĝojn, kaj ĉar ili akordiĝas, ili ankaŭ ne haltis.

"Ne, mi havas la saman horon –"

“Jes, sed kiun horon uzas la marsanoj ĉi tie? Vidu, ili informis min ankaŭ pri tio, kaj pro tio mi scias, ke estas nun dormtempo por ili kaj ke ili eble ellitiĝos nur post du horoj. Tial mi diras, ke estas inter la tria kaj la kvara ĉe niaj gastigantoj; kiel ili nombras kaj nomas la horojn, tion mi ankaŭ ne scias.”

“Sed Doktoro, kiel vi ja scias, kia tagdivido estas modo ĉe la marsanoj kaj kion la sonorilo sonis ĉe ili?”

“Ĉu vi ja kredas, Saltner, ke en dormĉambro, kiu estas ekipita per ĉiu komforto de la marsanoj, mankas horloĝo?”

“Mi vidis neniun kaj ankaŭ ne vi antaŭe.”

“Sed intertempe mi malkovris ĝin. Ĉu vi vidas la pentraĵon, kiu ĉirkaŭas la cirkloforman malfermon de la tegmenta fenestro? Ĝi estas dividita je dek du oble dek du samaj segmentoj. Kaj tiuj mallarĝaj helaj strioj, kiujn vi vidas inter ili, ne fikse kuŝas, sed moviĝas sur la ringo. Tio nur iom post iom klariĝis al mi, dum mi trankvile kuŝis ĉi tie dum via korpa flegado kaj fiksrigardis alten. Jen vi havas la horloĝon de la marsanoj.”

“Mi ja alrigardas ĝin, sed mi tute ne komprenas ĝin.”

“Ankaŭ mi ne scipovas malĉifri ĝin. Sed vidu, du etikedoj estas almetitaj, kiuj evidente ne apartenas al la horloĝo, sed informas nur por hodiaŭ, por ni. Unu montras ferman, la alia malferman okulojn. La signifo estas klara: dormi kaj maldormi.”

“Estas ĝuste, kaj tiu hela strio –”

“Tiu estas la horomontrilo –”

“Mi pensis tion. Ĝi ankoraŭ staras ĉirkaŭ je dekduono de la tuta cirklo antaŭ la malferma okulo.”

“Do mi konkludas, ke ankoraŭ estos du horoj ĉirkaŭ ĝis la ekvekiĝo de la marsanoj.”

“Sed ĉu vi ne opinias tion stranga, ke ankaŭ la marsanoj dividas la tagon je dek du horoj?

“Ĉu ankaŭ? Ni ja dividas ĝin je dudek kvar –”

“Nu, tiu estas du oble dek du.”

“Ke la dekduo ripetiĝas, tute ne mirigas min – mirigus min, se estus alie. Tio kuŝas en la naturo de la nombro, tio signifas en la naturo de la konscieco mem. La leĝoj de la matematiko estas la leĝoj de la mondo. 12 estas 3 oble 4, la plej malgranda el ĉiuj nombroj, kiu posedas la unuajn tri nombrojn 2, 3 kaj 4 kiel dividantojn. Ĉiuj inteligentaj estaĵoj, kiuj praktikas matematikon, faros la 12-on, sekve la 60-on fundamento de siaj dividoj.

“Sed ni ja havas la dekon –”

“La malnova astronomio elektis la dekduon – dek du signoj formas la zodiakon – la deko estas nur nescienca refalo en la sensan alrigardon de la dek fingroj – butikista politiko – sed ni lasu tion.”

“Mi ne kontraŭas”, Saltner diris. “Sed kion ni faras nun? Unue vi memkompreneble devas finsanigi vian piedon.”

“Mi timas”, Grunthe respondis, “ankaŭ tiam ni povos fari nenion alian, ol la marsanoj decidos pri ni. La ekspedicio verŝajne sufiĉe finiĝas. Intertempe ni eble plej ekkonu la cirkonstancojn. Rekognosku iomete!”

Mi jam ĉirkaŭrigardis en la ĉambro, kaj mi ne ŝatus provi pli de la enigmaj instrumentoj – oni tro facile povas honti. Mi sentas min kiel savaĝulo en fizika instituto,

nur ke iu kiel ni ne posedas la necesan naivecon.

"Kiujn elirojn ni ja havas?"

"Nur unu el ĉiu de niaj ĉambroj. Mi ne scias kiel malfermi la pordon. Mi kredas, ke estas pli dece, ke ni atendos ĉi tie, ĝis oni vizitos nin, ol ke mi traserĉos sencele."

"Vi pravas! Eble vi bonvolas ordigi niajn aferojn, kaj se vi trovos mian taglibron, mi petos ĝin de vi. Unue ni devas atenti, ke ni sekurigas kaj la posedaĵon de Torm kaj la oficialajn dosierojn de la ekspedicio.

"Mi jam metis kelkion ĉi tie flanken", Saltner diris ordigante inter la objektoj, kiujn la marsanoj estis savintaj el la nacelo. Ili estas parte difektitaj per la falego kaj la mara akvo.

"Ne estus tute malagrable por mi", Saltner daŭrigis, "se iom de nia provianto ankoraŭ estus uzebla. Ĉar mi ne vere fidas, kiel salubra tiu kolbas-aŭtomato estos por oni. Vidu, kiun ĉion la sinjoroj Numeoj kolektis. Tien ili metis la botelujon kun la du boteloj da ĉampano, kiun vi ekstremkaze ĵetis kiel balaston sur la insulon. Mi ja pensis, tiu disbatus la kapojn al ili kaj disrompiĝis je mil pecoj ĉe tio. Sed ĝi ŝajnas tute sendifekta. Nu, mi volas preni la du Monopolojn nur el la kesto. Tiujn ni ja neniam povas alrigardi kun plezuro. Povra sinjorino Isma!" Li elprenis la botelojn.

"Stop", li diris, "tie en la botelujo ankoraŭ metiĝis pakedeto. – Kion ni ja havas tie?"

La fermilo estis malferma. Libro en la grandeco de notkalendaro ekvidiĝis.

"Nu", Saltner diris, "sinjorino Isma ja ne estos doninta albumon al ni. Sed vidu, Grunthe, kio tio estas."

"Kial tio koncernas min?" Grunthe bruske diris.

Saltner malfermis la libron. Li ekmiris videble, foliumis en ĝi kaj enrigardis longe.

"Tio estas –" li tiam diras kapskuante, "tio ja estas – Sed kiel tio eblas?"

La malgranda libro enhavis vortliston de la lingvo de la marsanoj; la vortoj estis transskribitaj helpe de la sonsignoj de la latina alfabeto, apude troviĝis germana traduko kaj samtempe la signo de la vorto en la stenografia skribo de la marsanoj. Saltner ekkonis la signifon de la enhavo el la malmultaj al li konataj vortoj.

"Diru al mi nur unu", li daŭrigis, "la menso stagnas al mi – kiel germana-marsa vortaro povas veni ĉi tien – kiel ĝi ja povas ekzisti?"

Grunthe senvorte etendis la manon kaj ekprenis la libron.

Li ĵetis nur unu rigardon en ĝin. Tiam li mallaŭte diris: "Tio estas la manskribo de Ell."

Pripensante li malfermis la okulojn. Li estis denove konfrontata kun la nesolvebla enigmo – kiel Ell ekkonis la lingvon de la marsloĝantoj? Kaj se li konis ĝin, kial li ne malkaŝe estis interparolinta pri tio? Kial li ne estis doninta la lingvoinstruadon al li aŭ Torm? Kiel ĝi venis kaŝite en la botelujon, sub la botelojn?

Li sciis neniun respondon.

Intertempe Saltner ekprenis la libron kaj serĉante kolektis kelkajn vortojn el tiu.

Tiam li aŭdis en la apuda ĉambro mallaŭtan ridon kaj la voĉojn de la marsanoj. La kuracisto Hil enpaŝis en la ĉambron de Saltner. Se estis akompaninta lin ĝis la pordo kaj bonege amuziĝis pri la malordo, kiun Saltner estis kaŭzinta, plej pri tio, ke li estis uzinta ĉe sia matenmanĝo kiel telerojn la kombilojn. La plataj diskoj, kiujn Saltner estis opiniinta teleroj, servis al la marsanoj por ordigi la hararon; ili estis

elektre ŝarĝitaj kaj tiam streĉis la harojn rekte for de la kapo. “Estas tro amuze”, Se ridis. «««f“Sed ni volas nun diri nenion al li, al la povra ‘german Saltner’.” Post tio ŝi retiriĝis. Ĉar estis tro ‘peze’ por ŝi en la ĉambroj de la Bateoj.

Hil enpaŝis ĉe Grunthe kaj Saltner.

10a ĉapitro – La kaj Saltner

Hil estis tre kontenta pri la farto de siaj pacientoj. Kun granda intereso li spektis iliajn aĵojn. Sed videbla ekmiro pentriĝis sur liaj traĵtoj, kiam Grunthe donis al li la malgrandan germanan-marsan lingvogvidlibron. Li fervore foliumis en ĝi, kaj montrante al unuopaj signoj de la marsa skribo kaj lasante diri al si la apudan germanan vorton li sukcesis direkti kelkajn demandojn, kiujn Grunthe respondis per la reciproka metodo. Ĉar mankis tempo al li por tuj komenci la reciprokan lingvinstruadon, li demandis al Grunthe helpe de la gronlanda, ĉu li ne volas paroli la marsan kun La, kiu volonte okupiĝas pri lingvostudoj, por sufiĉe baldaŭ alveni al reciproka kompreno. Al Grunthe tio estis tre malagrabla. Li sufiĉe ĝojis, ke neniu el liaj flegistinoj lasis sin vidi ĉi tie ĉe li, kaj pro tio li proponis al Saltner anstataŭi lin tiurilate. Kvankam tiu ne povis uzi la lingvon de la eskimoj kiel ligantan rimedon, li tamen kredis, ke la helpo de la Ella lingvogvidlibro sufiĉis al li kaj volonte deklaris sin preta por ĉiuj servoj.

Hil prenis la lingvogvidlibron kun si kaj gvidis Saltneron en la apudan grandan salonon de la marsanoj. Ĉi tie li prezentis lin al nombro de la tie kunvenintaj marsanoj, inter ili troviĝis la estro de la stacio Ra kun sia edzino same kiel krom kelkaj aliaj marsaninoj ankaŭ Se kaj La.

Saltner ne sciis kien turni siajn okulojn unue. Preskaŭ ĉio, kion li vidis, estis fremda al li, plej surprizis lin la figuroj de la marsanoj mem. Estis agrable por li, ke li povis silenti pro manko de lingvokonoj kaj kontentigi per vidi. Hil diris la nomojn de la unuopuloj al li, kiuj salutis lin per siaj marsaj manmovoj, kion Saltner respondis per eŭropaj riverencoj. Bedaŭrinde tiuj okazis iomete rigide, ĉar li devas esti tre zorgema pro la malgrandigita gravito. Li ja vidis ĉe la vizaĝoj de tiuj marsanoj, kiuj ekvidis en li la unuan fojon eŭropanon, kiel ili penis kaŝi sian amuzon pri lia mallerto. Pro tio estis tre agrable al li, kiam la plimulto de la ĉeestantoj retiriĝis.

Tuj post lia eniro al li frapis la okulojn apud la ĉarma Se la figuro de La, kaj kiam ĉe la mencio de la nomoj li ekkonis, ke tiu grandioza estaĵo estu lia lingvinstruistino, li ekspektoplene fiksis siajn rigardojn al ŝiaj trajtoj. Sed en ŝiaj grandaj okuloj neniu spuro de moko estis rimarkebla, ŝi salutis lin kun trankvila amindeco, kaj rideto, kiun ŝi interŝanĝis kun Se, diris al tiu, ke tiu Bat' plaĉis al ŝi pli ol la alia. Saltner estis konvenkita, ke li rapidege progresus, se lin logus la aprezo el tiaj okuloj kiel rekompenco. Li ja nur ne sciis kiel komenci, ĉar neniu el ambaŭ konis la lingvon de la alia. La alportis kelkajn librojn el la biblioteko, inter ili la al li jam konatan maparon, kiu servintis al li por la unua interkompreniĝo kun Se. Ŝi

poste ekkuŝis en sia ŝatata pozicio sur la divano kaj mansvingis al Saltner, ke li sidiĝu apude ĉe ŝia flanko. Ŝi komencis nomi kelkajn objektojn, kiuj prezentis sin al senpera rigardo, kaj lasi sin ripeti la nomojn marse kaj germane. Sed tiel la afero tro malrapide progresis. Ŝi ekprenis la lingvogvidlibron, kiun Se tenis en la mano. Se ĝis nun estis foliuminta en la libreto kaj kopiinta nombron de germanaj vortoj sur strio de travidebla papero per tio, ke ŝi metis kaj alpremis la paperon momenton sur la koncernan vorton. La papero estis lumsentiva kaj apartenis al malgranda poŝrapidfotilon, kiun oni kutime kunportis kiel notlibron. Saltner legis: "Lernanto diligenta. Instruisto strikta. Teleaŭdilo. Ĉion aŭdi.

Kiam li denove altenrigardis, li vidis, ke Se petole ridis. Tiam ŝi faris ion ĉe la aparatotablo kaj malproksimiĝis kun afabla mansvingo: "Tio estas bona", La diris, "ŝi streĉis la fonografon." Poste ni povas bone ripeti nian laborkvanton.

Tiam La ekprenis la lingvogvidlibron kaj trarigardis kun Saltner la proverbojn kaj la interparoladetojn, kiuj tie estis montrataj en ambaŭ lingvoj. Li legis ilin germane, ŝi marse, kaj ambaŭ kore ridis inter tio, kiam ili provis plibonigi sian elparoladon aŭ komikaj miskomprenoj aperis. Saltner devis rigardi tuj apude trans la ŝultron de La pro legi en la libro. Estis ne eviteble, ke lia rigardo vagis al la grandioza koloro de ŝia hararo kaj al la molaj formoj de la nuko kaj ke la vortoj kelkfoje konfuze elvenis. Stranga varmofluo eliris el ŝia korpo, kaj tio ne estis nur ludo de lia fantazio; li eksciis pli malfrue, ke la marsanoj fakte havas pli altan sangovarmon ol la homoj. Li rimarkis, ke liaj sensoj konfuziĝis. Kaj ankaŭ tio havis sian kialon ne nur en liaj sentoj, sed estis ankaŭ efiko de la malgranda gravito, al kiu lia konstitucio ankoraŭ ne estis alkutimiĝinta. La sango estis pli forte pelata al lia kapo.

La baldaŭ rimarkis tion. Li donis la libron al li por teni, kaj klinis sin malantaŭen kaj malŝaltis la kontraŭgravitan kampon. Baldaŭ Saltner sentis sin pli bone, kaj la studoj daŭris kun novigita forto. Tiel rapide pasis kelkaj horoj. Kaj subite elmontriĝis, ke la instruistino lernis pli de la germana ol la lernanto de la marsa. Ne malpli ol Saltner estis lerninta Grunthe ĉe tio, kiu aŭskultis la parolekzercojn per la teleaŭdilo. Li demandis, ĉu li nun povus havi la libron dum iom da tempo.

La malŝaltis la pezecon por povi denove libere moviĝi.

"Ho, kiel distrita mi ja estas!" ŝi elvokis. "Ni ja ne bezonus peni kun la unu ekzemplero. Se vi permesas la libron al mi ankoraŭ duonan horon" - ŝi diris per la telefono al Grunthe –, "mi do tuj lasas multobligi ĝin."

Ŝi skribis kelkajn vortojn sur peceton de papero, metis tiun en la libron kaj enkovertigis la tuton. Tiam ŝi ĵetis la malgrandan pakedon en sur la muro troviĝantan keston.

Saltner mirege spektis ŝin.

"Tio estas la pneŭmata poŝto al la metiejo", La diris klarigante. "Daŭros ne longe, tiel ni ricevos la kopiojn de la libro, sed ne en via mallerta formato, sed en nia beleta tabulformo." Ŝi klarigis la diratan per diversaj gestoj.

"Kaj kiu faras tion?" Saltner demandis.

"Tiu el la teknikistoj, kies vico estas por la tago. La labortempo alternas laŭregule. Ĉiu havas sian specialan terenon. Mi ekzemple devas peni kun la lernado de la teruraj homlingvoj. Ĉu vi komprenis min?"

Ĉar Saltner ankoraŭ havis sufiĉe demandanta vizaĝon, ŝi ripetis la respondon, je lia mirego en iomete stranga, sed komprenebla germana.

“Vi ja parolas la germanan, La La!” li elvokis.

“Vi ne atentis”, ŝi diris ridante. “La vortoj ja troviĝis ĉiuj hodiaŭ en nia laborkvanto. Ni volas ripeti ĝin.” Ŝi iris al la tablo kaj premis la butonon de la gramofono.

Oni tuj reaŭdis la vortojn, kiujn La estis dirinta al Se ĉe sia adiaŭo. La retiriĝis nun sur sian divanon, malŝaltis la kontraŭgraviton kaj mansvingis al Saltner, ke li sidiĝu.

Li sentis sin tute strange, kiam li tiel denove aŭdis sian propran voĉon, ĉiun vorton kun la propra akcento, ĉiun paroleraron – inter tio la malaltan, duonlaŭtan organon de La kaj ŝian mallaŭtan ridon. La oblikve enfalantaj sunradioj ŝoviĝis ĝis ĉe la lito de La kaj ekvidigis strangan kolorludon inter la malfirmaj ondoj de ŝia hararo, ili ludis kiel maro de fajrero sur la briletantaj fadenoj de ŝia vualo, kiuj mallaŭte leviĝis kaj malleviĝis ĉe ŝiaj spiroj. Ĉu li ankoraŭ estis li mem, aŭ ĉu li estis forigita en foran spiritan landon kaj devis nun lasi preterpasi sian propran vivon?

“Ne revu”, La diris duonlaŭte, “antentu.”

Nun li denove aŭskultis la vortojn laŭ ilia lingva senco, li ripetis.

Tiam klakis ĉe la poŝtkesto.

“Tie estas niaj libroj”, La diris. “Bonvolu malŝalti la gramofonon kaj malfermi la keston.

Saltner plenumis la taskon. Li ellevis el la kesto pakedon, kiu enhavis la kopiojn de la lingvogvidlibro. La elprenis la originalon kaj donis ĝin al Saltner.

“Jen”, ŝi diris, “reportu tiun al via amiko, kun plej bona danko. Kaj se plaĉas al vi, ni laboros posttagmeze ankoraŭfoje.”

“Disponu klomplete pri mi”, Saltner diris kun admira rigardo. Eleganta gesto adiaŭis lin.

•

La lingvostudoj trovis dum la posttagmezo neatenditan interrompon.

Saltner, kiu estis manĝinta kune kun Grunthe, ĵus volis denove iri en la salonon, kiam Ra enpaŝis ĉe ili por doni informon, kiu plej vigle ekscitis ambaŭ eksploristojn.

La marsanoj estis priserĉintaj per siaj ĉasboatoj la enlandan maron kaj ĝiajn bordojn je pliaj spuroj de la ekspedicio. En unu el la fjordoj, kiuj disbranĉiĝis ĉirkaŭ en la direkton de la 70a meridiano de okcidento longitudo, ĉe la bazo de rekte en la akvon deklivanta glaĉero, oni estis trovinta la ĝis nun mankintan paraŝuton de la ekspedicio, flosantan inter derompiĝintaj glacieroj. Tiu devis esti falinta tiel proksime de la bordo, ke ja estis penseble, ke ĉe tiu pendanta homo povintus savi sin sur la glaĉeron. La marsanoj ne povintis surpaŝi la landon; sen specialaj maŝinaj ekipaĵoj tute ne eblis por ili.

Saltner ekstaris saltante kaj urĝe petis gvidi lin tuj surloken. Ĉi tie ekzistis ebleco, ke Torm ankoraŭ vivis kaj estis savebla. Ke la paraŝuto estis trovita en tiel granda distanco de la aerostato, kaj nome ĉe loko, kiun la aerostato ne povis esti surperfluginta, lasis sin klarigi nur per tio, ke Torm disisigs la paraŝuton de la aerostato. Tiam la en la malsupraj aertavoloj reganta ventofluo ja povis bone peli la malrapide falantan paraŝuton ĝis tie. Sed ĉu Torm troviĝintis ĉe la paraŝuto? Supozeble li malsuprenigis sin per tiu; pro kiuj kialoj lasis sin supozi nur malcerte. Eble li estis pensinta savi la aerostaton malplipezigante ĝin je si mem; eble li estis opiniinta la kunulojn sufokitaj kaj provinta por si mem lastan savrimedon, antaŭ ol la aerostao ŝvebis denove super la maron. Ĉiukaze oni devas fari ĉion por trovi eblajn spurojn

de Torm.

Ra volonte disponis boatan kaj ŝipanaron, sed diris tuj, ke la marsanoj nur malmulte taŭgas por esplorado de la glaĉero mem. Ili prizorgas kelkajn aparatojn, kiuj estas uzeblaj por oportune transporti eblajn ŝarĝojn aŭ ankaŭ personojn. Speciale li proponas al li kunporti ambaŭ eskimojn, kiuj troviĝis sur la stacio, patron kaj filon. Ili bone servas al la marsanoj ĉe laboroj kaj transportoj eksterdome, ĉe kiuj oni bezonas muskolan forton, kaj ili certe subtenos lin ĉe ebla surgrimpado de la glaĉero.

Post duona horo la boato estis preta. Ĉar Saltner ne volis fidi pri la al li nekonataj aparatoj de la marsanoj, li ekipiĝis per sia propra grimpŝnuro kaj sia fidinda, feliĉe savita glacipioĉeto, kiuj jam akompanis lin ĉe kelkiu malfacila grimpado en siaj hejmaj montaroj.

Saltner miris ne malmulte, kiam li ekvidis en la longa, elegante konstruita boato naŭ gigantajn globojn de ĉirkaŭ unu metro de diametro, la kapkovrilojn de la marsanoj, kiuj kuŝis rekte sur iliaj ŝultroj. Per tio ili aspektis kiel karikaturoj. La gvidanto de la boato staris surborde kaj salutis Saltneron pene enŝipiĝonte kaj surmetonte nun ankaŭ sian globkaskon. La du eskimoj jam troviĝis en la boato kaj disigis la ŝnuron, tuj kiam la gvindanto enŝipiĝintis. Ili ne bone komprenas sian geston, kaj la boato ekmoviĝis for de la kajo, ĵus kiam Saltner volis paŝi sur ties randon. La marsanoj, kiuj kredis, ke li devis certe fali en la akvon, vigle braksvingis, dum li mem dinamikete forpuŝis sin de la bordo kaj lerte saltis en la boaton. Por lerta gimnastikanto estis facilaĵo, sed ricevis respekton de la marsanoj. Sub la influo de la tergravito tio farado estus ebla al neniu el ili.

Saltner apenaŭ faris kelkajn paŝojn ĉirkaŭserĉante taŭgan lokon, kiam unu el la marsanoj prenis sian grandan globon de la ŝultro kaj anstataŭ ĝi aperis la gracia kapo de La. Ŝi ĝoje alrigardis lin per siaj grandaj okuloj kaj amike kapklinis al li.

“Kiel okazas, ke vi estas ĉi tie, La La?” Saltner diris germanparolante de surpizo. “Vi ja timevitas la pezecon eksterdome. Tiu veturado estas certe tre peniga por vi?”

“Tute ĝuste”, La respondis ankaŭ germane, “mi faras tion ne por plezuro. Mi deĵoras. Kiel volas kompreni vi tiujn Numeojn? Kiel volas kompreni vi tiujn Kalalekojn? Mi estas ĉi tie kiel tradukisto”, ŝi aldonis en la marsa.

“Prave, pri tiu malfacilaĵo mi tute ne pensis. Sed kiel mi bedaŭras, ke vi devas peni tiom. Certe, kion pli bonan mi povus deziri – sed ĉu vi ja ne volas remeti vian kaskon?” La kapneis. Ŝi altenfaldis malantaŭ sia sidloko mole remburitan apogilon kaj apogis tie sian kapon. Tiel ŝi klinis malantaŭen kaj lasis siajn okulojn kontrolante vagi trans la boaton kaj la tutan ĉirkaŭaĵon.

Per granda rapideco la boato tratranĉis la senbrue moviĝantajn ondojn de la golfeto, kaj atingis post ĉirkaŭ dek minutoj la lokon, kie pluraj kanaloj de diversaj larĝecoj disbranĉiĝis. Nun oni devis veturi malrapide kaj atenteme, ĉar ĥaoso de ŝtonegoj kaj glaciinsuloj aŭ glacieroj etendiĝis laŭ la fronto de la glaĉero kaj mallarĝigis la ŝanelon. La marsanoj montris la lokon, kie ili estis trovintaj la paraŝuton, kaj Saltner elrigardante serĉis taŭgan lokon por surgrimpi la glaĉeron. Li hakis sian glacipioĉeton en glacieron kaj transsaltis sur tiun, revenis kaj lasis la boaton pluveturi. Ŝajnis esti memkompreneble, ke li komandis ĉi tie.

La lasis siajn okulojn kuŝi kun plezuro sur liaj energiaj moviĝoj. Tiu Bat’, super kiu ŝi kiel marsanino sentis sin tiel supera, estis ŝajninta al ŝi ĝis nun nur stranga.

Sed ĉi tie, en sia elemento kiel lerta grimpanto, li ja faris pli favoran impreson al ŝi. Kontraŭ la senmovaj globoj, kiujn ŝiaj samlandanoj portis sur la ŝultroj, kontraŭ la grizaj, obtuzaj vizaĝoj de la eskimoj kun iliaj elstarantaj vangostoj, lia esprimplena kapo, liaj libera sinteno kaj forta aŭdaco prezentis bildon, kiun ŝi volonte alrigardis.

La glaĉero deklivis ĉe la plej multaj lokoj per vertikala rando dek gis dek kvin metrojn alta en la maron. Finfine Saltner trovis lokon, ĉe kiu la surgrimpado ŝajnis ebla al li. Lerte li hakis ŝtupon post ŝtupo en la sufiĉe molan glacion kaj grimpis, sekvate de la okuloj de la marsanoj kun ekscito, alten sur la glacimuron. Tiam li malsuprenĵetis la ŝnuron, kaj la du eksimoj sekvis lin ĉe tio. Baldaŭ ili malaperis por la pasaĝeroj de la boato malantaŭ la rando de la glacio.

Pli longan tempon nenio aŭdiĝis de la grimpantoj, kaj La jam senpacience ekrigardis al la altaĵo. Tiam Saltner aperis ĉirkaŭ cent metrojn pli malproksime ĉe la rando de la deklivo kaj mansvingis al la boato, ke ĝi veturu tien. Kiam tio estis okazinta, li vokis malsupren:

"Mi trovis spurojn. Ĉu estos eble transporti kelkajn personojn alten ĉi tien?" La tradukis, kaj la gvidanto de la boato lasis respondi, ke tio estus tre facila, se Saltner sukcesus altentiri per ŝnuro la pulion de la lifto, kiun la marsanoj kunportis, kaj fiksi ĝin.

Tio okazis laŭ deziro. Baldaŭ la marsanoj estis konstruintaj komfortan lifton, kiun ili funkciigis per la akumulatoroj de sia boato.

Ne malproskime de la loko, ĉe kiu la marsanoj fiksis sian lifton, flanka kanjono trafis la ĉefan valon, kaj ĉi tie altentiriĝis strio de rokruinaĵoj kaj morena ŝutaĵo, kovritaj de likenoj, sur la iom post iom leviĝanta glaĉero. Sur tiu strio oni povis bone atingi la internon de la firma grundo sen konfidi sin al la malsekura surfaco de la glaĉero. Saltner nun estis rimarkinta objekton inter la rulŝtonaĵo, kiu pro la granda distanco ja ne estis bone rekonebla, sed estis ĉiukaze esplorenda, ĉar ĝi ŝajnis deveni de homoj, se eĉ ne estis la nur parte videbla korpo de homo. Sed por atingi la ŝtonaĵon, oni devas unue pasi profundan kaj larĝan fendon; tiu fendo estis transpontita ĉe unu loko de neĝa ponto, kiu evidente nur antaŭ mallonge disfalis. Nuntempe ne eblis transpaŝi tiun sen artefaritajn helpilojn, kaj pro tio Saltner vokis, ke la marsanoj supreniru. Li diris al si, ke ja estas penseble, ke Torm pere de la de la paraŝuto disigita ŝnuro venis sur la glaĉeron kaj de tie sur la morenan strion. Por tio li estis rigardinta kun granda ekscito tiun malhelan objekton el la malproksimeco.

La marsanoj vinĉe levis sufiĉe da longaj stangoj el sia boato por povi transponti la fendojn, kaj Saltner faris kun la eskimoj la ceteran laboron. Tiam li plumigris super la rokruinaĵojn, plia grimpado, kiu cetere estis pli malfacila kaj okazis pli malrapide, ol li komence estis supozinta.

Ankaŭ La estis lasinta levi sin. Sur sternitaj feloj kuŝante ŝi spektis la homojn ĉe la laboroj. Ŝi neniam estis vindinta glaĉeron de proksime, kaj tute ne surpaŝinta. Sur la marso tiaj formitaĵoj ne ekzistis; la atmosfero estis multe tro seka por subteni tiujn. Kun admiro ŝi rigardis en la ĥaoson de fendoj, ruinaĵoj kaj pintoj, kiuj kun siaj verdetaj ombroj kontrastis kun la ruĝete en la sunbrilo briletantaj neĝareoj. Plej volonte ŝi enrigardus en la nesondeblan glacian gorĝon, kiun la homoj transpontis, sed li timis montri la penan paŝadon, per kiu ŝi devus tiri sin tien.

Nun la homoj estis foririntaj; ili ne plu povis observi la strangan figuron, kiu malrapide ekstaris de la feloj, surmetis sian globkaskon kaj apogite sur du bastonoj

malrapidege iris al la fendo. La vojo ne estis tiel pena, kiel La kredis; ŝi ja pli-malpli estis trejninta movi siajn membrojn sub la influo de la tergravito. Tiel ŝi alvenis ĉe la tie fiksita ponteto kaj sidiĝis ĉe la rando de la glaĉera fendo.

Tenante sin ĉe unu el la transmetitaj stangoj ŝi atenteme klinis la kapon super la abismon. Malhelverde krepuskis la profundo, el kiu la muĝado de la degelakvo obtuze sonis supren. Ĝuste sub ŝi pinta kresto elstaris kontraŭ ŝi, kiu tiriĝis laŭ la longeco de la gorĝo. Ŝtonego estis falinta malsupren kaj estis firmtenita sur la kresto. Ĝi formis specon de ponto tie malsupre en la profundo. Apud ĝi freŝa fendo montris siajn kristalklarajn glacimurojn. La ne povis satigi sin spektante tiun nekutiman spektaklon. Vertiĝon ŝi ne konis. Ŝi kutimiĝis ekrigardi la kosmon en ĝia senfineco sub siaj piedoj, kiam la spacoŝipo trarapidegis la malplenon de la stela ĉielo. Sed ŝi ankaŭ ne konis la danĝerojn de tiu delikata, dispeciĝanta elemento, sur kies kornice elstaranta rando ŝi kuŝis. Por pli bone malsurpenrigardi ŝi tiris sin pluen laŭ la stango kaj apogis siajn piedojn kontraŭ elstaraĵo de la rando. La elstaraĵo rompiĝis. Disiĝante ĝi falegis en la profundon. Ŝia piedo perdis la apogilon. Ŝi volis resvingi sin supren, sed la ŝarĝo estis tro peza por ŝiaj fortoj. La plumpa kasko malhelpis ŝin libere movi la superan parton de sia korpo ĉe la ponteto, ĉe kiu ŝi kroĉis sin. Ŝi kriis pro helpo, sed la voĉo nur malforte elpenetris de sub la kasko. Nova streĉiĝo levis ŝian korpon, sed nun la stango glitis el sia pozicio, ŝiaj manoj perdis la apogon – – La falegis en la abismon.

Ŝia timkrio finsonoris inter la glacimuroj de la fendo. Sed la kasko, kiu kaŭzis ŝian falegon, provizore iĝis ŝia savinto. Ŝi falis sur la lokon, kiun la sur la kresto kuŝanta ŝtonego mallarĝigis, kaj la elasta kasko bremsis la falegon. Ĝi estis frakasita, sed ŝi mem sentis sin nevundita, ŝi ne estis perdinta la konscion. Fikskroĉante sin per la brakoj ŝi kuŝis nun sur la roko, sub si la tenebra profundo, super si la mallarĝa lumstrio de la ĉielo, ne kapabla movi sin. Ŝi ne kapablis atribui ion al sia savo, minuto post minuto pasis. Kiam oni rimarkos ŝin? Ĉu ŝi povis esti savota? Ŝi estis tute trankvila. La bildo de la fora hejmo leviĝis antaŭ ŝi. “Ankoraŭfoje mi ŝatus vidi ĝin, mian belan Nuon”, tiel sonis en ŝi, “sed se ne estu, tiel mi konvenos al Via volo en la mondoplano.”

Tiam ŝi aŭdis vokojn super si. Globkasko ekvidiĝis. La marsanoj estis rimarkintaj ŝian malaperon, ŝi estis vidata. Oni vokis al ŝi, ke ŝi ekhavu kuraĝon, oni alportos la lifton. Ŝi sciis, ke tio devas daŭri longe; la marsanoj povis nur malrapide labori. Ŝi sentis, kiel la malvarmo de la gorĝo lasis ŝiajn membrojn rigidiĝi.

Subite ŝi aŭdis supre novajn vokojn kaj rapidajn paŝojn. Rapidigantaj figuroj svingis sin trans la ponteton. La sciis tion, kiu estis. Saltner estis reveninta kun la du eskimoj. Ekkoninte tion, kio estis okazinta, li tuj kunŝnuriĝis kaj lasis sin mallevi en la fendon de siaj du akompanantoj. La vidis, kiel lia figuro pli kaj pli alproksimiĝis. Per unu mano li tenis sin for de la muro de la fendo. Kaj nun li genuis apud ŝi sur la ŝtonego. Li lerte disigis la reston de ŝia kasko de ŝiaj ŝultroj; ĝi obtuze trondris en la abismon. Tiam li levis ŝin kaj diris zorgemajn vortojn, kiujn ŝi nur duone komprenis. Nun la vertiĝo ekkaptis ŝin, kaj la konscio minacis forlasi ŝin. Sed ŝi sentis, ke Saltner firme ĉirkaŭprenis ŝin, kaj en tiu momento ŝi sciis, ke ŝi estis ŝirmata. Nun li vokis per laŭta voĉo en sia denaska lingvo supren: “Duan ŝnuron!”

La ridetis dankeme alrigardante lin kaj diris mallaŭte: “Kalalekoj komprenas ne.”

“Jes, jes!” Saltner respondis. Kaj vere, la pli juna de la du eskimoj vokis la germanajn vortojn malsurpen:

“Ne ĉi tie. Atendi. Numeoj venas.”

La alrigardis lin demandante. Sed li ne respondis, li vidis, ke frostis al ŝi.

“Malsuprenĵetu la kovrilon!” li vokis.

Oni sajnis nun ne kompreni lin. “Kion signifas kovrilo en la gronlanda?” li demandis.

“Kepik.”

“Kepik!” li vokis supren.

Oni malsuprenĵetis lanan kovrilon. Saltner firme enbatis la pioĉeton en la muron kaj klinis sin ege antaŭen por kapti ĝin. Sukcesis. Li kovris Laon per ĝi. Li eltiris sian ladbotelon, kiun li antaŭzorgeme estis pleniginta per konjako el la savitaj vojaĝprovizoj. La ja ne havis konon pri tio, sed li trinkigis ŝin per iom de la fajra trinkaĵo, kiu estis tre agrabla por ŝi.

Li raportis mallonge. Lia ekskurseto restis sen definitiva sukceso. La duba objekto estis nur unu el la en la aerostato troviĝintaj kovriloj, la sama, kiu nun kovris Laon. Sed ĉu ĝi nun estis kunportita de Torm kaj lasita tie aŭ ĉu ĝi estis perdita el la aerostato dum ĝia flugo kaj pelita ĉi tien de la vento, ne lasis sin difini; la lasta estis eĉ la pli verŝajna. Ĉe tio suprizante montriĝis, ke la filo de la eskimo komprenis kelkajn vortojn de la germana. Li estis estinta unu jaron en la servoj de germanaj misiistoj sur Gronlando kaj kompreninta unuopajn vortojn, kiam Saltner parolis germane kun La. Li nur ne estis aŭdacinta en la ĉeesto de la marsanoj montri tion.

Finfine la marsanoj reaperis ĉe la rando de la fendo. Oni mallevis duan ŝnuron. Saltner konstruis komfortan seĝon, kaj per tio, ke li apogis Laon kaj tenis ambaŭ for de la muro per la glacipioĉeto, ili feliĉe estis levataj al la surfaco.

“Mi scias, kion mi ŝuldas al vi”, La diris.

Profunda senfortiĝo ekkaptis ŝin, kaj oni devis porti ŝin ĝis la boato.

Oni tuj ekveturis hejmen.

Parto II.

Dua libro

Danko

Dankon al Fritz Wollenberg el Germanio pro la sciigo pri la verkisto kaj la romano.
Dankon al Bir Makombe el la Demokratia Respubliko Kongo pro provlegi.

Licenco

Ĉi tiu verko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Nekomerce 4.0 Tutmonda. Por vidi kopiaĵon de la permesilo, vizitu http://creativecommons.org/licenses/by-nc/4.0/.